

*Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana*

*Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës*

Retpaĝo- Faĝja në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ [www.esperanto.net/al](http://www.esperanto.net/al)

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet: [albanajesperantistoj@yahoo.com](mailto:albanajesperantistoj@yahoo.com)

Adreso de redaksio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016

Albanio (00355682580758; [bselimi@gmail.com](mailto:bselimi@gmail.com))

Aktivuloj

Prezidanto

Shaban Hasani, Tirane (00355682080677, [shabanhasani@gmail.com](mailto:shabanhasani@gmail.com));

Fakdelegito

Gjergji Gusho, Pogradec,( 00355673860228 [gjergji\\_gusho@yahoo.com](mailto:gjergji_gusho@yahoo.com) ),

Fakdelegito

Agim Peraj, Lezhe, (355694472430, [agimperaj@yahoo.it](mailto:agimperaj@yahoo.it));

Fakdelegito, kasisto

Martha Otto, Vlorë, (00355697946646, [martha.otto@gmail.com](mailto:martha.otto@gmail.com))

Sajmir Beqiraj, Tirane, Shkoder, (00355684030613, [s\\_beqiraj@yahoo.com](mailto:s_beqiraj@yahoo.com));

Fakdelegito

Nehat Sokoli , Kukes,(++355682587699, [nehatsokoli@yahoo.com](mailto:nehatsokoli@yahoo.com));

Fakdelegito

Engjell Gusho, Korce, (00355692350111, [engjellgusho@yahoo.com](mailto:engjellgusho@yahoo.com)),

Fakdelegito

Rita Permeti, Tirane (0035542363 360; 00355686857800 [ritapermeti@yahoo.com](mailto:ritapermeti@yahoo.com));

Fakdelegito

Luan Jaupi, Durres, ( 00355675567184, [luanjaupi2014@gmail.com](mailto:luanjaupi2014@gmail.com))

## **BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO**

**Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos**

**Nr. 140, oktobro-novembro (tetor- nëntor) 2018**

### **Albanaj proverboj**

Me mikun ha e pi, por tregti mos bëj.- *Kunmanĝu kaj kundrinku kun amiko, sed ne kunkomercu*

Mollën e mirë, e ha derri.- *Bonan pomon formanĝas porko*

Mos u mundo të nxjerrësh dhjamë nga pleshti- *Ne klopodu elĉerpi grason el kulo*

Mos shiko gunën, po shiko punën.- *Ne vidu surtuton, sed laboron*

Mos hiq petullat me duart e tjetrit- *Ne demetu flanon per alies manoj*

Mos bëj të vesh vetulla dhe nxjerr sytë.-*Ne surmetu brovojn, eligante okulojn*

Nga ferra del trëndafili, ashtu si dhe nga trëndafili del ferra- *El dorno kreskas rozo kaj el rozo kreskas dorno.*

Nuk ngopet ariu me miza- *Urso apenaŭ satigas per muŝoj*

## ENHAVO

[Ni kaj UEA, ILEI, AIS](#)

[Nia Historio](#)

[Novaj libroj](#)

[Niaj leteroj](#)

[Informaĵoj](#)

[Instruado](#)

[Esperanto en bildoj](#)

[Vojaĝoj](#)

[Artikoloj](#)

[Beletraĵoj](#)

## [Ni kaj UEA, ILEI kaj AIS](#)

- **Vivo de la Ligo Eventoj**



## Kongresoj

### La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio

La ĉefa evento de la nuna raportperiodo, certe, estis la 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio. Ĝi estis sukcesa, absolute rekorda laŭ la kvanto de aliĝintoj kaj partoprenintoj kaj novtipa pro unuigo de du kongresoj samtempe. Dum la evento la prezidanto sendis kvar gazetarajn komunikojn. La detalaj raportoj aperis en IPR 2018/3, en Juna Amiko 2018/3. Aldone, fine de aŭgusto, LKK en Madrido faris raporton pri la kongresa statistiko kaj detalan analizon de la enketo, kiun ricevis kaj plenumis dum la kongresoj iliaj partoprenintoj. Tiu ĉi resumo estis dissendita al ĉiuj partoprenintoj.

Krome, kiel kutime, la estraranoj, kiuj ĉeestis la kongreson, esploris diversajn opiniojn pri ĝi kaj faris konkludojn por la sekvaj kongresoj.

### La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio, 2019

Survojas preparado de la 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio. La Estraro intencas iom modifi la paĝaron de ILEI, inkluzive paĝon pri kongresoj, pripensas estontan emblemon de la kongreso kaj trovis finfine trafan formulon por la kongresa temo, kiu povus interesi kiel la Ligon ILEI, tiel la gastigonton – la Fakultaton de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak apartenantan al la Universitato de Kragujevac. La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović traktas la aferon kun la universitato de Ĉaĉak, kiu estas lia loĝurbo. Li, kiel kutime, preparis la anoncon kaj aliĝilon por aperigo en IPR 2018/3.

## Venontaj kongresoj

La Estraro dense esploras pri la loko por la 53-a ILEI-kongreso en 2020 kaj pri la eventualaj temoj, alogaj por ILEI kaj por universitata medio.

## Komisiono pri universitata agado

Post la ILEI-kongreso en Madrido kaj la Nitobe-simpozio en Lisbono aperis nova konsisto de la Komisiono pri Universitata Agado de ILEI. Aldoniĝis D-ro Vicente Manzano Arrondo, profesoro pri psikologio en la universitato de Sevilla, Hispanio. Li estis efike aktiva dum la

madrida kongreso kaj la lisbona simpozio. Ni deziru fruktodonan agadon al la nova komisiono! Alia pozitiva fakto estas la elekto de D-ino Angela Tellier kadre de ESF por universitata agado. (ESF = Esperantic Studies Foundation) Jam kontaktoj inter ŝi kaj la Komisiono komenciĝis.

Salutmesaĝoj de ILEI

LA Prezidantino Mireille Grosjean laŭvice sendis salutmesaĝojn al SES en Liptovský Mikuláš, Slovakio, al SAT-kongreso en Čačak, Serbio kaj al IJK en Badajos, Hispanio, al niaj brazilaj kaj hungaraj samideanoj okaze de iliaj seminario kaj kunveno de la landaj sekcioj.

Deklaro pri privateco

Septembre la Prezidantino Mireille Grosjean trasendis al la sekcioj kaj reprezentantoj la Deklaron de ILEI pri privateco. Ĉar la Ligo havas sian juran sidejon en Roterdamo, Nederlando, ILEI devas sekvi la postulojn de Eŭropa Unio. Mireille adaptis la eŭropan deklaron al kondiĉoj de la Ligo kaj nun ILEI havas sian propran Deklaron pri privateco kongrue kun eŭropaj postuloj. Okaze de la **Tutmonda Tago de Instruistoj**, la 5-an de oktobro, la Prezidantino sendis salutmesaĝon al la sekcioj, reprezentantoj kaj ĉiuj Eo-instruistoj. En ĝi ŝi atentigis niajn samideanojn pri la ĉefa temo de la ĉi-jara festo flanke de UNESKO: “Rajto al edukado estas rajto al kompetenta instruisto”. Mirejo donis siajn opiniojn pri defioj de nuntempa edukado.

Okaze de la alproksimiĝanta Tago de la Libro 2018, dum kiu ILEI tradicie organizas **Komunan Legadon**, la Prezidantino Mireille Grosjean proponis tekston por la komuna legado. Temas pri la poemo de Julian Hernandez Angulo el Kubo, kiun li deklamis fine de sia prezento en la Tago de la Lernado dum la 51-a ILEI-kongreso en Madrido. La partoprenantoj de UK povis ankaŭ aŭdis tiun deklamon okaze de la Internacia Arta Vespero.

**Poezio tutlibera** estas konkurso lanĉita de la franca edukministrejo. En 2018 la konkurso estis malfermita al poemoj en Esperanto. La prezidanto de ILEI diskonigis la regularon de la konkurso tra la kutimaj kanaloj kaj la partopreno estis sukcesa. Raporto pri ĝi aperas en la ĉefpaĝo de [www.ilei.info](http://www.ilei.info). Sen ajna modifo la konkurso denove ekas nun kaj alvokas al junaĝaj poetoj.

La Estraro

Septembre ene de la nova Estraro okazis divido de taskoj. Tiu divido, espereble, plu efektigos la laboron de la Ligo.

Laŭ la venintaj petoj, la Estraro pridiskutas la aferon kun la membrokarto por siaj membroj.

Povus esti elektronikaj ebloj. En diversaj landoj tiaj kartoj estas bezonataj.

La nova estraro povis efike kunsidi skajpe.

Estas planata ĉeesta estrarkunsido de la nova Estraro en Svislando ĉe la prezidanto, eble en januaro aŭ februaro 2019, kiel tio jam okazis en majo 2016. Tion la estraro de ILEI celas komence de la trijara mandato de la estraranoj por efikigi la laboron.

Kapabligo

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado

Vidante la bezonojn kaj konstatante la novajn teknikajn eblojn, ILEI en 2018 lanĉis tri programojn EIT. Ĉiuj tri enhavis la samajn partojn: retan kurson ĉe [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj



ĉeestan semajnon. La unua okazis bone kaj finiĝis en Madrido okaze de nia 51-a Kongreso. Tie tri personoj finis la studadon kaj diplomiĝis, aŭ preskaŭ atingis la finon. La dua kurso devis esti nuligita. La tria survojas, ĝi koncernas afrikanojn. Tie okazas diversaj malfacilaĵoj : unue la retaliro, manko je komputilo, pago en retkafejo, ne bona konekto, ne eblo elŝuti dokumentojn aŭ sendi taskojn. Plie la testmaniero per elekteblaj respondoj ne estas kutima en Afiko; precizaj respondoj al precizaj demandoj ne venas kaj la partorenantoj penas kontentigi la postulojn de la kurso. De tiu grupo nun restas ses instruistoj, por kiuj ILEI nun esploras pri solvo. Konklude la rezulto de EIT estas magra kaj tristiga. Tamen estas la unua provo, kiu evidentigis la ĉefajn problemojn kaj tial multe instruis al la Ligo mem pri evoluigo de ĝia ĉefa tasko.

Septembre la Prezidantino Mireille Grosjean dissendis tra kanaloj de ILEI alvokon pri la planata unua sesio de KER-ekzamenoj en Afriko, en Kotonuo, Benino, la 5-an de novembro 2018. Tio estas komuna projekto de ILEI kaj de la Komisiono pri Ekzamenoj de UEA cele al kapabligo de afrikaj samideanoj.

### **Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj**

Dum la ILEI-kongreso en Madrido la Komitato akceptis **du novajn sekciojn**: en **Senegalo** kaj en **Armenio**. Gratulojn al niaj kolegoj-samideanoj!

Pro la postuloj de EU pri privateco ILEI devis forpreni la nomojn kaj adresojn de la sekciestroj kaj reprezentantoj kaj kontaktpersonoj el sia paĝaro [www.ilei.info](http://www.ilei.info). La prezidanto informis ĉiujn pri la paŝo kaj demandis, ĉu ili konsentas pri aperigo de donitaĵoj pri ili. Aro da pozitivaj respondoj venis, baldaŭ la paĝo en la retejo denove aperos kun la nomoj kun konsento de ĉiu unuopulo.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

Ĉijare ILEI kunlabore kun LIBE – la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj – decidis krei la adekvatan formaton de IPR kaj JA por blinduloj. La redaktoro Jozefo Nemeth kaj Sebastian Cyprych, la ILEI komisiito pri membropriizorgado pretigis la taŭgan formaton. Reago de LIBE-anoj alvenis tute pozitive.

Granda danko iru al la redaktoro Jozefo Nemeth.

### **Juna Amiko (JA)**

Dum la ILEI-kongreso en Madrido kreiĝis laborgrupo por trakti diversajn aspektojn de la revuo: la deficiton de la papera versio, kaj nivelon de la lingvo, por ke ĝi pli bone trafu sian celpublikon – Esperanto-lernantojn, komencantojn de ĉiu aĝo, kiuj bezonas facilan, kompreneblan lingvon. La laboro komenciĝis perrete aŭtune.

Granda danko iru al la redaktoro Stano Marcek.

### **ILEI en la Reto**

Daŭras la informado pri la Ligo tra diversaj ret-kanaloj. Regule aperas komentoj de niaj membroj, kio tre ĝojigas la Estraron. Dankon al niaj kolegoj!

### **Kunlaboro kun UEA**

ILEI informis la Estraron de UEA pri gravaj decidoj ene de sia Estraro rilate al la Ligo. Same UEA regule sendas informojn al la prezidanto de ILEI, kiu plu dividas ilin kun la estraro. Do informfluo bone fluas.

Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj

ILEI fiere povas konstati, ke klopodoj por ebligi al blindaj esperantistoj legadon de IPR kaj Juna Amiko finfine rezultigis. LIBE-estraro decidis pagi kvin kotizojn por elektronika versio de "Internacia Pedagogia Revuo" kaj sep por "Juna Amiko". La redaktoro de IPR Jozefo Nemeth kaj la ILEI komisiito pri membroprizorgado Sebastian Cyprych kun helpo de Radojica Petrović produktis la simplatekstajn elektronikajn versiojn de ambaŭ revuoj. Gratulojn al niaj kolegoj!

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

La ĝenerala direktorino de **UNESKO** Audrey Azoulay sendis sian salutmesaĝon al UK en Lisbono. Kvankam la adreso estas UEA, tamen tiu salutmesaĝo aperis danke al la iniciato de nia Prezidantino Mireille Grosjean, kiu skribis al Sinjorino Azoulay unue por gratuli ŝin pro elektiĝo en novembro 2017, kaj due raportis al ŝi pri ambaŭ kongresoj kaj diversaj agadoj de la Esperanto-movado paralele al la celoj de UNESKO, kaj petis salutadon de UNESKO. Do, denove gratulojn iru al Mirejo!

Danke al la efika kaj longdaŭra laboro de nia kolego Germain Pirlot en Belgio, niaj membroj respondas al enketoj, kiuj riĉigas la revuon de la belga sekcio de **AEDE**, Asocio de Eŭropaj Instruistoj. Estus bone, ke niaj eŭropaj membroj membriĝu en la sekcioj de AEDE en sia lando kaj provu krei kontaktojn en la stilo, kiun Germain Pirlot trovis: ne trudi Esperanton, sed uzi ĝin por kolekti informojn.

En la sama stilo nia Prezidanto kontribuis al riĉigo de statuo en **Neuchâtel, Svislando**, kiam la skulptisto volis esprimi itallingvan frazon en plej diversaj lingvoj. (Erri de Luca: "Ŝajnas al mi, ke per la multobligo de la lingvoj la horizontoj multobliĝas ».) Ŝi uzis la kutimajn kanalojn de ILEI kaj kolektis la frazon en proks 50 lingvoj. Per tiaj agadoj nia lingvo brilas kaj kontentigas la lokajn organizantojn. Plej bona varbado!

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova Prezidanto de ILEI: Mireille Grosjean 2018-10-15

- ***Internacia Esperanto-Konferenco – 2019***

(de la 13-a ĝis la 19-a de julio en Kondoros, Hungario)

Temo: Hungara kulturo

**Loka adreso:** Pál KOZSUCH, Csabai út 2., HU-5553 Kondoros, Hungario

poŝtelefono: +33 6x xx xx xx    retadreso: [pauljuno@freemail.hu](mailto:pauljuno@freemail.hu)

### ***Loko***

Kondoros [kondoroŝ] estas grandvilaĝo en Hungario, en regiono Suda Ebenaĵo, je 100 km de Kecskemét [keĉkemét] kaj 45 de Rumanio.

Kondoros situas sur la ĉefvojo Kecskemét-Békéscsaba [bekeŝĉaba]

### ***Konferencejo***

La konferenco okazos en la tradicia malnova restoracio « Ĉardo».

### ***Loĝado***

- Gastejo kun klimatizitaj ĉambroj, 13 € / nokto / persono. Nur 5 ĉambroj haveblas.
- Gastoĉambroj dise en la vilaĝo, 10 € / nokto / persono
- Studenta hejmo, 5 € tage, 5-6-litaj ĉambroj kun komuna necesejo kaj duŝejo.

Noto: la prezoj ne estas garantiitaj, kaj povas varii laŭ la kurzo.

Ankaŭ eblas malkoste tendumi.



### **Letero al la landaj asocioj / Bv. dissendi ankaŭ al la Estraro de via LA**

Karaj amikoj: Mi skribas por peti vian helpon en la membrokampanjo de UEA por la jaro 2019. Niaj aliĝintaj landaj asocioj estas la plej gravaj fontoj de novaj individuaj membroj de nia Asocio. Ju pli da tiaj membroj ni havas, des pli bone UEA povas reprezenti la tutmondan esperantistaron. Kaj ne temas pri ordinara jaro. En Lisbono la Komitato reformis nian membrisistemon, tiel ke ekde la venonta jaro la kategorioj “Membro kun Gvidlibro” kaj “Membro kun Jarlibro” anstataŭiĝas per la nova kategorio “Baza Membro”. Ni bezonas vian helpon por klarigi tiun ŝanĝon al viaj membroj.

Fariĝi “baza membro” de UEA estas maniero montri sian solidarecon kun la mondvasta komunumo de esperantistoj. La kotizoj por baza membreco estas ligitaj al la relativa riĉecnivelo de la diversaj landoj, ekde nur 2 eŭroj en la plej malriĉaj landoj ĝis 44 eŭroj en la plej riĉaj. Ĉiu esperantisto, kiu aliĝas laŭ la plej alta tarifo, samtempe subtenas la membriĝon de homoj kun multege malpli da rimedoj. Tiu sistemo celas esti pli justa kaj inkluziva.

Plia novaĵo estas la rabatoj por junuloj. Ĝis la aĝo de 19 jaroj, homoj povas aliĝi je nur kvarono de la kutima kotizo (t.e. 11 eŭroj en la plej riĉaj landoj). Inter la aĝoj 20 kaj 25, la kotizo estas duono de la kutima. Ni tre esperas, ke vi helpos nin diskonigi tiujn rabatojn inter la junaj esperantistoj en via lando.

Bazaj membroj ricevas ĉiujn servojn kaj rajtojn de membreco, inkluzive de rabato por la Universala Kongreso. La informoj en Jarlibro estos alireblaj elektronike per la nova reta membropaco de UEA, al kiu iom post iom aldoniĝos novaj funkcioj. Papera eldono de la Jarlibro estos daŭre mendebla, kontraŭ aldona pago.

La kategorio Membro-Abonanto restas pli-malpli senŝanĝa. La kotizo estas tiu de Baza Membro plus 30 eŭroj por ricevi la paperan eldonon de la revuo *Esperanto*. La reta eldono estos legebla por ĉiuj membroj.

Ankoraŭ eblas fariĝi Dumviva Membro de UEA. Ekde la nova jaro la kotizo por tio egalas al 30-oblo de la koncerna jarkotizo (de Baza Membro aŭ de Membro-Abonanto). Ĝis la fino de 2018, oni ankoraŭ povas fariĝi Dumviva Membro je la malnovaj tarifoj (25-oblo).

La kialoj fariĝi individua membro de UEA restas la samaj. Ne temas nur pri la konkretaj servoj, kiujn oni ricevas kiel membro. Temas pri tio, ke UEA estas la sola Esperanto-asocio malfermita al esperantistoj en ĉiuj landoj, ĉiuj tendencoj, ĉiuj vivsituaĵoj. Nia Asocio estas konkretigo de la vizio de D-ro Zamenhof, pri mondo en kiu homoj renkontiĝas, amikiĝas, kunvivas kaj kunlaboras kun homoj. Eĉ en la plej riĉaj landoj, la kosto de baza membreco estas malpli ol unu eŭro semajne. Tio estas malgranda investo en granda idealo.

Niaj landaj asocioj estas kolonoj de nia Asocio, videblaj pruvoj de nia tutmondeco. Bonvolu helpi nin montri tion ankaŭ per la kreskigo de nia individua membraro! Eĉ 10%-a kresko en via lando estos bela indiko pri la solidareco de viaj samlandanoj kun aliaj samideanoj tra la tergloblo.

Elkore, bondezire, Mark Fettes Prezidanto de UEA

## Nia Historio

- **Esperanto en mia vivo**

(Memoraĵoj)



Sendube, Esperanto estis unu el miaj plej grandaj pasioj. Estante gimnazisto, mi aŭdis pri ĝi kaj sekvis lernokurson kiu okazis ĉiun dimanĉon en la kulturdomo "Ali Kelmendi" en Tirana.

Estis decembro 1961. Gvidis la kurson inĝeniero Ĉefo (Ĉefo) Fico, el Gjirokaŝtër<sup>1</sup>. Li estis viro prudenta, gaja, senlaca. Kvankam li suferis pro reŭmatismo ĉe gamboj, pro tio li uzis bastonon, nenian dimanĉon li mankis. Kun li venis pli juna ties kolego, inĝeniero Vasil Pistoli<sup>2</sup>



Dum ekskurso al pratempa kastelo de urbo Shkodër, nordokcidente de lando kun fremdaj esperantistoj, somere 2001

Mia samkursano estis s-ro Shaban Hasani<sup>3</sup>, samaĝulo, tiam lernanto ĉe mezlernejo pri konstruado. Cetere, tie venis multaj aliaj civitanoj, inter kiuj ankaŭ s-ro Dilaver, instruisto de matematiko, blindulo, kondukata ĉiam de kuzo.

---

<sup>1</sup> Urbo sude de lando

<sup>2</sup> Poste prezidanto de la Albana Esperanto Asocio

<sup>3</sup> Aktuala prezidanto de AEA



Mi kaj Shaban lastajn jarojn

La lernokurso daŭris tri monatojn. Ni uzis poŝlibreton nomata "Ŝlosilo de Esperanto". Verŝajne, tiaj libretoj estis eldonitaj en multaj mondaj lingvoj kaj helpis notinde por lerni Esperanton ankaŭ dum vojaĝoj. "Ŝlosilon" por albanoj estis pretiginta mem s-ro Fico. Dum 1920 - jaroj li studis en Italio kie ankaŭ ellernis Esperanton.



Dum lernokurso kun blindaj kaj duonblindaj lernantoj en Tirana, jaro 2003

Esperanto ege altiris min ĉar ĝi estis konstruita laŭ fiksjaj reguloj, simile al matematiko, sen esceptoj.

Ekzemple, la nomoj finiĝis per "o", krom en akuzativo per "n", kiel en la albana.

"Urbo" - "urbon"; "Mano- manon" ka.

La adjektivoj finiĝis per "a": urba- libera- forta" ka.



La derivitaj adverboj finiĝis per "e", "bone- rapide- escelente", ka.

Se ni aldonas ĉe vortoradiko "et" ni reduktas la dimensiojn: "urbeto- libreto-knabeto" ka. Kontraŭe, per "eg" ni pligrandigas dimensiojn: "urbego- bruego- pordego" ka.

La sufikso "ar" formas tuton de elementoj dum la sufikso "er" montras elementon: "arbaro- kamparo, soldataro" kaj "sablero-pluvero-programero" ka.

Per "an" ni montras partoprenanton de tuto: "urbano- partiano", ka; per "estr" oni notas ĉefon: "urbestro- partiestro" ktp.

La nomoj ne posedas sekson, krom se temas pri animuloj (homoj kaj animaloj). Tial "ŝranko, tablo, ĉielo, tero " ne havas sekson kiel en la naciaj lingvoj, inkluzive la albanan.

Sed "patro- patrino", "knabo-knabino", ĉevalo- ĉevelino" montras viran kaj inan sekson, respektive. Tion certigas la sufikso "in".



Mi kun du junaj esperantistoj el Hungario kaj Litovio, jaro 1991

Do, ne necesas parkerigi inajn nomojn. Simile okazas kun antonimoj, kiuj formiĝas per prefikso "mal": "bona- malbona, bela- malbela, alta- malalta"ka.

Se ni uzas sufikson "id" ni obtenas "bebon". Tiel "ĉevalido- hundido- homido" kio ankaŭ en la albana postulas apartajn vortojn por parkerigi..

La sufikso "ist" montras profesion: "muzikisto- sportisto- instruisto- ŝuisto" ka.





Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto

Tuto lernata de ni ŝajnis vera miraklo. Ĉar en la lernejo ni studis paralele almenaŭ du fremdajn naciajn lingvojn, la anglan kaj la rusan kaj bone sciis kiom malfacile ili ja estis. Ĉar ĉiuj naciaj lingvoj, kvankam ili havas iliajn internajn leĝojn, ĝenerale entenas multajn malregulecojn, havas multajn idiomojn, milojn da prefiksoj, sufiksoj, finaĵoj lernendaj parkere kaj prave aplikendaj, por ke ni povu asimili iel ilin. Tial estas ja raraj la personoj kiuj parolas flue la lingvojn lernitaj de ili.

Esperanto estis proponita kiel internacia helplingvo, ĉar ĝi estis neŭtrala, propraĵo de neniu specifa popolo kaj simpla, natura, ĉar ĉiuj siajn radikojn ĝi ricevis el la ekzistantaj lingvoj (ĉefe eŭropaj, plie latinaj) kaj fonetika. Tial ĝi survivis (ekde kreiĝo en la jaro 1887 de s-ro Ludoviko Zamenhof).

Ĝus fininte la kurson, ni ekkorespondis kaj legis revuojn alvenintaj tiutempe el Ĉinio, Vjetnamio, Laoso, sed ankaŭ el Eŭropo. Certe, nia vortorezervo komence estis malriĉa, tial la enhavo de niaj leteroj estis ne larĝa, nek profunda, kun gramatikaj eraroj, sed ne pli multe ol en kazo kiam ni korespondis ruslingve kaj anglalingve.

La revuoj "El Popola Ĉinio", "Vjetnamio antaŭenmarŝas", diversaj broŝuroj kaj verkoj de Maŭ Ze Dong, Ho Ŝi Minh, same la revuo "Esperanto| de la Tutmonda (Universala) Esperantista Asocio (UEA), centre en Roterdamo (Nederlando), la "Jarlibro" de tiu asocio, kie aperis ankaŭ mia nomo, tenadis min ligite kaj en kontakto kun mondo de esperantistoj.

Tiun pasion mi daŭrigis ankaŭ en la universitato, varbante ankaŭ miajn kolegojn- studentojn. Sed pli poste, kiam la klasbatalo akriĝis ene de lando kaj kontaktoj kun fremduloj vidiĝis suspekteme, mi ĉesigis korespondon, por rekomenci ĝin post jaro 1990.

Mi memoras ke tiutempe, antaŭ 1990, mi akompaniĝis multe kun s-ro Gafur Muĉo, esperantisto, kiu daŭre korespondis kun samideanoj el diversaj landoj de la mondo. Mi vizitis lin hejme kaj legis leterojn alvenintaj al li, same mi travidis diversajn poŝtkartojn kaj librojn liajn. Gafur deĵoris ĉe biblioteko de Ministrejo de Konstruado. Jarojn poste oni maldungis lin, probable ankaŭ pro liaj rilatoj al eksterlandaj esperantistoj, ĉar similajn ĝenojn havis ankaŭ s-ro Vasil Pistoli, kiun neniam permesis vojaĝi esksterlanden pro laboro.




Sur foto: Ibrahim Xhamaj, Enkela,( ties filino), Rita Përmeti, Gafur Muĉo kaj mi, pli ol 25 jarojn antaŭe.

S-ro Ĉefo Fico estis tro maljuna, sed li havis amikecon kun politburoisto Spiro Koleka, same esperantisto. Ĉe inĝeniero Ĉefo, loĝinta en la "strato de Durrës", ne fore de mia hejmo, mi iris ofte por vizito, li donacis al mi diversajn revuojn kaj babilis kun mi elkore.

En la jaro 1967, inĝ. Vasil Pistoli tradukis en esperanton koncizan biografion de Gjergj Kastrioti-Skënderbej<sup>4</sup>, kompilita de Kristo Frashëri. Gafur eldonis ĝin. Sed baldaŭ, laŭ ordono de kompartia aŭtoritatulo, oni sendis libron por kartoniĝi, kvazaŭ ĝi estus "malpermesita libro". Verŝajne oni estis leginta pri tio okazinta en eksa Sovetunio aŭ Nazisma Germanio al esperantistoj, kie pluraj el ili estis persekvitaj kiel "spionoj" de Okcidento. Ulrich Lins estas verkinta interesan monografion je titolo "Danĝera lingvo", ĝuste pri tiu temo.

---

<sup>4</sup> Albana nacia heroo



La libro de Ulrich Lins "La danĝera lingvo" Libro pri Skanderbeg de Cuk Simoni

Oni produktis ankaŭ dokumentaran filmon, je turisma intereso, pri la muzea urbo de Gjirokaŝtër kun esperantista ĉiĉeronado, kiun mi jam spektis en nia ŝtata filmejo en Tirana.

Gafur, printempe 1991, renkontis min kaj sciigis ke li jam fondis "Albanan Esperantistan Ligon" AEL. Antaŭe, li partoprenis la grupon kiu fondis Respublikecan Partion, tial mi vidis lin per televizio dum renkontiĝoj kun tiama komunista prezidento Ramiz Alia, sed baldaŭ oni estis ekskludinta lin disde tiu partio.

La novaĵo pri Albana Esperantista Ligoj ekĝojigis kaj aktivigis min tuje. Mi malfermis lernokurson kun kolegoj kaj lernantoj en la elementa lernejo de Mushqeta<sup>5</sup>, kie mi instruis matematikon kaj entreprenis la Ligan taskon de korespondo kun eksterlando. Tiutempe oni sendis al ni senpage multajn revuojn kaj librojn. Estis bone por ni ke Albanio enlistiĝis en la Tutmonda Esperantista Movado, eĉ pro fakto ke Albanio komenciĝas per A, inter la unuaj.

Alvenis tre interesa libro je filozofia enhavo, verkita de germano Bruno Vogelmann, je titolo "Nova Realismo". Mi tralegis ĝin kaj proponis al aŭtoro ke ni enalbanigu ĝin. La aŭtoro konsentis kaj s-ro Vasil eklaboris. Post unu jaro la libro eldoniĝis.



---

<sup>5</sup> Loĝloko je 22 km sude de Tirana



Mi kun profesoro Vasil Pistoli kaj s-ro Shaban Hasani

Pli poste mi daŭrigis la korespondon kun tiu ĉi viro, serioza, studema, klera, je tre interesa pasinto, eksa politika prizonulo en naziaj koncentrejoj, kiu eĉ 93 jara karakteriziĝis je klara pensado.



La monografio de Bruno Vogelmann en esperanto kaj la albana

Ing. Vasil Pistolo kompilis ankaŭ tre bonan lernolibron de esperanto por albanoj akompanata de kvinlingva vortaro, laŭ modelo de la unua libro de esperanto de Zamenhof. La libro rapide vendatis.



Reveninte instrui en Tirana, en profesia mezlernejo de periferia suburbo, mi malfermis ankaŭ tie lernokurson. La gelernantoj fondis junulan asocieton kiun eĉ benis per tre simpata nomo "Junesp" kaj interrilatiĝis kun similaj organizaĵoj eksterlande.



Dum ekskurso kun lernantoj al urbo Durrës


Somere 1992, 18 el ili kaj junuloj el Durrës, kie aktivis s-ro Luan Jaupi, entreprenis vojaĝon al Bulgario, en Vraca, kie ilin atendis s-ro Lubomir Trinfoĉovski (jam forpasinta).



Dum iujunulara kunveno en Durrës, 1993

Gafur estis en kontaktoj kun bulgaraj esperantistoj, li interŝanĝis vizitojn kun ili. Ankaŭ mi renkontiĝis kun ties prezidanto, en Tirana, s-ron Petar Todorov, mi eĉ gastigis lin pro tagmanĝo en mia hejmo. Alvenis esperantistoj ankaŭ el aliaj landoj. Mi memoras pri norvego kiu estis helpinta sian amikon funkciigi, ankaŭ en Albanio, rapidan marŝiparon "La Vikinga". Li proponis al ni organizi en Tirana internaciajn kunvenojn.

En la jaro 1993, s-ro Zef Mjeda, instruisto, esperantisto el urbo Shkodër, samaĝulo al Vasil Pistoli, eldonis alian lernolibron pri esperanto - instruado, akompanite de bonega vortaro albana-esperanta kaj esperanta-albana. Zef estis plenuminta kolosan laboron surkape de esperanto. Tiel, li kompilis grandan vortaron albana- esperanta- itala. estis tradukinte en esperanton tutan ciklon pri bravuloj kaj popolajn albanajn fabelojn. Tiutempe, li verkis regule por internaciaj revuoj.



La nederlanda esperantisto Jacques Tuinder dum vizito al Zef Mjeda, tiam grave malsana

Mi bedaŭrs ke en la jaro 1995, Zef publikigis en la ĵurnalo "Rilindja Demokratike" fiartikolon pri mi kaj Vasil, nomante nin "komunistaj esperantistoj". Kial li faris tion? Laŭ mia opinio, pro ia envieco kiu kaptas iamfoje eĉ elstarajn homojn, pensantaj ke oni estas preterladante ilin aŭ subestimante ilin. Pli poste, li pentis serioze pro tiu amoralo ago, nebazita.

Zef estas mortinta antaŭ multaj jaroj, mi ĉeestis lian entombiĝon kaj vizitis liajn kunfamilianojn kelkfoje. Bedaŭriunde, lia verkaro ankoraŭ ne estas publikigita ĉar la edzino Anjeze, jam forpasinta, hezitis senbaze kaj poste komisiis tiun taskon al persono ne rilatanta al esperanto, David Luka, kvankam universitata profesoro.

En la jaro 1993, Gafur troigis per siaj nekorektaj kondutoj (li misuzis nian asocion pro personaj materiaj profitoj). Tiam nia anaro kunvenis en Lezhë, urbo apud Shkodër, kaj elektis novan prezidanton, s-ron Vasil Pistoli (estranaroj: Agim Peraj-instruisto, Luan Jaupi - teknikisto, Gjergji Gusho- instruisto, Rita Përmeti- ekonomikisto kaj mi- instruisto). Ekde tiam, plivigliĝis la agado de nia asocio.

Nian laboron ni bazigis sur du kampoj: lernokursoj kaj propagando per preso kaj elektronika medio. Tiel ni starigis kursojn en universitato, en tutlanda fremdlingva mezlernejo "Asim Vokshi", en la pedagogia mezlernejo kaj, nature, ankaŭ en la lernejoj kie ni mem instruis (Tiranë, Lezhë, Durrës, Kukës, Pogradec).



Lernokurso en la tutlanda teknologia kaj turisma mezlernejo . Grupo de unua lernokurso en Durrës

Pli poste ni starigis lernokursojn ankaŭ en la elementaj lernejoj.

Mi memoras niajn universitatajn studentojn ĉe Filologia kaj Historia Fakultatoj. Estis komenco de 1993 jaro kaj albanoj ankoraŭ soifis vojaĝi eksterlanden. Tiel esperanto estis por ili ankaŭ ia rimedo por ĝui tion. Ni dividis ilin en du grupojn kaj eksinstruis Vasil kaj mi. Fine restis 22 studentoj, kiuj akiris atestilon pri la unua nivelo.

En la gimnazio "Sami Frashëri", apud la urbocentro, tiun posttagmezon la aŭlo plenŝtopiĝis de studentoj. Sed, kiel tio okazas ofte, fine akiris la atestilon nur 15 studentoj. Unu el ili, atestanto de Jehovo, rifuzis ricevi atestilon, ĉar tio, laŭ li, kontraŭstaris lian kredon!?

Somere 1995, 12 el tiuj studentoj ekskursis al Zagrebo (Kroatio), invititaj de tieaj junaj esperantistoj, gviditaj de fraŭlino Marija Beloŝeviĉ. Tie ili reekzameniĝis akirante plian atestilon.

Jaron poste, mi mem akompanis grupeton de miaj studentinoj dum ekskurso al Zagrebo, kie ni pasigis agrablan semajnon.



Sur la trageto Durrës- Ancona- Split kaj revene. En la gimnazio "Gjergj Kastrioti- Skënderbej" Durrës

Ĉikaze, ni konatiĝis ankaŭ kun albana komunumo loĝanta kaj laboranta en Zagrebo. Fraŭlino Marija vizitis Albanion en la ŝtorma (politike) printempo 1997 kaj aranĝis ekspozicion en Tirana.



Simpatia kurso estis malfermita ĉe unu privata firmao, "Karajani", kie mi deĵoris kiel tradukisto dum posttagmezoj. Partoprenintoj estis civitanoj je diversa aĝo kaj profesio. Kelkaj el ili fariĝis veraj esperantistoj (Zamir Gjurgji, Saimir Beqiraj ka).



Zamir Gjurgji




Luan Jaupi dum lecionhoro pri esperanto en Durrës

Kun miaj studentoj en la profesia mezlernejo, je periferio de ĉefurbo, ni aranĝis ankaŭ kunvenojn komunajn kaj la junaj esperantistoj de urbo Durrës. En unu el ĉi tiuj kunvenoj partoprenis ankaŭ elstara svisa esperantisto, s-ro Andy Kuenzli kaj bulgara esperantistino.

Nia asocio kreis instruistan fakon kiu membriĝis ĉe ILEI. Tri niaj junaj esperantistoj (Mimoza Bunjaku, Majlinda Grashi kaj Zamir Gjurgji) partoprenis trisemajnan seminarion en Svisio, sponzorizita de ILEI. Majlinda estis tre aktiva en Durrës, sed edziniĝinte, ŝi ĉesigis rilatojn kun nia movado.

Mi kaj Vasil intervjuiĝis dum tridek minutoj de ŝtata televido (1996) kie ni prezentis argumentojn favore kaj kontraŭ esperanto. Intervjuo organiziĝis ankaŭ ĉe albana nacia radio. Same oni publikigis artikolojn por landaj ĵurnaloj. En la sindikalista semajna ĵurnalo "Pasqyra", dum 13 numeroj, ni konatigis legantojn kur elementa kurso de esperanto.



Dum intervjuado en ŝtata televido, 1996. Propaganda aktiveco en Durrës, 1994

Post kelkaj jaroj, s-ro Vasil petis rezignon de sia posteno pro translokiĝo al Usono ĉe sia filo. Nova prezidanto elektiĝis s-ro Agim Peraj- instruisto de pentroarto, delonga aktivisto kune kun sia frato Bahri Peraj.



Bahri Peraj, Agim Peraj kaj Luan Jaupi (1991)



Kafejo "Esperanto" en plaĝo de Durrës (1992)

Bedaŭrinde, la agado de asocio ekstagnis, krom tio de la instruista fako, kiu eldonis regulan bultenon, komence surpapera, poste elektronika. En la jaro 2013 (februare) nia asocio registriĝis ĉe Tirana juĝejo kaj aliĝis oficiale al UEA. Nova prezidanto elektiĝis s-ro Shaban Hasani, inĝeniero pri konstruado.

Krom malmultaj membraj kotizoj, notindan helpon donis al nia asocio fremdaj amikoj esperantistaj.



Mi kaj Luan Jaupi, jaro 2018



Menciindas la membriĝo de germandevena esperantistino, s-ino Martha Heide Otto<sup>6</sup>.



Mi kun Martha kaj s-ro Astrit Leka, 94 jara, esperantisto el jaroj 50, (2018)

<sup>6</sup> Martha aktiviĝas ankaŭ en Baha'u laĥ asocio

Dum tiuj ĉi jaroj ni instigis junulojn partopreni en la internaciaj renkontiĝoj en Eŭropo, en konferencoj kaj kongresoj de UEA, TEJO, ILEI, eĉ en la religiemaj fakaj societoj esperantistaj. Grandan helpon donis al ni nederlanda esperantisto, s-ro Jacques Tuinder, fondinta bonfarantan organizaĵon EVIDENTE precipe por blinduloj ĉie en la mondo.



"Evidente" kontribuis notinde ankaŭ en Albanio, almenaŭ ekde jaro 1997. Ĝi provizis la porblindulan Instituton en Tiranë per literaturo en Brajlo, per skribmaŝinoj, komputiloj, same por rekonstruiĝo de internulejo, klasĉambroj ks, investinte ĉirkaŭ 500 mil eŭroj!



Mi kun s-ro Jacques Tuinder en la franceskana preĝejo en Shkodër dum jaroj 2000. Gafur Muço, Janko Pali, Marcel Cortriade kaj Luan Jaupi en Tirana (1991)

Post jaro 1999, mi kompilis lernolibreton de esperanto (la kvina laŭvice en Albanio, post Vasil, Zef, Gjergji kaj Agim) ĉar la unuaj metodoj elĉerpiĝis. Mi dissendis lernolibretojn ankaŭ en Kosovo, tuj post ties liberiĝo, somere 2000. Por eldono helpis italaj esperantistoj (persone s-ro Renato Corsetti). Novembre 2004 aperis regula lernolibro mia, je titolo "Ĉu vi parolas esperanton?".





Lernolibro. Luan Jaupi en vilaĝo Qeparo kun nia elstara malnova esperantisto Janko Pali (1992)

Tre utila agado nia estis la kunlaboro kun la turisma organizaĵo "Monda Turismo", centre en Bydgoszcz (Pollando) kaj AIS. S-ro Andrzej Grzebowski ofertis al ni akcepti studentojn el Albanio por "Altlernejo pri Turismo kaj Internacia Kulturo" starigita de li tie, ekde jaro 1991.



S-ro. Grzebowski mortis kelkajn jarojn antaŭe, dum UK en Buenos Ajres. En Bydgoszcz

Estis somero 1997, tuj post la tragikaj okazintaĵoj en Albanio pro tiel nomataj financaj fibankoj "Ponzi". Multaj junuloj abiturientoj esprimis sian deziron aliĝi. La unua grupo el 15 personoj komencis studojn en Bydgoszcz, sed bedaŭrinde plimulto el ili forlasis lernejon, pro senluziigo. Ilia celo estis elmigri okcidenten. La duan grupon el 15 studentoj akompanis mi mem, septembre 1998 kaj restis kun ĝi unu semajnon.



Foto farita en la aeroporto de Tirana, antaŭ ekflugo

Samtiel, post unu jaro, iris al Pollando la tria kaj kvara grupoj kun malpli da studentoj. Entute bakalaŭriĝis 25 studentoj, el kiuj du magistriĝis.



Mi kun grupo de polaj kaj albanaj gestudentoj en Bydgoszcz

Por iliaj diplomoj la studentoj elektis temaron el Albanio: kulturo, arkeologio, turismo, historio. Tiel, tra esperanto, Internacia Akademio de Sciencoj AIS, kiu liveras diplomojn, diskonigas Albanion en la mondo, je aspektoj kulturaj- turismaj.





Mi kaj Shaban kun skota esperantisto s-ro David Kelso en la kastelo de Kruja, 2004

Sugestite de nederlanda esperantisto s-ro Jacques Tuinder, mi instruis IL kelkajn longajn jarojn en la Instituto por Blindaj Gelernantoj en Tirana, ĉar tiu lingvo estas pli facile lernebla de ili. Unu el lernantinoj nun deĵoras en Tira urbodomo. Gelernantoj sekvis ankaŭ radioelsendojn de Pekino en esperanto!



Blindaj kaj duonblindaj gelernantoj



Jacques Tuinder honiriĝas per Medalo de Dankemo de nia prezidento Alfred Moisiu

Por mi estis tre alloga la agado de OSIEK (Organizaĵo de Sciencaj Internaciaj Konferencoj). Tie oni povas prelegi en esperanto pri diversaj sciencaj temoj. Komence mi estis invitita en OSIEK-konferenco en Rafina- Grekio en la jaro 1997. Sed mi ne sukcesis akiri vizon. Somere 1998, la

konferenco okazis en Trieste- Italio. Mi partoprenis ĝin. Mi vojaĝis kun mia edzino per trageto ĝis Ancona kaj poste trajne al Perugia kie studis miaj filoj.



En Trieste kun franca esperantisto Eric Laubacher. Dum seminario en klubo de Triestaj esperantistoj

Mia temo estis "Iliroj<sup>7</sup> en Romia Imperio". Mi parolis pri kontribuo de iliroj kaj ilia vivo en romia imperio. Kompreneble, mi tuŝis ankaŭ problemon de albanoj ekster Albanio kaj la rajton de albanoj de Kosovo por sendependeco.



Mi kaj mia edzino Vjollca dum marvojaĝo kaj en Perugia, Umbria, Italio

Tri jarojn poste, mi partoprenis denove konferencon de OSIEK en Trieste, akompanate de mia koleginino de beletro, s-ino Xhuma Ĉupa, kiu prelegis pri "Ciklo de Bravuloj ĉe albanoj, slavo kaj grekoj". Mi prelegis pri historio de albanoj.



---


<sup>7</sup> Antaŭintoj de albanoj



En esperantista klubo en Trieste. Dekstre s-ino Xhuma Çupa.

En la jaro 2005 la kuranta konferenco de OSIEK okazis en Rafina denove, sed la grekaj kolegoj rifuzis akcepti min. Edukitaj, ekde infanaĝo, per ŝovinismaj ideoj ili ne povis aŭdi pri albanoj kiel egalrajtaj dum historia evoluo, aŭtoktonaj en siaj teroj, ne malpli antikvaj ol grekoj mem...

Mi atendis someron 2006 por partopreni sekvan konferencon en Timiŝoara, Rumanio. Dum halto en stacidomo de Belgrado, mi renkontis du serbajn renomajn esperantistojn, Tereza Kapista-n kaj Dimitron. Mi prelegis en Timiŝoara pri "Albanoj inter Okcidento kaj Oriento".



Dum konferenco en Timiŝoara




En stacidomo de Belgrado kun serbaj samideanoj kaj en Timiŝoara kun italaj kaj francaj profesoroj

Samjare, juliofine, mi partoprenis UK - Florenco. Estis eksterordinara sperto. Mi akompanis du blindulinojn, sponsorizite de fondacio EVIDENTE, estrata de s-ro Tuinder. Mia pliaĝa filo venis al Florenco por renkonti min.



En Florenco kun mia filo kaj du albanaj esperantistinoj

Septembre 2007, mi akompanis denove grupon de studentoj al Bydgoszcz, Pollando.




En Bydgoszcz kun niaj studentoj kaj en la centro de Varsovio

Pro mia kunlaboro kaj helpo per prelegoj kaj artikoloj pri la albana kulturo kaj turismo, la altlernejo de Bydgoszcz liveris al mi du diplomojn.



Miaj diplomo kaj Dankletero

Somere 2008 mi partoprenis UK- Roterdamo (Nederlando) kun mia edzino. Denove sponsoris nian vojaĝon s-ro Tuinder.



En Roterdamo, parolante pri sendependeco de Kosovo kaj en la granda salono de Kongresejo

Somere 2010 mi partoprenis konferencon en Karlovo, ĉerande de montoj Balkan, Bulgario, organizita de s-ro Bojidar Ivanov. Mi ekkonis Bojidar-on en Bydgoszcz, kie li prelegis ankaŭ por nia studentoj. Li estis prudenta, klera, modesta viro. Tre dediĉita al esperanto. Mi memoras ke,

iutage, Boĵidar prelegis pri la alfabeto de la bulgara lingvo. Kiam li menciis la literon "ë" li diris ke "probable ni bulgaroj luis ĝin de albanoj".

Kelkfoje Boĵidar petis ke mi vizitu lin en Karlovo, kie li estis stariginta privatan universitaton en vilao bela kun granda korto kaj dormejoj. Mi revizitis lin en 2011 kaj estis ravita de pitoreska urbo je orienta arkitekturo, kun pavimitaj stratoj, kun restoracioj en la kortoj de privataj domoj, plenaj je verdeco. Boĵidar organizis tie sesiojn de AIS, kie partoprenis profesoroj esperantistaj el diversaj landoj. Ankaŭ mi prelegis du fojojn, pri "Interilato Matematiko- Filozofio" kaj "Amuza momento en la lecionhoro de matematiko".



Maldekstre, Boĵidar Ivanov. Dum vizito al Karlovo

Oktobrofine 2010 oni invitis min al Sarajevo (Bosnio) okaze de internacia konferenco pri la defioj de eŭropa integriĝo, organizita de tieaj esperantistoj, kie mi prelegis pri temo " Kion povus kontribui albanoj al Eŭropa Unio".


Aprile 2011, mi estis invitita de esperantista asocio de la regiono Alzaso-Loreno, Francio, por prelegi pri "Turismaj Aspektoj de Albanio". Mia gastiganto, s-ro Edmund Ludwig akompanis min dum vojaĝoj tra Alzaso-Loreno, inkluzive Strasburgon.



En Alzaso- Loreno, prelegante pri Albanio. Dekstre s-ro Edmond Ludwig

La revuo MONATO, kies korespondanto mi estas ekde la jaro 1991, motivigis min konatiĝi kun araba esperantisto aĝula, kies viva historio estis tre interesa. Estinte juna, en 1967, Husaain Al-Amily ege aktivis en la esperantista movado sed ankaŭ nun li kunlaboris kun Londona Esperanto- Klubo.





S-ro Hussain Al - Amily kaj lia libro en la albana

Lia patro estis libano dum la patrino irakianino. Mem Hussain laboris multajn jarojn en Irako, dum la periodo de regado de Sadam Husejn. Tie li menaĝis bizneson propran en malfacilaj kondiĉoj. Oni enprizonigis lin dum du monatoj. Ĝuste tiun vivoparton, li spegulis en la libreto "Prizona taglibro" kiu donis veran etoson de reĝimo. Sed min pli allogis alia, pli volumeca libro lia, "TREZORO". Temis pri proverboj kaj saĝaj anekdotoj arabaj. Mi proponis al li ke libron mi enalbanigu. Hussain konsentis, li eĉ pagis la koston por 500 unuaj ekzempleroj, eldonitaj de 'Univers', de la Albana Instituto pri Pensado kaj Civilizo Islama. Nia korespondo daŭris ĝis lia forpaso.



Familiaj fotoj de Hussain Al- Amily. Pri tradukaĵo de Araba Trezoro en la albana

## Novaj libroj

- **Nova libro de Ismail Kadare**



Engjell Gusho

Lastatempe, aperis nova romano de Ismail Kadare<sup>8</sup>, "Kiam regantoj kverelas". La aŭtoro konfesas ke li motiviĝis de telefon-konversacio inter Josif Stalin kaj Boris Pasternak<sup>9</sup>, siatempe. Laŭ aŭtoro, ankaŭ Pasternak- verkisto, estis iaspeca reganto.. La eldonisto priskribas momenton kiam naskiĝis tiu ideo de nia elstara verkisto.

La inicmotivo de nova libro de Kadare

Bujar Hudhri<sup>10</sup>

“Ĉe la pordo de instituta internulejo, mi vidis Jevtuŝenkon<sup>11</sup>.  
- Ĉu vi vidis Belan?- li demandis min.”

Ĉi tiun dialogon el la romano "La Krepusko" de Kadare, mi rememoris kiam, ĉe la ĉefelirejo de aeroporto Ŝeremetjevo, en Moskvo, ekaperis la elstara rusa poeto, Evgenij Jevtuŝenko. Li ĵus descendis el aviadilo, kun dorsoteko, tirante valizon kaj serĉante, certe, taksion. Mi ekpensis demandi lin:

"Ĉu vi vidis Kadare-n? Ĉu vi kunflugis?"

Mi bezonis iom da tempo por rekonsciiĝi kaj formuli ruslingve la demandojn, kiam fronte de mi venis Kadare mem kaj mi vidis kameraiston hastante por fiksi la ties alvenon, post duonjarcento, en Moskvo. Pro neonlampoj, lia vizaĝo aspektis pli laca kaj al mia insistado por ke li renkontu Jevtuŝenkon, Kadare respondis indiferece. Eble, mi pligravigis la aferon. La situacio solviĝis, kiam mi rimarkis ke la rusa poeto malfermis la postan pordeton de la taksio kaj tuj ekveturis. Ankaŭ ni enaŭtiĝis en luksa veturilo, ŝoforita de amiko de nia ambasadejo. Alvenis ankaŭ la kameraisto por fiksi, de ene, ĉi vojaĝon. La vojo ĝis la hotelo estis longa, je unu horon disde la centro. Ni veturis senparolante. Grupo de filmistoj el Tirana ŝtata televido estis alveninta por pretigi dokumentaron pri Kadare en Moskvo, grava stacio en la vivo kaj verkado de nia elstara verkisto..

Ankaŭ mi aliĝis, laŭ deziro de Kadare. En unu de antaŭtagmezoj niaj, ĉe barkafejo "Juvenilia" en Tirana, mi estis sugestinta, ke nepre ni devus filmi ankaŭ en Moskvo. Kaj jen, post monato, junio 2010, mi vojaĝas tra Moskvo kun Kadare, ankaŭ kun 22 - jara Kadare de "La Krepusko".

Tiom multfoje mi legis tiun romanon, kiom nun ŝajnis min, ke mi konis la stratojn, bulvarojn, stacidomojn, metroojn, monumentojn. Ĉiujn rolantojn, ties dialogojn. En ĉi tiu senfina urbo, kie mi piediris unufoje, ŝajnis min ke la solaj memoraĵoj kiuj ligis min kun ĝi, estis ja la paĝoj de ĉi tiu romano.

---

<sup>8</sup> Monde konata albana verkisto

<sup>9</sup> Monde konata sovetia verkisto

<sup>10</sup> Renoma eldonisto albana

<sup>11</sup> Renoma sovetia-rusa poeto

Tio estis la kialo, certe, ke mi insistis alveni ĝis ĉi tie. La morgaŭan matenon, ni iris al Instituto "Gorkij", kies aspektoj estis fiksitaj en la filmo de reĝisoro Piro Milkani<sup>12</sup>. Sed en mia menso plurestis la lasta tago, impresoj kiujn neniu kamerao apenaŭ povis kapti. Mi insistis tiam iri al la vilao de Pasternak, en Peredelkino. Devus rememori mem Kadare, probable, sed li, dum la tuta tempo de filmado, restis tute indiferenta, ĉu filmo fariĝis por alia verkisto, ne por li..Dume, la grupo de filmistoj, apenaŭ estis antaŭvidinta ĉi halton en la filmo. Mi rememoris pri tio en la aŭtilo de ambasadoro, kiu ege ĝojis ke ni irus al Peredelkino. Tial, mi bedaŭrinde rakontis lin pri mesaĝo sendita al mi de unu el ties subuloj, kiam mi interesiĝis pri vilao de Pasternak.

"Kial Kadare iru al la vilao de Pasternak? Ĉu serĉi la ostojn de Pasternak?"- skribis min tiu diplomato. Kaj pensu, ke li estis same studinta en Instituto "Gorkij"!

Post iom da tempo, antaŭ ni aperis la vilao de Pasternak. Mi estis vidinta ĝin dekfojojn en fotoj, filmoj, videoj. En ĉiuj sezonoj. Nun estis junio, verdecio kaj floroj kovris ĉion. La unua, alproksimiĝis ĉe la pordo de vilao, Kadare, kiu tutan vojon parolis neniun vorton, sed nun subite ekvigliĝis. Kaj komencis paroli ruse kun sinjorino, atendinta nin. Kadare estis dirante ŝin ke "li konis kaj renkontis en Parizo kelkfoje, Ira Emeljanova-n".

Mi sentis tuj ke io embarasiĝis. Kadare ne sciis ke la sinjorino, direktorino de domo-muzeo, estis edzino de filo de Pasternak, el unua edziĝo. Dum Ira Emeljanova estis filino de amatino de Pasternak. Mi aŭskultis ke ŝi parolis neĝentile, preskaŭ kolere.

"Ona sumashedĉaja- Ŝi estas freneza. Oni ne akceptas ŝin ĉi tie. Certe!".

Kadare skandaliĝis pro tia konduto. Li dorsoturnis ŝin kaj eniris. Kadare ne povus scii la kialon de tia stranga konduto. Por mi estis evidenta: plurfoje mi travivis tion en Tirana. Ofte, inter eldonistoj kaj heredintoj de verkistoj kaj tradukistoj, ne plu vivintaj. Ankaŭ Pasternak ankoraŭ ne eldonis sian kompletan verkaron. Certe, malkonsentoj inter liaj proksimuloj pro propretaj aferoj kaj koleretoj.

Ni supreniris, Estis dormoĉambro. Tro da silento. Ĉe la pordo pendis surmure la ĉapelo, palto kaj gumbotoj. Ili enviciĝis laŭ linio kaj ŝajnis, kvazaŭ Pasternak staris surpiede, dorsoturnante nin. Kvazaŭ ni enirus mortan areon. Mi turniĝis al Kadare kaj konstatis ke lia vizaĝo akiris purpuran koloron.

Ni subiris silente kaj troviĝis sur la unua etaĝo, ĉe la ĉambro kie forpasis Pasternak. Tie li ekkuŝis kaj neniam plu iris al sia dormoĉambro. Surlite, ĉiun tagon, oni ŝanĝis freŝan florbukedon. Surmure pendis du pentraĵoj de sia patro, Leonid Pasternak, amiko de Tolstoj.

Elirinte, la sinjorino profitokazis alproksimiĝi al Kadare kaj invitis nin iri al la tombo de Pasternak. Ni ĉiuj ekiris tien, kvazaŭ funebra procesio. Neniu parolis. Post ducent metroj, aperis tomboŝtonoj. Fronte de tomboj, estis la somera sidejo de patriarĥo de Rusio. Ĉe la tomboŝtono de Pasternak estis gravurita basoreliefo. Ni ĉiuj eksidis sur ligna benko. La silenton rompis nur la sinjorino, kiu, kvazaŭ por pardonpeti pro sia konduto, rakontis nin ion, kion ŝi diradis ne al ĉiu persono. Iufoje, kiam oni estis ŝanĝinta putrigitan trabon de benko, kie ni sidis, oni trovis subaŭskultilon, profunde de ĝi. Se la trabo ne rompiĝus, apenaŭ oni eksciis pri tio, kion faris KGB!

Ni revenis hotelon tre malfrue. Kadare iris al sia ĉambro, dum mi restis en la salono. Post nur duonhoro, li estis venante je mia direkto. Li ne povis dormeti posttagmeze. Eble, pro tuto li vidis kaj aŭdis en Peredelkino. Li eksidis ĉirkaŭ la tablo kun mi en la sola barkafejo, kiu estis en angulo de salono. Poste, ĉe akceptejo, mi rimarkis virinon tutsimila

---

<sup>12</sup> Elstara albana reĝisoro

al Helena Kadare. Ŝi babilis kun akceptistino kaj mi ne povis distingi ties vizaĝon. Kiel Euridicja kun Orfeo, diris mi ŝerce. Ne kapturnu!

Dum li subite, rememoris ke la televidilo en la ĉambro ne funkciis kaj petis min helpi iel. Ne plilongigante, ni prenis lifton kaj supreniris. Ĵus enirinte ĉambron, mi konstatis ke antena kablo estis falinda surplanke. Mi prenis ĝin kaj surmetis en sia loko. Kiam ekrana lumo enverŝiĝis al nia vizaĝoj, atentigis nin sekvencoj de nigra-blanka filmo. Sur unua plano: portreto de Pasternako. Poste, tiu de Anna Ahmatova. Post kelkaj sekvencoj, ankaŭ de ambaŭ ili. Estis dokumentara filmo pri la vivo de Pasternako.

Tio ŝajnis tiel nekredebla! Tuto, fine de tago dediĉita nur al Pasternak. Kvazaŭ ĝi estis scenaro kaj ni obeis ĝin punktpunkte.

Ni restis rigidaj, ne parolante eĉ duonvorton, ĝis kiam la filmo finiĝis. Pli poste, mi estas konversaciinta multajn fojojn kun Kadare pri tiu magia momento. Por konvinki nin ke tuto ĉi tio estis sonĝo, probable? Kaj kiel tio okazis? Kial ĝi koincidis? Kiel ni troviĝis ĝuste tiun momenton, kiam oni elsendis la filmon per la konata rusa kanalo "Kulturo"? Ne estas respondo. Apenaŭ povas ekzisti, eble. La sorto igis min ĉeesti en areo intermedia. Kie plektiĝis tempoj, lokoj, eventoj, rolantoj.

Tial, kiam Kadare enmanigis min la unuajn paĝojn de nova libro, tri jarojn antaŭe, min ŝajnis, kvazaŭ mi estus tie, en tiu hotelego, je digna nomo por ĝi, "Kosmoso". Kaj la unua kozo, kiu venis en mia menso, estis ke mi jam trovis la incimotivon de ĉi tiu libro. Mi kunestis kun aŭtoro en tiuj lokoj, pri kiuj oni skribis en manuskripto kaj tio ŝajnis min tiel natura pensi tiamaniere. Sed, ĉiun tagon pasinta, ĉi penso foriĝis de mi.

Ĉi libro inciris verŝajne de romano "Krepusko", aŭ de poemoj pri Loro, pri...Aŭ, ekde la momento kiam la redaktoro de lia unua libro diris lin, "kial vi ne havas poemon pri Moskvo?"<sup>13</sup> Ankoraŭ pli frue, eble. Ekde naskiĝo de verkisto mem. Ĉar Pasternak ĉi tie estas kvazaŭ lia frato, Kadare. Kun bela sorto, nature. Je nia bonŝanco. Je ĉiuj mondaj lingvoj.



Kadare kaj Hudhri

- [Nova esperanto traduko el albana literaturo](#)

<sup>13</sup> Temas pri poemaro de Kadare verkita ruslingve kaj publikigita en Moskvo en jaro 1958





Gjergji Gusho

Antaŭ nelonge aperis romano de Luan Starova "La tempo de la kaprinoj". La aŭtoro estas albano el vilaĝo Starive apud urbo Pogradec, de Albanio, translokiĝinta al Skopje (Makedonio) post la jaro 1945. S-ro Luan Starova estas elstara verkisto en Makedonio kaj vaste renoma en Balkanio.



**Panoramo de kuba popola muziko.** Jan-  
ny Quiñones Valdés. Embres-et-Castel-  
maure: MAS, 2017. 54p. 22cm. Ilus. ISBN  
9782369600909. Longa eseo pri muzikaĵoj  
kaj muzikiloj tipe kubaj. € 7,50

**Poemo de Utnoa.** Abel Montagut. s.l.:  
CreateSpace, 2018 (2-a eld). 251+7p.  
23cm. ISBN 9781718814424. Reviziita el-  
dono de unu el la ĉefverkoj de la originala  
Esperanta literaturo. € 11,40

**Tao de la vojaĝanto. Dek ses ĉinaj  
legendoj kaj infanraktonoj.** Majra  
Nuñez Hernández k.a. Embres-et-Cas-  
telmaure: MAS, 2018. 75p. 22cm. ISBN  
9782369601180. Legendoj reverkitaj en  
Esperanto. € 7,50

**Tempo de la kaprinoj, La.** Luan Arif  
Starova. En Esperanton trad. T. Chmielik,  
B. Selimi. Đurđevac / Świdnik / Lublin /  
Bjalistoko: DEC / BES / Libro-Mondo /  
Ars Libri, 2018. 120p. 24cm. Bind. ISBN  
9788363698218. Historia kaj alegoria,  
fantasta kaj folkloro, la romano situas  
tempe en la postmilita rekonstruperiodo  
de la jugoslavia Makedonio. € 18,00

**Zamenhof. Vida, obra e ideias do  
autor do Esperanto.** Alexander Ko-  
nenkov. En la portugalan trad. F. Pit-  
toro Velho: Temática, 2018. 196p. 18cm

## Recenzo

### *La Tempo de la Kaprinoj (1993)*

La romano *La Tempo de la Kaprinoj* (1993) konsistigas duan libron enkadre de projekto de aŭtoro "La libroj de la Patro" (Balkana Sagao). Siatempe, beletra makedona kritikisto Georgi Stardelov, skribis pri ĝi:

"Mi raviĝis, ekde la unua legado, de la romano, ne nur pro originaleco de ties temo, ne nur pro multaj subtavoloj sencaj kaj etikaj, sed ankaŭ pro beletreco, kie interplektiĝas la realo kun nerealo, historio kaj poezio, tragedio kaj parodio, realo kaj fikcio, epiko kaj liriko, tiu andriganana melankolio aŭ silenta kaj konata ironio ĉingovia, ĉio amalgamiita en artisma kaj estetika kompleksa tuteco."

Post prezentiĝo en la Senato de Francio, la 2-an de oktobro 1997, sub la patroneco de senatano kaj eksa ministro de justico Rober Badenter, la romano *La Tempo de la Kaprinoj* atingus certan "kongregacion". En la akto de promociiĝo oni rimarkus la ĉeeston de Moris Droun (laŭreato de la premio Gonkur por la plej bona romano), konstanta sekretario de la Franca Akademio, Adoniso, ka. Dum la prezentado de aŭtoro, Edgar Moren, substrekus:

" Mi substrekos kelkajn dominantajn ideojn de ĉi tiu verko. En la libro ĉeestas la ideo de potenco el periodo de komunismo, sed ankaŭ antaŭ ĝi. La fenomeno de potenco esprimiĝas tra sentimentoj ekzistantaj ekde la osmana periodo, laŭ kiuj, la popoloj d Oriento sentas potencon kiel fataleco, veninta el tre foraj tempoj, de grandaj altecoj, eĉ de mem Dio, kion oni nepre devas toleri kaj antaŭ kio ili restas ĉiam malfortaj. Sed estas io pli forta ol ĉi tio, ol la arbitraraj dekretoj de potenco, tio ja estas la konfeso, altrudita en la romano *La Tempo de la Kaprinoj*.

Kaj jen, Luan Starova, albano el Makdeonio, estas aŭtenta reprezentanto de la balkana kunvivado kaj sincereco, la homo kiu, dum tuta sia vivo, donas sencon al balkana frateco, sen iu ajn etna enfermiĝo, kunfrontiĝante al ĉiuj ideologiaj aberacioj, same kunfrontiĝita al antagonismo de etneco kaj religia konduto.."

La senatano Rober Badenter en tiu renkontiĝo de Senato de Francio, interalie, diris:

"Estas sciite ke beletra talento ne kontraŭdiras al altaj diplomataj funkcioj. En la franca beletro estas multaj kazoj, tiaj pravigantaj ĉi konstaton. Luan Starova, ambasadoro de Respubliko de Makedonio en Francio, aŭtoro de granda verko, kiun ni bonŝancis havi, tradukite majstrece de alia diplomata plumo, estas ja plia atestaĵo por tiu konstato, kio ebligas adekvate kompreni la nuntempon".

La romano *La Tempo de la Kaprinoj*, en la jaro 1999, kun antaŭkonduko de Vasili Vasilkos, eldoniĝis ankaŭ en greka lingvo de "Patakis" kaj eĥadis vaste en grekaj medioj.

En la antaŭkonduko de greka eldono, la verkisto Vasili Vasilikos, konata ankaŭ kiel scenaristo de fama filmo de Kosta Garvrasis "Z", interalie, substrekis:

" Mi jam tralegis plezure la romanon *La Tempo de la Kaprinoj*. Aparte min surprizigis la simboleco kaj tenereco de la romano. Estas ja ĝi la unua romano de aŭtoro, Luan Starova, legita de mi. Li posedas kvalitojn de denaska verkisto. Mi estas feliĉa ke mi legis ĉi belan libron pri nia kara Balkanio"

La romano La Tempo de la Kaprinoj akceptiĝis bone ankaŭ en Kroatio. Ĝi eldoniĝis kiel parto de kolekcio de hit-romano de eldonisto "Znanje", tradukita de Mate Moras, bone konata tradukisto de Rable kaj Ŝekspiro. Ĉi tiu romano, multajn jarojn post ruiniĝo de iama Jugoslavio, estis unu el raraj romanoj eldonita en Kroatio kaj, apartmaniere, atentigis la beletran kritikon.

Poste la romano eldoniĝis ankaŭ en Buĥaresto de verkistino kaj tradukistino Ana Andresku kaj promociiĝis en la Ligo de Verkistoj de Rumanio, fare de verkisto Vasile Andru. En la jaro 2000 la romano La Tempo de la Kaprinoj, kune kun la Libroj de la Patro, eldoniĝis en turka lingvo en Istanbulo, de konata turka eldonisto "Japi Kredi", promociita de Nedim Gursel, je la ĉeesto de romanisto, poste nobelisto Orhan Pamuk.

La bulgara eldonisto el Sofio "Biblioteka 48" ĉi tiun romanon eldonis bulgarlingve en la jaro 2012. La albanan version de la romano La Tempo de la Kaprinoj, Starova eldonis en la jaro 2004. Ĝi promociiĝis en Akademio de Sciencoj de Albanio en Tirana.

La eldonejo "Piront" kun antaŭkonduko de Edgar Moren, eldonis la romanon ankaŭ en Italio, kie sekvis dua eldono.<sup>14</sup>

Jen kion skribas akademiano Nullo Monisi"

" Ankoraŭfoje. laŭ ekzemplo de ĉi tiu sagao, atestiĝas ke la arto pli bone ol historiografio prilumigas epokon tiel proksiman al ni, sed ankaŭ tiel foran, samtempe"

La romano La Tempo de la Kaprinoj eldoniĝis ankaŭ en angla lingvo (Usono), en germana, hispana, slovena, pola, esperanto kaj en aliaj lingvoj. Ĝi nomumiĝos ankaŭ por prestiĝaj eŭropaj premioj, kiel plej bona romano eldonita en Francio, rekompenco "Angellus", plej bona romano de Centra kaj Okcidenta Eŭropo eldonita en la pola, rekompenco "Zhan Mone", kiel plej bona eŭropa romano, kc.

## Instruado

- Madragoa

[https://www.youtube.com/watch?v=V\\_W\\_LW5t8A0](https://www.youtube.com/watch?v=V_W_LW5t8A0)  
<https://www.youtube.com/watch?v=Y5P0bji1BGA&t=69s>

VIDEOKURSO DE ESPERANTO - LA 7-A LEClONO (TRANSITIVAJ VERBOJ KAJ LÁ REKTA OBJEKTO)

VIDEOKURSO DE ESPERANTO - LA 8-A LEClONO (LA VERBO EN LA PREZENC0

---

<sup>14</sup> La romanoj La Libroj de la Patro kaj La Tempo de la Kaprinoj eldonigxis en 2012 ankaux en Usono, tradukite de akademiano Kristina Kramer



<https://www.youtube.com/watch?v=KLk5YM5pvOs>

**tejo**

“Mi eklernis Esperanton por lerni  
ion facilan kaj havi internacian  
rondon de amikoj. Nun, ĝi estas mia  
ĉiutaga lingvo, mia hejma lingvo.”

—*MARIA MICKLE*

<https://jotakaeme.blogspot.com/2018/11/esperanto.html>

<https://www.youtube.com/watch?v=zB3iGSz>

ĜOg

- **Sugestoj por la decembra Inform-bulteno de belga sekcio de AED**



Germain Pirlot

Jen denove ebleco alparoli geinstruistojn/kolegojn pri ILEI kaj efika uzado de Esperanto kiel interlingvo.

Ĉar ŝi estas tre kontenta pro via efika kunlaborado, la redaktistino de la Informbulteno de la belga sekcio de AEDE (*Association Européenne Des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj*) havas novan sugeston.

Post diskutoj kun diversaj instruistoj kadre de la Salono pri Edukado (3-7 okt.) ŝi pensis por la **decembra “Informbulteno”** pri dosiero rilate al la **sciencia edukado en Eŭropo**, des pli ke, en Belgio, la manko de sciencaj talentoj estas vera problemo por certigi la misiojn de bone evoluinta ekonomiscio.

Do jen kelkaj demandoj pri la situacio en eŭropaj landoj :

- kiel estas alparolitaj la sciencaj temoj : ekde la elementa lernejo? teorie? praktike, per eksperimentoj kaj vizitoj?
- pri kia aparataro disponas la lernejoj por tia lernado?
- kia estas la trejnado por la instruistoj?
- kiaj estas la rezultoj ĉe la lernantoj? ĉu la sciencaj studoj pli allogas la pli 16-jarulojn?

Kompreneble vi povas aldoni aliajn sciigojn pri tiuj sciencaj faktoj.

Kiel kutime mi devus havi viajn komentojn **ĝis la fino de novembro**.

Antaŭdankon pro via grava kunlaborado kaj eventuala transsendo informcele.

Post trafa rimarko de kolegino, mi devas klarigi ke la temo “**sciencia edukado**” rilatas al jenaj kursoj :

**biologio, kemio, fiziko.**

Do jen kelkaj **demandoj pri la situacio en eŭropaj landoj** :

- kiel estas alparolitaj la sciencaj temoj : ekde la elementa lernejo? teorie? praktike, per eksperimentoj kaj vizitoj?
- pri kia aparataro disponas la lernejoj por tia lernado?
- kia estas la trejnado por la instruistoj?
- kiaj estas la rezultoj ĉe la lernantoj? ĉu la sciencaj studoj pli allogas la pli 16-jarulojn?

Kompreneble vi povas aldoni aliajn sciigojn pri tiuj sciencaj faktoj.  
Kiel kutime mi devus havi viajn komentojn **ĝis la fino de novembro**.

Antaŭdankon pro via grava kunlaborado kaj eventuala transsendo informcele.

Mi esperas ke, por la decembra Inform-bulteno de la belga sekcio de AEDE, eblos ricevi informojn el via lando pri la instruado de la natursciencoj (**biologio, kemio, fiziko**).

Temas pri jenaj demandoj, kiujn mi jam dissendis :

- kiel estas alpaŝitaj la sciencaj temoj : ekde la elementa lernejo? teorie? praktike, per eksperimentoj kaj vizitoj?
- pri kia aparataro disponas la lernejoj por tia lernado?
- kia estas la trejnado por la instruistoj?
- kiaj estas la rezultoj ĉe la lernantoj? ĉu la sciencaj studoj pli allogas la pli 16-jarulojn?

Kompreneble eblas respondi nur al kelkaj el ili kaj sen tro da detaloj (10-15 linioj).

Estas ideala okazo alparoli fakajn geinstruistojn pri la valoro de Esperanto kiel interlingvo.  
Ĉu ne?

Indas substreki ke tiu franclingva AEDE-sekcio ne arigas informojn pere de aliaj AEDE-sekcioj, sed PER Esperanto, kiel tio jam okazis pri la lernejoj edukistoj kaj pri la instruado de fremdaj lingvoj en Eŭropo. Eblas konkludi ke ILEI-sekcioj multe pli efikas ol la AEDE-EAI-sekcioj.

(\*)AEDE/ Association Européennes des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj.

Laŭeble mi havu informojn ĝis la fino de novembro.  
Antaŭdankon pro via gravega kunlaborado kaj por eventuala transsendo.

Kore kaj kolege via, Germain Pirlot

- Respondo

La sciencaj konceptoj estas instruataj teorie, sed la lernolibroj entenas ekzercaron kaj sugestojn pri la praktika agado

La laboratorioj (aparataro) de lernejoj ne ĉie konformas al la lernejoj programoj

La instruistoj devas kontinue interesiĝi pri ilia profesia kvalifiko ĉe agentejoj pri instruista trejniĝo, kies moduloj estimiĝas de speciala komisiono starigita de Ministerio pri Edukado

Gravan rolon ludas tiucele ankaŭ la Instituto pri Trejniĝo de Instruistoj

Ĉiu instruisto devas akiri almenaŭ unu krediton jare, t.e. tri tagoj da trejniĝo

Parto de lernantoj akiras altajn rezultatojn

La sciencaj subjektoj aparte en 12-a klaso kie estas pli da elektoeblecoj elektiĝas de mem

lernantoj laŭ iliaj preferoj pri studfakoj en universitato, kie oni postulas altajn rezultatojn en koncernaj subjektoj.

Raportis s-ro Mg. Koço Josifi, ĉe Instituto pri Trejniĝo de Instruistoj, Tirana, Albanio


## Artikoloj

- Hori Jasuo

### **Tertremo en Japanio**

La 23an de septembro 2018

Danĝerego de la nuklea centralo Tomari



### **Granda tertremo okazis**


Je la 3a kaj 8 minutoj la 9an de septembro okazis granda tertremo en la suda parto de Hokajdo.

En Japanio ofte okazas tertremoj. La registaro kaj sismologoj esploras, kie estas aktivaj faŭltoj, kaj faras mapon pri tiuj, sed tiu ĉi tertremo okazis, ne laŭ tiuj konataj faŭltoj, sed laŭ nekonata faŭlto. Tio signifas, ke estas multegaj nekonataj faŭltoj en la japana insularo, sekve ĉie povos okazi grandaj tertremoj.

Mi vidis en televido la damaĝojn, kaj mi tre surpriziĝis pro nekredebla nombro da terfaloj kaŭzitaj de la tertremo. Ĉiuj montoj estis kvazaŭ skrapitaj per grandegaj ungoj (foto en la sekva paĝo). Vulkana cindro, kiu kovris la montojn, subenglitis pro la tremegoj kaj mortigis ĉirkaŭ 40 homojn, detruante iliajn domojn. Tio ne estas nur la problemo de Hokajdo, ĉar Japanio estas

vulkana insularo kaj ĉie estas similaj terrenaj formoj.

**Terfaloj okazis en multaj lokoj.**







Alia surprizo estis, ke okazis terlikviĝoj en la ĉefurbo Sapporo 50 kilometrojn for de la epicentro. Tie, pro la aktiviĝinta subtera akvo vojo sinkis kaj domoj kliniĝis.

La tertremo kaŭzis alian grandan problemon. Tio estas paneo de tri **termoelektraj** generatoroj de la elektra kompanio Hokajdo (mallongigita nomo, Hokuden) en la urbo Acuma, sub kiu okazis la tertremo. Tiu centralo liveris duonon de la bezonata elektro en Hokajdo. La paneo influis aliajn malgrandajn generatorojn, kaj sekve ĉiuj generatoroj de Hokuden haltis. En la moderna vivo homoj ne povas vivi sen elektro. Fabrikoj ne povis funkcii,

bovistoj ne povis melki, sekve bovinoj mortis pro mammalsano, hospitaloj ne povis kuraci malsanulojn, resume ĉiuj funkcioj haltis kaj la ekonomio suferas multe. Eĉ nun elektra liverado ne estas sufiĉa kaj ne stabila, do la loĝantoj vivas en maltrankvilo.

Ankaŭ la nuklea centralo Tomari, kiun Hokuden posedas, suferis, perdinte la tutan elektran fonton el ekstere kaj dume ĝi devis dependi de memproduktita elektro. Feliĉe, tiam ĉiuj reaktoroj ne funkciis pro ekzamenado. Se ili funkciintus, tio kaŭzintus denove grandan nuklean katastrofon.



La nuklea centralo Tomari

En la nuklea centralo Tomari estas tri nukleaj reaktoroj.

	Sistemo	Ekfunkcio	Produktkvanto	Nuna stato
N-ro 1	PWA	1989.6.22	579 mil kW	ekzamenata

N-ro 2	PWA	1991.4.12	579 mil kW	ekzamenata
N-ro 3	PWA	2009.12.22	912 mil kW	ekzamenata

\*PWA : premakva reaktoro. Ĉiuj nukleaj reaktoroj en Fukuŝima estas alispecaj bolakvaj reaktoroj.

Mia amiko pledos en la tribunalo

Kontraŭ ĉiuj nukleaj centraloj en Japanio estas protestaj agadoj. Ankaŭ en Hokajdo estas movado kontraŭ la nuklea centralo Tomari kaj oni akuzas Hokuden-on, postulante forĵeton de tiu centralo. Mia konato, s-ino Higuĉi Minako, kiu agadas dekomence kontraŭ tiu centralo, pledos en la tribunalo Sapporo la 9an de oktobro. Ŝi sendis al mi informon pri tio kaj ankaŭ la tekston por ŝia pledado. Ŝi prezentas sin jene:

Mia nomo estas Higuĉi Minako. Mi respondecis pri la informilo de « Societo agadanta por forĵeti la nuklean centralon Tomari » ekde junio 2011 ĝis junio tiun ĉi jaron.

Kiam ni decidis meti la kazon en la tribunalon, ne estis sufiĉe da kunlaborantoj, do mi kaj aliaj du laboris per telefono kaj retmesaĝoj por tiu laboro. Kiam ni sukcesis kolekti 612 homojn kiel akuzantojn, mi estis tre ĝoja. Nun ni havas 1233 akuzantojn.

Mi neniam forgesas la akcidenton en Ĉernobil en 1986. Eĉ en fora Hakajdo falis nukleaĵoj. Kelkajn tagojn post la akcidento mi naskis la unuan bebon. Por protekti ĝin kaj nin, kiel zorge mi elektis manĝaĵojn! Por disvastigi informon pri la danĝero de la nuklea akcidento, mi komencis eldoni etan informilon « Ginga Cuuŝin » (Informilo Galaksio), kaj tiun ĉi jaron estas la 30-jariĝo de la informilo.

Mi ne estas sperta en publika parolado, sed kiel unu el tiuj, kiuj spertis la ĉi-fojan senelektran, tute malluman vivon, mi parolos pri la temo “La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari”. Ĉiuj povos ĉeesti ĉe la juĝado. Mi atendas vian ĉeeston.

- **Alianco por protektado de teatro luktas por gardi albanan kulturen heredaĵon**



Albana nacia teatro

### Lukto por protekti Nacian Teatron de Albanio

Dum pli ol tri monatoj artistoj, aktivuloj kaj ordinaraj civitanoj protestas ĉiutage en la ĉefurbo de Albanio, Tirana, responde al registara decido por detruo de historia monumenteca domo. La plano de la registaro celas anstataŭigi ĝin per nova moderna domo proponita de la dana arkitekto Bjarke Ingels.

Temas pri publika-privata partnereco kie la albana registaro ofertas grundon al la kompanio Fusha por plue disvolvi kaj plilarĝigi la konstruareon.



Protestoj por ke prezidento nuligu la specialan leĝon pri teatro

Por legitimi partnerecon la registaro proponis Specialan Leĝon februare 2018 (moknomita Leĝo Fusha) kiu favoris prokuratorojn kaj kontraktojn tiajn.

La parlamenta opozicio rifuzis la leĝon, plendante ke ĝi malrespektas la konstitucion kaj la Stabligan Asociecan Interkonsenton (SAA) de la jaro 2003 kun Eŭropa Unio, ĉar ĝi rompas la kriterion de merkata konkurenco.

Plimulto en la Parlamento, konsistanta el socialistoj, voĉdonis favore al la leĝo (junie 5, 2018, spite je ĉiuj opoziciaj leĝaj argumentoj.

Kiam novaĵoj pri planita speciala leĝo anonciĝis, artistoj kaj aktivuloj kreis Aliancon por Protekti la Teatron kiel historian savindan domon.

Publikaj aŭdicioj kreas pli profundajn dividojn

Post anonco de la leĝo, Alianco daŭrigis la protektadon de la Nacia Teatro. La Tirana urbestro organizis tri "publikajn aŭdiciojn" flanke de la Ministrejo pri Kulturo por aŭskulti "grupajn plendojn". Tamen observantoj aludis, ke tiaj orkestritaj aŭdicioj estis por krei pli da malkonsentoj ol unuecon.

Dum la aŭdicioj, la direktoro de la Konstrua Instituto, Agron Hysenliu, apelaciis ke "la agado en la teatra domo devas ĉesi, ĉar tie mankas teknikaj kondiĉoj de sekureco laŭ necesaj standardoj", laŭ ĉi tiu ŝtata agenteja estimado. Tamen la instituto neniam sciigis al la publiko ĉi tiujn estimaĵojn, plue instigante dubojn pri tiaj plendoj.

Peticioj, kontraŭpeticioj, propagando





Civitanoj subskribas peticion por protekti la Nacian Teatron

La Alianco akiris rapide subtenon de naciaj publikaj figuroj, historiistoj, akademianoj kaj ĵurnalistoj. La asocio de albanaj arkitektoj same deklaris sin kontraŭ detruo de la teatro, substrekante estetikan valoron de ĝia racionalista arkitekturo.

Ili petis la registaron ne forviŝi kolektivajn memoraĵojn de generacioj kaj ke iu ajn teatro estus bonvena, sed oni ne devus detrui ĉi malnovan domon.

Ili same faris peticion argumentante, ke teatro povus ripariĝi kaj neniu oficiala dokumento pruvas la malon.

Tamen kelkaj artistoj, favoraj al konstruo de nova teatro, faris deklaron subtene al la Speciala Leĝo. Ĉi deklaro ricevis kelkajn falsajn subskribojn de personoj, kiuj vivis eksterlande.

Dume la ŝtato propagandis insiste, ke la neglektita teatro prezentas danĝeron por artistoj, kiuj ludas tie, pretendante ke domo mem havas nenan kulturalan valoron. Fakte ili diris, ke la domo estis starigita dum la faŝista periodo (1939-1943), kiam ĝi servis kiel "kultura domo" (itale 'dopo lavoro', aŭ 'laborista klubo'), poste ŝanĝis sian celon.

Historiistoj Rubens Shima, Aurel Plasari kaj aliaj rifuzis tian argumenton, dirante ke ĝia 73-jara historio devas konserviĝi kaj esti respektata digne.

"Eĉ la (komunisma) diktareco ne detruis ĝin", skribis Plasari.

Per 16 milionoj da eŭroj (19 milionoj da USD) aŭ 1 procento de ŝtata budĝeto, la jara albana fonduso por arto kaj kulturo estas la plej malgranda en la regiono. Membroj de la Alianco pretendas, ke la teatra amortiziĝo kaj manko de mono por restaŭracio estis intencita afero .

Ili fingromontras al la nuna ĉefministro Edi Rama, kiu intencis detrui la domon ekde la jaro 1998, kiam li deĵoris kiel ministro pri kulturo, junularo kaj sportoj. Tiam li fermis la teatron, sed la ĉefministro de Albanio, Pandeli Majko, decidis kontraŭ ĝia fermiĝo. En la jaro 2002, kiam Rama fariĝis urbestro de Tirana, li anoncis evoluplanon, kiu detruus la teatron kaj antaŭvidis anstataŭan konstruon de pluretaĝaj turoj. Ankaŭ tiam la artistoj estis pli unuiĝintaj kaj dupartia peticio postulis konserviĝon de la domo.

Institucia vakuo, limigita internacia subteno

En la jaro 2016 Albanio ŝanĝis trionon de sia Konstitucio kaj kreis jurajn reformojn, kiuj estigis institucian vakumon, kie granda nombro da juĝistoj kaj prokuratoroj estis deklaritaj ne taŭgaj pluteni siajn postenojn kaj estis forpelitaj.

Konforme al EU ĉi tiuj reformoj estis konsideritaj sukcesaj, ĉar tio forviŝis la korupcion. Tamen multaj superaj postenoj ene de la juristaro restis malplenaj, eĉ de la Konstitucia Juĝejo. Tial maleblas defii la Specialan Leĝon konsideratan nekonstitucia de multaj homoj en ĉi cirkonstancoj.

Eĉ la albana prezidento rifuzis subskribi la leĝon kaj redirektis ĝin al la parlamento, sed li nur unufojon havas la rajton por redirekti la leĝon por plua diskutado, kaj li ne plu povas fari tion, se la plimulto voĉdonas denove por la leĝo.

Observema organizaĵo 'Docomomo International' baraktanta kontraŭ modernistaj monumentoj dissendis unuan internacian alvokon kontraŭ detruo de la teatro per malferma letero instigante aŭtoritatojn konservi la domon.

En la kunteksto de eksterordinara aktuala transformiga kaj renoviga periodo en la urbo kaj ekde kiam rekonstrua plano de la teatro kaj de ĉirkaŭantaj areoj estas aprobita por la Albana Nacia Teatro kaj la ĉirkaŭaj kvartaloj, Docomomo plimulte insistas ke oni atentu pri la novaj planoj por ĉi tiu kultura centro, kiuj intencas detrui ĝian originalan integrecon. La nova moderna domo je 9300 kvadrataj metroj lokiĝos en la koro de la urbocentro tute apud la Nacia Operejo kaj la Nacia Arta Galerio, anstataŭigante la originalan teatron.

Ankaŭ 'Nostra Eŭropo' sendis malferman leteron al la albana registaro, nomante la detruon alarmiga decido.

"Barako" senvalora aŭ trezoraĵo?



Mi estas la teatro-diras protestantino portante afiŝeton en Tirana

Spite multnombrajn plendojn de grandaj organizaĵoj kaj institucioj la urbestro Erion Veliaj daŭrigas nomante la teatron "barako", kiun ne indas ripari.

Krom peticioj kaj leteroj senditaj kaj kontaktoj kun EU-stabanoj, la Alianco faris publikan deklaron por substreki plurajn problemojn pro la Speciala Leĝo.

Tamen Albanio ankoraŭ ne estas membro de EU, sed ĝi subskribid Stabiligan Asocian Interkonsenton kun EU kaj eniros traktadojn, junio 2019.

La aktivuloj diras ke se Albanio fariĝus EU membro, tiam Speciala Leĝo perfortus la SAA Interkonsenton. Ili substrekas, ke la parlamenta plimulto malrespektas la albanan konstitucion per enhavo de la leĝo kaj per nekonstituciaj proceduroj.

Oficistoj de EU respondis pri la Speciala Leĝo, agnoskante ke "ili ne kompetentas por sin okupi pri Speciala Leĝo konforme al la albana leĝa kadro". Tamen ili "kuraĝigas la albanan registaron prikonsideri la principojn de EU kaj certigi nediskriminaciantan merkatan konkurecon".

Kvankam EU estis unu el la ĉefaj sponsoroj de la albana jura reformo, ĝi preteratentas la fakton, ke kreiĝis institucia vakuo ĉi tie.



Aktoro Neritan Liçaj direktanta mesaĝon al la ĉefministro

Kvankam la preciza dato de detruo estas nekonata, ĝi povas okazis ene de tri monatoj. Kelkaj Aliancaj membroj diras, ke ili blokos la alvenon de detruaj laboristoj eĉ per siaj korpoj se necese.

Ili komprenas tion kiel la solan rimedon por atingi la celon de saviĝo de albana kultura trezoraĵo.

Redaktora noto:

La aŭtoro de ĉi tiu skribaĵo estas aktiva membro de Alianco por Protekto de Teatro

Enesperantigis: Bardhyl Selimi

- 

### **Aglino- la plej pratempa simbolo de kredo en Eŭro-Azio**



Fatbadha Demi

Aglino, simbolo administra en la historio de reĝlandoj kaj ŝtatoj



Surbaze de rapida esploro sur interreto oni konstatas ke hodiaŭ aglino reprezentas, kiel ŝtata simbolo, Albanion, Montenegron kaj Moldavion, ne menciante ŝtatojn, kie ĝi estas blazono de armeaj institucioj.

La uzado de ĉi tiu simbolo kiel flago, kiel identigilo de kavaliroj, okazas aparte en Centra kaj Orienta Eŭropo dum XII jc kaj kiel emblemo, je la fino de XIV jc, fare de okcidenta elito, de nobelaro, burĝaro kaj pli poste, de korporatoj de diversaj artefaritejoj kaj socioj.

Kiel simbolo de ŝtatpotenco, figuro de aglino en Eŭropo uziĝis de : Sankta Romia Imperio (jaroj 63 antaŭ Kristo ĝis 476 post Kristo), Bizanco (333-1453), de Karlo la Granda (742/748- 814), de Sankta Romia-Germana Imperio, ampleksinta tutan Centra Eŭropon (962-1806), de Napoleono (1804-1814), same ĉe kelkaj mezepokaj princlandoj kaj reĝlandoj.



1. Religiaj simboloj sur lanco tenata dum bataloj de romia armeo, ĉe kies supro kuŝas aglino. 2. Toledo, la blazono de katolikaj reĝoj kun la simbolo de aglino kaj sagoj de Zeŭso, dekstre. La cirklo surkape esprimas diecan naturon kaj ties perantan rolon kun Dio.

En la teritorioj de Arbroj <sup>15</sup> la dukapa aglino estis blazono de nobelaj pordoj de Gropaj, Muzakaj, Aranitoj, Kastriotoj <sup>16</sup> kaj la aglino kun unu kapo de Zakarioj kaj Buzëzezoj <sup>17</sup> kaj de la ŝtato de Gjergj Kastrioti Skënderbeu <sup>18</sup> (1443-1468)

---

<sup>15</sup> Albanoj

<sup>16</sup> Albanaj nobelaj familioj





Vula e Skënderbeut.

1. Blazono de ŝtato de Skënderbeu kaj ties stampo, kie oni distingas la literojn D kaj AL (Dominus Albanus- Estro de albanoj).

Pjetro la Unua (1682-1725), fondinto de nova imperio oriente de Eŭropo, same uzadis la figuron de aglino, sed je ora koloro, distinge de nigra koloro ĉe dinastio de Romanovoj el XVII jc, sekvota de Bulgario, Hungario, Montenegro ka.

Sed ankaŭ multaj sportaj kluboj, inkluzive de tiuj hodiaŭaj, futbalaj, sin prezentis per ĉi tiu simbolo, ekzemple tiu de urbo Aquila, Katanzaro kaj Lacio en Italio. Ne malmultas futbalistoj kiuj esprimas siajn emociojn per signo de aglino, kiel "signo de venko".



Hispanio venkis 6-0 kontraŭ Kroatio dum Ligo de Nacioj, kaj ties futbalisto Sergio Ramos faris simbolon de aglino en urbo Elĉe.

Historiografio difinas du fontojn el kiuj estas luita la simbolo de aglino el mezepokaj reĝlandoj:

1. Romia Imperio por Okcidenta kaj Centra Eŭropo
2. Bizanca Imperio de dinastio de Paleologoj el XV jc, por Orienta Eŭropo.

Do, la aglino estas uzita ekde jarcentoj de plej potencaj historiaj imperioj de malfrua periodo de Eŭropa Pratempe kaj Mezepoko sed ankaŭ de reĝoj, princlandoj kaj nobelaj familioj. Ankaŭ en

---

<sup>17</sup> Albanaj nobeloj

<sup>18</sup> Reĝo kaj nacia heroo de albanoj en XV jc

modernaj tempoj ĝi estis unu el plej avidaj simboloj por atesti "historiajn ligojn" de eŭropaj popoloj kun pratempaj imperioj aŭ "kiel esprimo de ties forto kaj dieca helpo" en la militistaj formacioj.

Substrekendas la fakto ke en Eŭropo la aglino estis simbolo uzata de elitoj de ŝtatpotenco, kiuj inspiriĝis de mitoj kaj arkeologia heredaĵo de pratempo. Same evidentiĝas ke ĉi tiu figuro ne reprezentis ĉefan simbolon en la religia kaj kultura tradicio de ties civitanoj. Do, tiu simbolo estas luita de ĉi tiuj elitoj. Pere de geedziĝoj kaj privilegia sistemo, Bizanco donacis la imperian simbolon (de aglino) al nobelaro de reĝlandoj integritaj en ĉi tiu multetna imperio kiel al: rumanaj, bulgaraj, germanaj, rusaj, serbaj, grekaj, albanaj princoj, ka. Tial, ĉi tiun simbolon uzadis dekduo de ŝtatoj, kiuj iamtempe havis kulturajn kontaktojn kun Bizanco.

Dumtempe, ĉi tiu simbolo aperas kiel simbolo de Ortodoksa Eklezio, rekta posteulo de Imperio de Oriento, Bizanco.

En ĉi tiu "luado" de figuro de aglino, kie erare oni mencias ankaŭ princlandojn de Arbroj, esceptas nur tiuj reĝlandoj, princlandoj, familioj kaj armeoj de gentaj komunumoj kaj popoloj kiuj, per simbolo de aglino, esprimis sian nacian karakteron.

Por kompreni la kialon de la aparta loko kiun okupis la figuro de aglino en la eŭropa historio, precipe ĉe ŝkiptaro-arbroj<sup>19</sup>, decidan rolon ludas metodologio de studado prikonsideranta:

1. Ni ne ekiru de dokumentoj el mezepoka periodo kaj malfrua pratempo (temas pri Romia Imperio) kiel ofte okazas.
2. Aglino ne devas konsideriĝi simple 'montara birdo', sed kiel simboleca figuro de homa mondkoncepto, ampleksanta en sia esplorado senlimajn spacojn ŝtatajn kaj ĉe popoloj kiuj atestis kontinuecon de iliaj survivado dum miljaroj, nomumitaj hodiaŭ "naturaj popoloj", aŭ jam malaperintaj, sekvante solan padon eblan- ilian inican Lingvon kaj Kredon en Eŭro-Azio (antaŭhistoria mediteranea Eŭropo).

Kiam mi akcentas "lingvon" kaj "kredon" mi prikonsideras fakton ke ambaŭ tiuj fontoj estas dokumentitaj en multaj hodiaŭaj sciencoj, kiel en arkeologio, mitologio, historio, lingvistiko, folkloro, antropologio, geologio, psikologio, genealogio ka.

La fakto de disvastiĝo de ĉi tiu simbolo en ambaŭ formoj (kun unu aŭ du kapoj) en pluraj kontinentoj, atestas kredeman naturon de ties uzado.

Ĝis hodiaŭ, FIFA<sup>20</sup> kaj eŭropa masmedio neniam akuzis kaj monpunis, pro "politika simbolo", iun sportiston, kiam li, antaŭ matĉo aŭ je signo de danko pro venko, mansignis kristanan krucon, malgraŭ la fakto ke ĉi tiu simbolo troviĝas en multaj ŝtataj flagoj (de Grekio, Svisio, Anglio,

---

<sup>19</sup> Ŝkiptar- shqiptar, nomo de hodiaŭaj albanoj

<sup>20</sup> Monda Federacio de Futbalo

Svedio ka) kaj estas jam konataj la sangumaj konfliktoj historiaj de eŭropaj popoloj el mezepoka kaj moderna epokoj, gvidataj de ĉi tiu simbolo, kiel okazis dum milito en Kosovo (la 5-an de marto 1998- 11-an de junio 1999).

Je sorta ironio, ne nur estraro de FIFA sed ankaŭ esploristaj albanologoj ne scias ke:

Aglino estas centra figuro en la biblia prelegado de kristanismo kaj plej praa kredema simbolo de Dio en Eŭro-Azio.

Ĝi menciatas de apostolo de Jezu Kristo- Simone, konata per nomo Sankta Pjetro (unua jarcento). La unua Papo de Katolika Eklezio, laŭ skribaj dokumentoj, estas preleginte komence en Ilirio<sup>21</sup>, antaŭ ol transpasi al okcidenta bordo de Adriatiko. Li konsilis al paganoj ke ili sekvu lian konduton.

" Dum ĉasado, aglino ne perdas sian dignecon. Ĝi malsupreniras fulme de altecoj, sed ne falante en koton aŭ restante surtere. Ankaŭ ni ne revenas al peko pro malmorala vivo kaj ne forgesas ke Kreinto estas kondukinta nin al altecoj" (2 Pietro 2:20.21)

Por romia teologo- Ireneo (Irenaeus: 130-202), kiun ambaŭ eklezioj (katolika kaj ortodoksa) konsideras "sankta" kaj unu el siaj "patroj", la figuro de aglino estas simbolo de supreniro al ĉielo, al Kristo. "Post Lia resurekto kiel aglino, Li leviĝis al ĉielo. Sekve, por ni Li estas ĉio: homo je naskiĝo, bovido je morto, leono je sia resurekto, aglino je supreniro al ĉielo".

Multaj predikantoj kaj parto el bibliaj skriboj, konsideras la vivon de aglino kiel kompara figuro de agoj de Kreinto kaj simbolo de Resurekto.

"Dio, samkiel aglino, sin dediĉas al sia popolo kondukante ĝin al saviĝo, al altecoj, tenante sur siaj flugiloj". "Aglino estas simbolo de eterna juneco (Ps. 102.5) kaj restariĝo de Dia justeco por nekredanta popolo" (Sa; 103.5), (Os 8.1)

Ĝia figuro konsideriĝas ĉefa ekzemplo en la lecionoj kaj bibliaj eventoj, kiel ĉe: (Ebri.9:14; 1Pietro 1:18,19), (Esodo 19:4; Deut.32:11,12),(Giobbe 39:27),(1 Re 4:31...),(Levitico 11:13),(Efesini 4:15; 1Pietro 2:1-2; Ati 18:25-26),(Gen. 7:8-9),(Apoc. 12:13,14),(Proverbi 30:18,19),(1 Tessalonesi 4:13...),(Ezechiele 1:10),(2 Cronache 9:3-5), kaj de multaj aliaj apostoloj de kristanismo.

Tio estas la kialo ke en la objektoj de kristana kulto ni vidas aglinon, tenante la libron de Biblio (fig.1) apud figuro de Kristo, sur plafonoj de preĝejo aŭ super la trono de ĉefaj prelatoj kaj prezentita kun siaj flugiloj, multnombrajn figurojn de sanktuloj kaj anĝeloj, kiel kondukantoj de la vorto aŭ la senditon de Dio.

---

<sup>21</sup> Vasta teritorio de Okcidenta Balkanio



1. La libro de Biblio sur la aglino en la preĝejo de St. Nicholas, Blakeney, Norfolk, en Anglio, sed ankaŭ en la katedraloj de S. Pietro, S. Paolo, S. Andrea en Pjetesburg (Rusio), Irlando ĝis en la objektoj de katolika kulto en Australio. 2. Papo Franĉesko mansignante la simbolon de aglino

La kristana teologio kaj aliaj kurentoj al tio ligitaj, por disvastigi religiajn lecionojn, incisis de ĝia vivo en la naturo, ne elvolvante la simbolecan signifon kion ĝi portas, por kio sendube scias "kleruloj de Eklezio, kiel tion atestas ankaŭ la grava loko kiun ĝi okupas en arto de objektoj de kristana kulto kaj vesto de plej superaj prelatoj de ortodoksa kaj kopta eklezioj. Deirante de ĉi tiu fakto, ni traspuros la figuron de aglino ne kiel vivaĵo de birda mondo, sed kiel simbolo en la scienco de Kredo.

La bona eksperto de pratempaj kaj novaj kredoj kaj de mitologio, H. Blavatsky (Il Glosario Teosofico), parolante pri kvar simboloj de kredo (homo kun flugiloj, leono, bovo kaj aglino), spegulitaj en la libro de evangelioj, kiun legadis la unuaj kristanoj, asertas ke "La aglino (de Sankta Ĝovano) reprezentas kosman spiriton aŭ aeron, ĉiupovan okulon de Profeto".

Por katolicismo, "dieca okulo" aŭ "ĉion vidanta okulo" de Dio- Patro, ĉionscianta kaj ĉietrovita, estas esprimita en Psalmo 33: 18 kaj bibliaj prelegadoj: (Matt. 20:15), (Prov. 22:9), (6:17 marg.), (Isa. 3:16), ka.



Ĉi tiu centra loko, okupanta aglino en prelegadoj kaj teologio de kristanismo originas de kredo de la unua civilizo de Eŭro-Azio, tiu pelazga-arbra<sup>22</sup>. Ĉi tiu konkludo (preter aliaj faktoj) baziĝas sur dialektoj de shkiptaro-arbroj de modernaj tempoj.

La esploristo de teosofista filozofio (théosophie), H. Blavatsky, parolante pri nomumo AIN Soph, uzata en la biblia prelegado, asertas ke, laŭ filozofo Filone de Aleksandrio (20– 45 antaŭ Kristo. *Quaestiones et Solutiones in Genesis*), AIN Soft, estas "Dua Dio kaj Ties Saĝo", estas "Dieco simbolizanta "Nenion", estas sennoma, tial ĝi nomiĝas "AIN Soph", ĉar la vorto "Ain" signifas Nenio kaj en la hebrea lingvo Ain simbolizas tion, kio ne ekzistas.

En la hebrea, araba, kaldaika kaj siria lingvoj, la nomo Ain montras la okulon (*Appunti sui primi elementi di lingua ebraica*. Gastone Ventura)

La okulo en la alfabetoj de ĉi supraj lingvoj esprimas la literon "O" je senco de "nulo, nenio". La erudita esploristo Petro Zheji (*Shqipja dhe Sanskritishtja - La albana kaj la sankskrita*) asertas ke "La simbolo 'O' montras centron, Animon, Dion (...). Nenio en la hebrea estas AIN kaj esprimas Kreinton kiun oni ne povas koni". AIN nomiĝis ankaŭ la urbo Levit en la teroj de judaikaj pratempaj triboj kaj 'Ain Giälüt' en Palestino kaj aliaj landoj de Azio, sed ankaŭ en Eŭropo, aparte en loĝlokoj de baska loĝantaro (Hispanio, Ibera Duoninsulo).

En ĉi tiu duoninsulo troviĝas pratempaj skriboj, similaj al tiuj de Etrurio (Italio) kaj Ilirio (Albanio), kiuj legiĝas nur pere de la albana lingvo. (Nermin Vlora Falaski, *Pellazgët - Ilirët-Etruskët - Shqipetarët*), samkiel mem la nomo de tiu loĝantaro (baschi = bashkë- kune t.e. gentaro kaj ilia lingvo Eskuera = e shkuara - pasinto, e vjetra- malnova) kiuj dum pratempo adoris Bovon (kultan simbolon de luna kredo de Dodono) kiel Dieco kaj laŭ Strabono, fondis la iberan civilizon.

Laŭ hispanaj esploristoj, la nomumo Ain estas disvastigita kiel homa familia nomo kaj kiel toponimo, ampleksanta ĉiujn loĝlokojn de baska hodiaŭa loĝantaro, etenditaj de municipo de Tafala, norde de Hispanio kaj loĝlokoj en la montovico de Pireneoj (nomo originanta de albana lingvo pri aglino, samkiel tiu de Ibera duoninsulo).

La lingvistoj opinias ke tio estas brutbredista kaj agrokulturista toponimo, sed ĝis hodiaŭ, la signifo de nomo AIN ankoraŭ estas ne solvita.

Konklude, la esploristoj, ĝis hodiaŭ, por la mitika kaj kreda simbolo AIN ne donis eksplikon je lingva signifo, en la parolmaniero de la pratempaj kaj hodiaŭaj popoloj de Eŭro-Azio.

Ni turniĝu denove al la figuro de aglino. En la vortaro de H. Blavatsky: Ĉiuj kvar simboloj de evengeliaj libroj, legitaj de la unuaj kristanoj (homo kun flugiloj, leono, bovo kaj aglino) estas de egiptoj, kaldeoj kaj indianoj".

---

<sup>22</sup> Pelazgoj, supozebla praa granda popolo de Eŭropo kaj Mediteraneo, arbroj antaŭuloj de ŝkiptaroj



Pri figuro de aglino en la mitoj de pratempaj popoloj kaj ties simbolo kiel "Dieca okulo", de Kreinto, estas parolite ankaŭ en pli fruaj skriboj, same ankaŭ en la libro dediĉita al kredo de pelazgoj (*Sellenizmi- Selenismo ...*)<sup>23</sup>, tial ĉi tie mi haltos sur kelkaj faktoj esprimitaj en la arkeologiaj objektoj, nur de..

## Faraona Egiptio

Kiam ni parolis pri uzado de la simbolo de aglino de pratempaj imperioj, ni devus komenci la liston de imperio de reĝoj atlantido - pelazgaj, kies rektaj kontinuantoj estis diecigitaj reĝoj en Olimpo kaj faraonaj dinastioj en Egiptio, kies brilo finiĝis kun la faroj de Aleksandro la Granda (320-356 antaŭ Kristo).

Multaj studoj diras ke antaŭuloj de faraonoj, originis de atlantidoj- arianoj, savitaj de diluvo. Pri tiu popolo, kvalifikita de tre supera civilizo, al Platono estis parolinta elstara atenano Solono (640-558 antaŭ Kristo), laŭ rakontoj auŝkultitaj de egiptaj pastroj. Ke atlantidoj, pri kiuj oni skribis ĉirkaŭ 20 mil libroj, estis gentoj pelazgaj-arbraj, tion atestas en sia studaĵo (*Thoti fliste shqip- Thot parolis albane*), la arbra erudito Xhuzepe (Giussepe) Katapano (Catapano).

Pelazgaj reĝoj, alvenintaj de Pelazga Duoninsulo (nuna Balkanio) kaj mediteraneaj insuloj, okupinte per milito terojn en norda Afriko, disvastigis sian kredon per ideo de Unu Dio, kun ĉefa simbolo - aglinon kaj faraonon kiel ties fidinton. En la bibliaj mitoj, la rolon de Dia sendito, ni trovas esprimita en la figuro de Moseo (latine Moyses) kaj aliaj patriarĥoj bibliaj (Adamo, Noa, Abrahamo) alvenante ĝis hodiaŭaj tagoj per mito de Kristo.



1. Aglino kun homa vizaĝo kiel reprezentanto de Kreinto, en rolo de kondukanto de spirito de la mortinto. Pentraĵo pri sarkofagoj de pastroj de Amono (Dio de egiptoj). Muzeo pri Egipto en Florenco. 2. Figuro de pastrino kun aglinaj flugiloj sur sarkofago de faraono, prezentanta pli malfruan tempoperiodon ol tiu montrita en fig.1. Dekstre,

<sup>23</sup> Verko de Fatbardha Demi

vidiĝas "dieca okulo" substreka rolo de pastrino kiel peranto kun Dio. En kristanismo ni trovas, uzita en la figuroj de protektantaj anĝeloj, ankaŭ ikonojn de praaj bibliaj sanktuloj.

En la arkeologiaj objektoj de piramidoj, oni rimarkas ke aglino neniam servis kiel kompara rimedo de sia vivo en naturo, kiel oni predikas figurece en la Biblio: "Vi ja vidis kion mi faris al egiptoj kaj kiel mi prenis Vin sur la flugiloj de aglino kaj direktigis al Mi" (Esodo 19:4). (27)

Ĉie, kiel en la formo de birdo, homo/birdo aŭ homo kun aglinaj flugiloj, en la kredo kaj mitologio de Egiptio, ĝi reprezentigas en la rolo de "spirito", "de kondukanto al transa mondo", "de protektanto" certigita de Kreinto kaj kiel simbolo de dieca kaj netuŝebla potenco de faraonoj.

La unua faraono, kuraĝinta anstataŭigi aglinon en la rolo de reprezentanto de Kreinto, estis la reĝo Horos, diecigita. En multaj skulpturoj ĝi prezentiĝas kiel aglino (fig. 1 malsupre) aŭ per ties kapo (fig.2.3).



1. Horos – aglino; 2. Faraono Horos kun aglina kapo; 3. Esploristoj ĝenerale difinas ĝin kiel sunan egiptan diecon Ra/Re.

La modernaj esploristoj, ne konante pratempan lunan kredon de atlantidoj-pelazgoj kaj ne tradukante prave la hieroglifon Ra/Re (fig.3) ĉe la muroj de piramidoj, traktis la saman figuron de Horos kiel egipta dieco de Suno - RA. En la interreto ne mankas ankaŭ opinio ke temas pri la figuro de Horos. Fakte, en ambaŭ figuroj estas Horos aglino, en ambaŭ roloj de ĉiu faraono: de reĝo (fig.2) kaj de pastro (fig.3) tenante surkape junan Lunon, kun unu el la kultaj simboloj siaj-serponton. Ankaŭ patrino de dieco Horos prezentiĝas same per ruĝa Luno surkape kaj aglinaj flugiloj, montrante sian taskon kiel ĉefpastrino de luna kredo, kio estas asertita ankaŭ de Plutarko: Inter la statuoj kun korno, estas tiuj kun juna Luno.

La nomon Re, Giuseppe Catapano eksplikas per la albana lingvo, per vorto "rreze- radio", kiu en naturo "konektas" ĉielon kun tero kaj figurece ludas rolon de "peranto", kiel estas ankaŭ la tasko de reĝo- ĉefpastro Horos kun aglina kapo.

Horos estis plej praa egipta dieco kaj ties figuro sur arkeologiaj objektoj troviĝas ekde tria miljaro antaŭ Kristo. Lian nomon portis multaj reĝoj el egiptaj dinastioj kaj estas adorita kiel protektanto kaj potenco de faraono, de urbo kaj kiel "pastro de entombigoj". La origino de mito pri Horos apartenas al pastroj de urbo Heliopolis, laŭ kiu li estas filo de dio Osiris kaj dieco Isis. Lia kulto honoriĝis aparte en pratempa urbo Nekhen, kiu nomiĝis "urbo de aglino".

Kiel atestas la arkeologiaj objektoj, ĉiuj plej potencaj reĝoj de pratempo, kiuj dieciĝis en mitoj, estis vestitaj "per kostumoj" kompletaj aŭ partaj de aglino: en Eŭropo, norda Afriko, persa imperio de Proksima Oriento, Indio kaj civilizoj de centra kaj suda Amerikoj.

Post kiam ni evidentigis kurte la ĉefan rolon ludinta la simbolo de aglino en egipta civilizo, gravan lokon okupinta ĝi en la biblia prelegado, en la arto de kristanismo, samkiel en la teosofia scienco, heredita de "sekreta" filozofio de Pratempo, restas trovi la originon de ĝia kreda uzado, t.e. : Al kiu loĝantaro, lando kaj historia periodo apartenas la inico de simbolo de aglino kaj ties mito (dieca okulo) kiel unua reprezentanto de Dio surtere?

Pri ĉi tiuj demandoj, kiujn historia kaj kreda scienco eŭropa kaj tutmonda preterlasis, ni turnos nin al tiu loĝantaro, kiu per sia lingvo eksplikas lingvan, kredan signifon kaj difinas historian periodon de aglino kiel simbolo.

Albana lingvo estas orminejo

Tiel sin esprimis Arif Mati, doktoro pri scienco de Pratempo, laŭ titolo donita de universitato de Sorbono (Parizo 2012). En la dialektoj de albanoj troviĝas sciencaj faktoj ankaŭ pri tempaj periodoj "sen skribaj dokumentoj" kaj "sen datoj", kiel ni klopodos elvolvi pli sube, ekirante de tri nomoj menciitaj supre:

1. Shqipetar, 2. Komb kaj 3. AIN.

**1.** La radiko de nomo **Shqipetar**, vaste traktita de mi antaŭe,<sup>24</sup> estas **IPE**. En la vortaro de standarda albana lingvo, la vorto **IPE** ne troviĝas, sed en la subdialekto toska de Ĉamerio ĝi nomumas aglinon kaj montras kiel la antaŭhistoria kredo influis en la formiĝo de novaj vortoj. La primitiva homo, vidante aglinon kiel solan birdon de grandaj altecoj, kiu povus alproksimiĝi al Kreinto, juĝis ĝin kiel sian peranton kun Ĉiopovanto. Ĉi tiu mito speguliĝas en la albana lingvo per nomo de aglino : **IPE** (i+pe), kie « I », laŭ la arbra erudito Giuseppe Catapano "en la doktrino de Thot<sup>25</sup> reprezentas Kreivan Potencan de Dio, tio estas mem Vorto " + verbo en la pasinta tempo – pashë- vidis/dua persono, singularo (ti) pe- ci vidis.

Ĉi tiu nomo signifas: „Dion ci vidis“. Ĉi tiu nomo aperas ofte en la folkloro de loĝantaro de

---

<sup>24</sup> Alia verko de Fatbardha Demi

<sup>25</sup> Thot plej erudita homo de pratempa Egiptio, alproprigita poste de grekoj per nomo Hermes

Ĉamerio. En legendo pri fama Pirro, reĝon de Epiro, ni legas: "Kiam Pirro estis etulo, lin kondukis al reĝo de Shkodra<sup>26</sup>: "Ho, honorinda reĝo, via gloro kresku kaj vivu kiom montoj De Ipero ni alvenis por kredi ĉi tiun birdon de Ipe/ ĝi kresku vera Ipe".

La nomo Ipe de la albana lingvo montras la originon de kreda simbolo de aglino ĉe la antaŭhistoria eŭropa homo kaj pli vaste. Ĉi tiu simbolo apartenas al la inica tempoperiodo de homa socio- matriarkato-, kion ni trovas uzata ankaŭ en la biblia prelegado. El tiu kreda mondkoncepto de pelazgo-arbroj pri aglino, devenas ankaŭ la mito pri "dieca okulo", kies modelon ni trovas en la muzeo de Butrinti en Saranda. Faraono/Dio Horos, prenante simbolon de aglino, heredis ankaŭ la miton pri "dieca okulo" konata en la egipta mitologio kiel "okulo de Horos".

Je granda geografia distanco, en la objekto de kulto de actekoj de Ameriko, en la egiptaj piramidoj aŭ sumeraj gentoj, esperimiĝas la mito ke aglino estas dieca okulo- Dio. Sed neniu lingvo de iu ajn pratempa aŭ moderna popolo enmondo, nek tiu sanskrita, kapablas ekspliki tion lingvece.

Tiun miton de atlantidoj- pelazgoj (Dio/Lumo= Okulo de aglino), ni trovas nur en la arkeologiaj objektoj.

**II.** La kreda simbolo pri aglino estas konjektita kun vorto-duopa nomumanta nian etnion, albanan naciecon, kio originas de du antaŭhistoriaj nomoj: Komb kaj Shqiponjë- Nacio kaj aglino. Ĉar la nomo de aglino estas pritraktita pli supre, ni donas ankaŭ lingvan kaj mitan signifon de la nomo 'Komb' en la albana lingvo kaj en la mondkoncepto de shkiptaro-arbroj. En la subdialekto de Ĉamerio, kiam ni volas ligi du aŭ pli da fadenoj, ni diras "faru kom". Ankaŭ en la vortaro de la albana lingvo (2006) ĉe vorto Komb, ni legas:

**Komb- 1.** Strikta ligaĵo de du partoj aŭ de du ekstretoj de fadeno, ŝnuro, kaj aliaj, aŭ de du randoj de mantuko, tolaĵo kaj aliaj; nodaĵo. E lidhi komb- Li ligis ĝin komb. Zgjidh kombin- malligu komb-on. 2. Ligna nodo, nehakebla ligno. 3. Stabila homa komunumo, formita historie surbaze de komuneco de lingvo, teritorio, ekonomia vivo kaj psika formiĝo, aperanta en kultura komunumo. Kombi shqiptar- albana nacio.

La inica radiko de la vorto "komb" estas "kom", ĉar en la albana lingvo ni havas vortojn esprimantaj komunecon aŭ konjektecon kun tiu radiko kiel: kom- unë- mi, kom-shi- najbaro. En ĉi tiu formo skribis ankaŭ Shtjefën Gjeçovi en sia libro "Trashëgime thrako- iliriane- heredaĵoj trako-iliraj)": "Ĉi aferojn estas rakontitaj de mem buŝo de nia 'kom', kiu ne sciis legi alian kanzonon krom tiuj pri bravuloj, pri militoj kaj pri rezistadoj". La mitika senco de vorto 'Kom' estas por montri al fremdaj gentaj komunumoj ke arbroj estas "gentoj ligitaj al Dio". Pro tio oni algluas al vorto 'Komb' la figuron de aglino, esprimanta same "ligon al Dio".

---

<sup>26</sup> Urbo en norda Albanio

Pro nescio pri la vorto 'Komb' ni devas kontinue rememorigi ke "la nomo Komb esprimas mondkoncepton kaj historian karakteron de shkiptaro-arbroj, distinge de ceteraj popoloj". Tiu klarigo manka en niaj lernejoj kaj studaj libroj troviĝas en la plej praa libro pri leĝoj- en Eŭropo, en Kanuno de Lek Dukagjini<sup>27</sup>: "Familio konsistas el familanoj; pliiĝante ĉi tiuj dividiĝas en frataro, frataro dividiĝas en parenkaro, parenkaro en gentoj, gentoj en standardo kaj ĉiuj kune en pli malfermita familio, nomata Kom, havas unu patrion, unu sangon, unu lingvon kaj samajn morojn". (Dua ĉapitro, naŭa subĉapitro, Membroj de Familio, Kanuno de Dukagjin). Ĉi tiu fakto rekonfirmas antaŭhistorian originon de la simbolo de aglino de gentaj komunumoj de pelazgo-arbroj.

III. Dum du unuaj nomoj (Ipe/Komb) apartenas al la inico de naskiĝo de kreda filozofio de primitiva homo, la nomo de aglino Ain apartenas al teologia filozofio sofismeca kaj "sekreta" ĝis hodiaŭaj tagoj.

Helpe de libro de Giuseppe Catapano ni malkovras ke en la lingvaĵo de arbroj de Italio, la nomo de kreda simbolo Ain, uziĝis por aglino, kiu "kaŝiĝis" de kristana teologio sub la nomumo de "spirito" kaj "vorto" (logos) de Kreinto.

La nomon de Dio- Al, ligita kun tiu de aglino Ain, ni trovas kiel toponimo de 4000 jara urbo en Emirlandoj **Al-‘Ayn** (العين), skribata ankaŭ Al-Ain kaj en la kreda senco signifas "Dio- Aglino".

La fakto ke en la mitologio de atlantido-pelazgoj de antaŭfaraona Egiptio, Dio Horos prezentiĝas kiel aglino kaj konektiĝas kun la simbolo "La okulo de Horos", kies miton eksplikas nur la hodiaŭa albana lingvo, atestas ke shkiptaro-arbroj estas rektaj heredintoj de la unuaj loĝantoj de eŭropa kontinento, kiuj kreis kredan teologion kaj unuajn simbolojn, disvastiĝintaj onde-onde sur la plejparto de mondo. Tiun fakton esprimis, la unua, Herodoto (484-425 antaŭ Kristo). Parolante pri kreda mitologio de egiptoj kaj de Pelazga Duoninsulo (dardano<sup>28</sup>-helenoj), li skribas: Mi certe ne intencas rakonti pri tuto aŭdite pri iliaj diecoj, krom pri iliaj nomoj, ĉar mi pensas ke ĉiuj homoj, kredas same pri diecoj".

Post pelazga Horos, la taskon de reprezentanto kaj puno de Dio entreprenis Zeŭso, tiun fakton atestas la aglino kion li portas enmane, kiel tio prezentiĝas en multaj moneroj kaj skulptaĵoj, aŭ ĉe liaj piedoj. Li sendis aglinon por puni titanon Prometeo, ĉar ĉi lasta donacis al homaro (je senco de sciaro) posedaĵon de ĉefdio de Olimpo- Zeŭso.

Plej praa arkeologiaj objektoj montras ke la homo kiu entreprenis rolon de "peranto" kun Kreinto, estis virino je birda kapo, kiun arkeologo Maria Gimbutas nomumis "Dieco Birdo", dum por ni tio estas "Dieco Aglino" kaj troviĝas kun vesto el tradicio de mirdita<sup>29</sup> virino (Albanio). Tio apartenas al inico de periodo de "matriarkato". (Selenismo p. 25)

---

<sup>27</sup> Buŝa popola leĝaro

<sup>28</sup> Dardanoj, popolo loĝinta en teritorio de nuna Kosovo kaj pli vaste

<sup>29</sup> Mirdita distrikto en norda Albanio



La simbolo de kruco (en ambaŭ ties klasikaj formoj  $\text{†} / \text{X}$ ) same originas el inica periodo, kie ĝi esprimis diecan virinon kiel "reproduktiga" kaj tre poste- stelon, kiel simbolo por Kreinto (selenismo p.65). Ĉi tiun simbolon de luneca pelazga kredo (Luno-stelo) ni trovas sur la lanĉapo de Aleksandro la Granda kaj objektoj de multaj malaperintaj civilizoj, luita de Islamo hodiaŭ, en la standardoj de kelkaj ŝtatoj je tia kredo. En mito de kristanismo, kruco estas simboleca objekto de sakrificio de Kristo je favoro al homaro, sed ne estas simbolo esprimanta Dion aŭ ties senditon, kiel estas la simbolo de aglino.

Ĉi tiu miljara "historio" traktita pli supre, troviĝas ĉe ni en la arkeologiaj objektoj kaj en la verkoj de arto (tri subaj fotoj). Tio, hodiaŭ mankanta por kompreni "ilian lingvon", estas nescio pri la kredo kaj lingvo de atlantido-pelazgo- etruskoj, antaŭhistoriaj prapatroj de shkiptaro-arbroj hodiaŭaj.



1. Parto de skulptaĵo de aglino je gigandaj dimensioj (proksimume 3 metroj), prikonsiderante parton de piedo, en muzeo de Durrës<sup>30</sup>. Saman modelon sed je naturaj dimensioj ni trovas en la historia muzeo de Shkodër. 2. Simboloj de romiaj legioj (*Cortesia Chiesa di San Marcello in Corso - Roma-IT*). Luno sube de simbolo de Dio (cirklo kun bulo en centro) sur tri lanĉoj, atestas pri kredo al Dio- Luno en romia imperio kaj (supre) kun kulta simbolo plej grava- aglino sur meza lanĉo. 3. Moderna skulptaĵo de aglino de biblia prelegado de hebreoj, simila al arkeologia objekto de Durrës, en urbo Haifa, plej grava marhaveno konsiderata kiel norda ĉefurbo de Izraelo.

Popola kredo- asertas Dhimitër Pilika- ĉie en albanaj teroj honorigas aglinon kiel sankta kaj netuŝebla (...). Tion ni trovas en natura formo aŭ stiligita: sur lignaĵoj (kestoj, ŝrankoj, plafonoj, luliloj, kuleroj, ŝpinbastono ka); sur metalo (ponardo, glavoj, hejma ilaro, geviraj ornamentoj, fusiloj ka); sur teksaĵoj kaj ledaĵoj (mokasenoj, rimeno, popolkostumoj, ŝtrumpoj, kurtenoj, tapiŝoj, ka); ŝtono (lintelo, kameno, tabloj). Sed ankaŭ en kanzonoj, dancoj, homonimoj, toponimoj samkiel la ĉefan simbolon de nia Komb kaj ŝtato.

<sup>30</sup> Urbo en Albanio

Konklude:

La simbolo de aglino, kiel reprezentanto de Kreinto surtere, estas pli praa ol la simbolo de kruco en la ĉefa mito de kristanismo.

Agnoskante ĉi tiun konatan sciencan, historian kaj kredan fakton, de la malaperintaj popoloj kaj heredita ĉe shkiptaroj-arbroj hodiaŭaj, ni akirus esencan ŝanĝon en la monda historio, sed ankaŭ en la mentaleco de institucioj de diversaj kampoj kaj medio ĝenerale. En neniuj lingva aŭ historia vortaro de mondo troviĝas nomo esprimanta: familion, miton, kredon, tradicion, etnan apartenecon, simbolon de standardo, historion kaj antaŭhistorian aĝon de loĝantaro, mondkoncepton kaj inican juran organiziĝon, kiel la nomo de albanoj-arbroj hodiaŭaj- shkiptar kaj komb- multe pli frue ol ili havu sian ŝtaton.

Kiel ni menciis komence de nia skribo, multaj kredaj simboloj de unuaj tagoj de homa historio, uziĝas ankaŭ en modernaj tempoj de homoj, popoloj kaj religiaj institucioj, nekonante ilian originan sencon. Estas sciite same ke la simboloj kaj religiaj ritoj de pratempo, dum miljaroj estas turniĝintaj en kulturaj tradicioj montrantaj historiajn kaj mondkonceptajn specifojn de popoloj, kiel estas la kreda simbolo de aglino ĉe albanoj.

Tiu ĉi loĝantaro, kiam ĝi demandas esprimi buŝe etnan apartenecon, uzas esprimajn: mi estas je ŝkiptara nacieco, kaj en la momentoj de fortaj emocioj kaj akirita venko, li/ŝi formas per du manoj- aglinon- ilian historian kredan simbolon (veron dirante ankaŭ de pelazgaj gentoj de Eŭro-Azio dum pratempo).

Ĉe du futbalistoj albandevenaj nejuste punitaj de FIFA, konsekvence de ties nescio pri supremenciitaj sciencoj kaj muteco de oficiala albanologio, la emocioj de venko esprimiĝis ankaŭ antaŭ elektronika kaj papera medio per la dieca simbolo de aglino, dediĉita ĝuste al familio, samnacionoj kaj ĉiuj futbalamantoj enmondo.

Ilin Dio benu!

Fatbardha Demi ([fatbardha\\_demi@yahoo.com](mailto:fatbardha_demi@yahoo.com))

21.10.2018

Mi mem aldonis jenan alineon en Wikipedia artikolo pri AGLO (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Aglo#Referencoj>)

La aglino estas pratempa eŭrazia kredosimbolo kaj ne malmultas futbalistoj kiuj esprimas per signon de 'aglino' en formo de du manoj, siajn emociojn kiel "signo de venko"<sup>[1]</sup>. La simbolo de aglino, kiel reprezentanto de Kreinto surtere, estas pli praa ol la simbolo de kruco en la ĉefa mito de kristanismo<sup>[1]</sup>. (Mi bedaŭras ke la ref. ne iras al esperanta publikaĵo, tial mi aldonis la libron de via konatulino, kvankam ne certas ke la informo el via artikolo troviĝas ankaŭ en ŝia libro Sellenizmit (Helenismo).

Met vriendelĳke groeten, Amike vin salutas, Herman D.

## Vikepedio

Multaj nobeloj kaj reĝoj, eĉ modernaj nacioj, uzas la aglon kiel simbolon, foje eĉ aglon kun du kapoj, ĉar ĝi figuras kaj potencon kaj belecon. La ptolemeaj regantoj de [Egiptio](#) uzis ĝin por siaj sigeloj, dum la [romianaj](#) militistaroj uzis ĝin por siaj standardoj.



Blazono de la [Unua Franca Imperio](#), prezidate de reĝa aglo

En Antikveco la reĝa aglo estis simbolo de kuraĝo kaj povo pro sia forto, grando kaj neatingebla de siaj nestoj. En greka kaj romiana mitologioj iĝis tuje unu el la simboloj de Zeŭso, Jovo aŭ Jupitero, la direĝo kaj anstataŭis rapide la [ŝafgrifon](#) kiel kapo kaj krifoj de la terura mitologia [grifo](#). En [Romio](#) estis dekomence religia simbolo kaj iĝis milita kaj politika, kiel blazono de la [Romia Imperio](#). Ĉiam, kiam romia legio ekmarŝis, iu soldato, la *aquilifero*, marŝis la unua portante la standardon kronitan per literoj [SPQR](#) kiuj signifas “senatus populusque romanus”, tio estas “senato kaj la romia popolo” kaj la reĝa aglo.

De Romio aglo pasis kiel simbolo al [Bizancio](#). Bizanco donacis la imperian simbolon (de aglino) al nobelaro de reĝlandoj integritaj en ĉi tiu multetna imperio kiel al: rumanaj, bulgaraj, germanaj, rusaj, serbaj, grekaj, albanaj princoj, kaj aliaj. Tial, ĉi tiun simbolon uzadis dekduo de ŝtatoj, kiuj iam havis kulturajn kontaktojn kun Bizancio<sup>[1]</sup>.

En Bizancio la aglo fariĝis dukapa. Unu el la kapoj reprezentis la malnovan falitan imperion de [Romio](#), kaj la alia la novan imperion de [Konstantinopolo](#). Kiam [Karolo la Granda](#) restarigis la Okcidentan Imperion aŭ Sakrala Germanromiana Imperio, ankaŭ tiu ĉi adoptis kiel simbolo la dukapan reĝan aglon, kvankam en la [Moderna epoko](#) la imperia familio [Habsburgo](#) preferis anstatŭigi ĝin per la [imperia aglo](#). Dum la [Mezepoko](#) kaj Moderna Epoko, ankaŭ multaj nobelaj familioj adoptis la reĝan aglon kiel blazono, multfoje flankigante la blazonŝildon de la familio.

Lastatempe [Germanio](#) denove akceptis la reĝan aglon en la blazono anstataŭ la imperian aglon.

Kiam falis Konstantinopolo en [1453](#), kelkaj reĝaj familioj de orienta Eŭropo adoptis la bizancian reĝan aglon kiel blazono, por igi sin heredantoj de la ĵuse falita [Orientromia Imperio](#). Pro tio la bizancia aglo estis blazono ankaŭ de la [Rusa Imperio](#), kaj eĉ nuntempe aperas en la centro de la [Albania](#) flago.



Meksikia blazonŝildo

La unukapa aglo denove estis uzata kiel blazono de [Napoleono](#) dum la efemera [Unua Franca Imperio](#). Antaŭ tio, la ideo estis kopiata ankaŭ de la sendependistoj de [Usono](#), sed por komprenigi, ke alvenis nova *Amerika Imperio* la reĝa aglo estis anstataŭata de la [blankkapa maraglo](#), ekzistanta nur en Nordameriko. La aglo de la Meksikia flago estas tamen tute nerilata al tiuj de eŭropaj blazonoj, ĉar ĝi estas heredanta de la legendo pri la fondiĝo de urbo [Tenoĉtitlano](#), kaj pro tio ĝi ne aperas laŭ heraldika sinteno sed vorante serpenton.

En la [Katolika Eklezio](#), reĝa aglo estas simbolo de la plej juna [apostolo](#), [Sankta Johano](#). Kiam la [papo Aleksandro la 6-a](#) donis titolon de Reyes Católicos aŭ [Katolikaj Gereĝoj](#) al la monarkoj de [Hispanio](#) en [1496](#), li permesis al ili ankaŭ aldoni al ilia blazono la aglon de Sankta Johano. La birdo restis en la hispana blazono dumdiversaj epokoj, la lasta dum la [Frankismo](#), tiam tute nigra kaj pro tio pli proksima al imperia aglo ol al la reĝa, ankaŭ agorde kun la “imperia” sinteno de la hispana faŝismo. Dum la redemokratiigo de Hispanio oni forigis la “kokidon” de la nacia blazono laŭ la nereligia spirito de la [Hispana Konstitucio de 1978](#).



[Aglo nigra](#), *Arrano beltza*, heraldika blazono de la navara reĝo [Sanĉo la 7-a](#).

En kelkaj islamaj landoj, kiel [Egiptio](#) kaj [Irako](#) oni uzas la nomatan *aglo de Saladino*, kiu uzis ĝin dum la epoko de la Krucmilitoj. La simbolo rilatas la movadon tutarabisman, ĉar, same ke tiu, Saladino redonis [Jerusalemon](#) al islamanoj kaj unuigis la tutan Mezorionton en ununura ŝtato sub sia regado.

En [Brazila folkloro](#) Aglo rilatas al Grupo 02 kaj al ĉiuj nombroj finitaj per 05-06-07-08 (vidu [Besta loto](#)).

La aglino estas pratempa eŭrazia<sup>[2]</sup> kredosimbolo kaj ne malmultas futbalistoj kiuj esprimas per signon de 'aglino' en formo de du manoj, siajn emociojn kiel "signo de venko"<sup>[1]</sup>. La simbolo de aglino, kiel reprezentanto de Kreinto surtere, estas pli praa ol la simbolo de kruco en la ĉefa mito de kristanismo<sup>[1]</sup>.

En kelkaj islamaj landoj, kiel **Egiptio** kaj **Irako** oni uzas la nomatan *aglo de Saladino*, kiu uzis ĝin dum la epoko de la Krucmilitoj. La simbolo rilatas la movadon tutarabisman, ĉar, same ke tiu, Saladino redonis **Jerusalemon** al islamanoj kaj unuigis la tutan Mezorionton en ununura ŝtato sub sia regado.

En **Brazila folkloro** Aglo rilatas al Grupo 02 kaj al ĉiuj nombroj finitaj per 05-06-07-08 (vidu **Besta loto**).

La aglino estas pratempa eŭrazia<sup>[2]</sup> kredosimbolo kaj ne malmultas futbalistoj kiuj esprimas per signon de 'aglino' en formo de du manoj, siajn emociojn kiel "signo de venko"<sup>[1]</sup>. La simbolo de aglino, kiel reprezentanto de Kreinto surtere, estas pli praa ol la simbolo de kruco en la ĉefa mito de kristanismo<sup>[1]</sup>.

Ekzistas **proverbo** pri aglo en la **Proverbaro Esperanta** de **L. L. Zamenhof**<sup>[3]</sup>:



„*Ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon.*”

1. ↑ <sup>1,0 1,1 1,2</sup> Fatbardha Demi, Aglino, la plej pratempa simbolo de kredo en Eŭrazio, la 21-an de oktobro 2018, en : Sellenizmit (helenismo) - besimi që sundon botën, eld. Botimet Dudaj, 255 paĝoj, 2016, **ISBN 9789943047839**
2. ↑ Noto: Eŭrazio, la antaŭhistoria mediteranea Eŭropo.
3. ↑ Lernu

•

## **LA VIVO NE KOMPLIKAS\***



Taksi ĉi tiujn kvar aĵojn:\*

Kuraĝo  
Konduto  
Pacienco  
Sincereco



Evitu ĉi tiujn kvar aĵojn:\*

Mensogo  
Mallaboremo  
Honto  
Vanteco

Kontrolo ĉi tiujn kvar aĵojn:\*

Lingvaĵo  
Vizitado  
Francizo  
Karaktero

Ne forgesu ĉi tiujn kvar aferojn:\*

La preĝo  
Pardonpeto  
Partigo  
Respekto

Praktiku ĉi tiujn kvar aĵojn\*

Amo  
Humileco  
Paco  
Saĝo



Eliminu ĉi tiujn kvar aferojn\*

Malamo  
Fierego  
Malboneco  
Ĵaluzo

Via Honoro Sebuĥoro [honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com)

## **KION VI ĈIUJ DIRAS KIAM VI KOMENCAS VIAN TAGON?\***

- \*Moseo\* diris: "Sinjoro, se vi ne venas kun ni aŭ antaŭ ni, ni nenien iras".
- \*Abraham\* diris: "La Sinjoro havigos.
- \*Jakobo\* diris: "Mi ne ellasos vin ke se vi benu min."
- \*Josuo\* diris: "Pri mi kaj mia domo, ni servos la Sinjoron."
- \*Samuel\* diris: "Parolu, Sinjoro, ĉar via servanto aŭskultas".
- \*Nehemja\* diris: " La ĝojo de la Eternulo estas mia forto."

\*David\* diris: "La Eternulo estas mia paŝtisto, mi nenion mankos." Kaj "tio estas la tago, kion la Eternulo faris, mi ĝojigos kaj estos feliĉa."

\*Salomono\* diris: "Konfidu al la Sinjoro, ho mia animo, kaj ne insistas en via propra kompreniĝo, en ĉiuj viaj vojoj rekoni ilin kaj li kondukos vian vojon."

\*Jesaja\* diris: "Leviĝu kaj brilu ĉar mia gloro aperis". Kaj "nenia forĝita armilo kontraŭ mi ne prosperos".

\*Jeremia\* diris: "la Eternulo intencas fari al mi sukceson kaj ne damaĝi min aŭ malsukcesigi min".

\*Jabez\* diris: "Ho, por ke vi benu min kaj elgrandigi mian teritorion".

\*Ŝadraĥ, Meŝaĥ kaj Abed-Nego\* diris: "Ni ne adorkliniĝos antaŭ bildon, sed ni servos la Sinjoron."

\*Ezeĥiel\* diris: "Sekaj ostoj en mia vivo, vivos ankoraŭ". \*Elektu vian ĉiutagan fid-deklaron\*.

\*Primeditu ĝin! Deklaru ĝin ĉiumatene.\*

Via proksima amiko Honore Sebuĥoro [honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com)

- **MIA PLEJ FORTA TITOLITA ARTIKOLO" FRENEZULO"**

Karaj miaj gefratoj, kiu el vi estas fidela? Aŭskultu bone mian sekvan esprimon, lutage, frenezulo eniras en preĝejon kun granda armilo marko "maŝinpafilo" kaj pafas 3 sinsekvajn kuglojn al la plafono de la preĝejo kaj diris: silentu tondrante sur ili, sekve, ĝi demandas al la fideluloj: "Inter vi, kiu unu el vi, kiu amas Jesuon Kriston? Li leviĝu kaj mi tuj pafos sur lin por ĝi rekunigu lian Jesuon ĉielen". Ĉiuj preĝejanoj estis tute silente, jen estas, frato levis fingron kaj diris al la frenezulo "estas nia pastro kiu amas tro Jesuon Kriston. Pastro rigardas la kristanan fraton kaj diris al li" stulta, idioto kaj mensogisto, kiu vi estas. "Ekde kiam? Ĉu estas mi kiu amas Jesuon Kriston? Pri vi, kion vi povus respondi rilate al tia sanga demando?"

Honore Sebuĥoro [honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com)

- **KOMPROMITITA AL FARI PACON**

"Sed ĉio estas de Dio, kiu repacigis nin al Si mem per Kristo kaj donis al ni la administradon de la repacigo; nome, ke Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si, ne alkalkulante al ili la kulpojn, kaj komisiis al ni la vorton repacigan" (2 Korintanoj 5:18-19).

En la unu-ĉapitro libro al Filemono en la Biblio, Onesimo estis sklavo de Filemon, influa membro de la kolosa preĝejo. Onesimo forkuris de sia mastro, sed renkontis Paŭlon en la malliberejo en Romo. Li denove naskiĝis tra Paŭlo. Dum li revenis al sia mastro, Paŭlo devis reen konduki lin al lia mastro, por ke lia mastro

ne traktu lin kiel sklavon, sed kiel fraton en Kristo.

Sklaveco estis normala afero en la grekromia mondo kiam okazis okazaĵo. En tiu epoko, homoj fariĝis sklavoj, se ili estus prenitaj kiel militokaptitoj au fariĝis tiaj ĉar ili vendis sin en sklavecon. Plej multaj el ili estis bone edukitaj. Ilia traktado estis tre malsama al la traktado de sklavoj en la lastaj tempoj. Estas interese noti, ke plimulto de homoj en tiu epoko estis sklavoj aŭ iam sklavoj.

La sceno de Onesimo kaj Filemon estas la repacigo, pardono kaj frateco. La apostolo Paŭlo volis, ke Filemono pardonu al Onesimo, ke Onesimo povu fari tion, kaj komencis trakti Onesimon kiel fraton en Kristo. Kvankam la administrado de repacigo, al kiu ĉiu kristano estas kompromitita (vidu: 2 Korintanoj 5:19) gvidas homojn fari pacon kun Dio, ankoraŭ kiel Apostolo Paŭlo antaue admonis la romanojn: "Se estos eble, restu pacaj viaparte kun ĉiuj homoj" (Romanoj 12:18), li volis Filemon montri tion per paco kun Onesimo kaj vivi pace kun li (tio estas, Onesimo).

Estas kelkaj homoj, kiujn ni ankaŭ bezonas pardoni kaj etendi manojn de frateco, kiom ajn ili povus fari kontraŭ ni. Ĉar ni kompromitas al la mesaĝo de repacigo, ni devas antaŭenigi ĝin ie ajn, kie ni trovas nin. Ni devas pacigi kun homoj ĉirkaŭ ni kaj vivi pace kun ili.

Kiun vi bezonas fari pacon hodiaŭ?

Je la servo de Dio,  
Preĝa Punkto: Dio, helpu min ĉiam fari pacon kun aliaj homoj ĉirkaŭ mi.  
Plej amike Honore Sebuĥoro

•

### **Grekaj tombejoj kaj greka teroristo en Albanio**

Albanio probable estis la unua membro de Ligo de Nacioj invadita de sia granda najbaro, faŝista Italio, la 7an de aprilo 1939. Tiam oni proklamis kuniĝon de la reĝlandoj Italio kaj Albanio, laŭ kiu ambaŭ landoj "engaĝiĝis por protekti unu la alian" okaze de eventuala milito kun tria lando. Tiel, la 28an de oktobro 1940 Grekio estis atakita de faŝista Italio tra albana teritorio. Partoprenis ankaŭ du albanaj taĉmentoj, kiuj baldaŭ dizertis. La greka registaro deklaris staton de milito kun Albanio.

Brava rezisto

Tiam grekoj brave rezistis kaj organizis fortan kontraŭatakon. Iliaj reĝaj soldatoj ne nur forpelis la italajn taĉmentojn el la greka teritorio, sed ankaŭ eniris profunde en Albanion. Okazis akraj bataloj, kaj ambaŭflanke mortis miloj da soldatoj. Sed printempe 1941 naziisma Germanio atakis Grekion kaj baldaŭ okupis ĝin. Grekaj soldatoj retiriĝis el Albanio.

Komplika historio kaj ĝiaj konsekvencoj

Postmilito, la greka registaro paradoksece plutenis la tiel nomatan staton de milito rilate Albanion, kiu ne estas nuligita ĝis hodiaŭ, kiam ambaŭ landoj estas membroj de NATO. Cetere, Grekio estis la lasta EU-membro, kiu akceptis eniron de Albanio al NATO kaj poste liberaliĝon de vizoj por albanoj. Ĝi ankoraŭ ne agnoskas la sendependecon de Kosovo! Albanaj registaroj devis cedi al la postuloj de Grekio pri, ekzemple, starigo de tombejoj de grekaj soldatoj falintaj en Albanio. Plue, Grekio postulis, ke tiaj tombejoj (almenaŭ kvar) aperu ĝuste laŭ la linio kiu difinas landlimon de tiel nomata "Norda Epiro", suda parto de Albanio, je kiu havas pretendon ŝovinismaj cirkloj en Grekio. Aliflanke, ĝi obstine neas reven-permeson al miloj da albanoj forpelitaj en 1924 kaj 1944 el la vasta (5000 kvadrataj kilometroj) regiono en Nordokcidenta Grekio (de Jonia maro ĝis Florino). En la jaro 1913 tiuj albanaj teritorioj estis okupitaj de greka armeo kaj aneksitaj de greka ŝtato.

Albanaj civitanoj naskiĝintaj en vilaĝoj kaj urboj, kiuj nun estas en Grekio, ne rajtas viziti Grekion!

Teroristo

Antaŭ nelonge, la 28an de oktobro 2018, oni aranĝis grandan solenaĵon okaze de starigo de granda tombejo en vilaĝo Bularat, sude de la lando. Venis miloj da grekoj, familianoj de falintaj soldatoj sed ankaŭ membroj de ekstremistaj organizaĵoj kaj de la partio Ora Aŭroro. Bularat apartenas al greka minoritata regiono Dropull, kie la grekaj flagoj flirtas en ĉiu domo senprobleme. La albana polico zorgis pri publika ordo. Surprize, unu 35-jara grekdevena viro kun duobla civitaneco albana kaj greka, Kostantinos Kacifas, vestis si soldate je greka uniformo kaj komencis pafi centre de vilaĝo uzante mitraleton "Kalaŝnikov". Kiam polico intervenis, li pafis kontraŭ ĝin dum du horoj (ĉirkaŭ 90 kartoĉoj), endanĝerigante vivojn de policistoj. La polico pafrespondis, kaj fine pafmortigis la teroriston.

Prudenta reago de greka registaro

Tio kaŭzis tujan reagon de amaskomunikiloj en Grekio, aparte ĉe tieaj ŝovinismaj politikaj cirkloj. Amasoj da grekoj marŝis al la albana ambasadejo en Ateno kaj provis forbruligi ĝin, laŭte kriante "Ni mortigu albanajn hundojn!" Grekaj instancoj senkiale revokis kaj senvalidigis pasportojn de centoj da albanaj civitanoj laborantaj en Grekio. Feliĉe, la greka registaro agis ĝenerale prudente kaj kunlaboris kun albanaj aŭtoritatoj por klarigi la aferon. Todoros Pangalos, eks-ministro pri eksteraj aferoj, diris: "Armitan teroriston kondamnu ĉiu lando; la albana polico ne kulpas". Simile sin esprimis la nuna ministro pri edukado kaj aliaj gravaj politikistoj. Estis prezentitaj filmoregistraĵoj kaj aliaj atestaĵoj. Oni faris ankaŭ detalan leĝan medicinan raporton.

Malordo dum entombigo

Polico ne intervenis ankaŭ dum la entombigo de la teroristo la 7an de novembro 2018 en Bularat, kien venis dekoj da busoj kun grekaj civitanoj, deputitoj kaj aliaj. Bedaŭrinde la partoprenintoj ekspluatigis la entombigon por manifesti ŝovinismajn sloganojn kiel "Norda Epiro estas greka, ni reposedos ĝin! Ni forhaku kapojn de albanaj hundoj! Ni estas ĉi tie sur nia

tero! Makedonio estas greka!". Revenante, ili blokis aŭtoŝoseon kondukantan al la landlimo kun Grekio. Polic0 intervenis kaj konstatis, ke almenaŭ 52 el ili estis transpasintaj llandlimon neleĝe. Ili estis deklaritaj "nedezirataj" kaj ne plu ricevos permeson eniri Albanion.

Nedetruebla interpopola amikeco

Tia malagrabra incidento kaŭzita de ekstremistoj en la najbara lando certe ne povas detrui tradician amikecon inter la du popoloj. Albanio akceptis, post la jaro 1949 (kiam finiĝis la civitana milito en Grekio) dekmilojn da grekaj partizanoj kun familioj. Cetere, nuntempe en Grekio laboras almenaŭ 600\_000 albanoj. Ĉiujare en Grekio naskiĝas ses mil albandevenaj beboj kaj en la greka armeo servas almenaŭ dek mil albandevenaj soldatoj.  
(Ĉerpita de revuo MONATO)

## Leteroj

- Estimata sinjoro!

Mi estas eŭropa esperantisto el Kroatio kiu pretas disponigi sian tempon, konojn kaj laborkapablon por fari ion bonan.

Precizigon pri tio Vi povas trovi en la kunsendita aldono kiun Vi povas konsulti se Vi volas.

Reage je tio chi, chiuĵ ideoj, konsiloj, proponoj kaj sugestoj estas bonvenaj.

Kaze ke Vi volas reagi je tiu chi mesagho, mi antaŭdankas.

Chiukaze, chion plej bonan deziras al Vi, Via samideano, Alan Neven

- 

来信收到，十分感谢，愿为世界语共努力。

Mi tre dankas vin pro via letero ! Mi volas peni kune kun vi por Esperanto.

Jen mia vivo kaj Esperanto : <http://vera.cn.blog.163.com>

- Kara!

Kio novaĵo estas ĉe vi? Certe al vi la profesoro sendis la blogon, mi tre ĝuis ĝin. Mi ne scias, kion mi sendu al la bildoj pri Albanio, ĉar mi sendis la programon, lau kio ni veturis, kaj vi certe scias, kion vi vidas pri via lando.

Ĉe ni la autuno estas eksterordinare varma, mi sentas kiel estus oktobro. Oni diras, ke ĝi estas la globala varmiĝo, sed mi ne ĝojas, ĉar la arboj ankoraŭ ne dormas, kaj estas granda sekeco.( Kaj mi timas, ke ankaŭ la insektoj travivos la vintron.)

Amike Júlia





Julia dekstre

- mi ne bezonas rezonojn de "spertulo" Andy (Kuenzi)

se li perfekte posedas la rusan, bonege, li venu, kaj ni trovos por li pli bonan utiligon, kaj konatigos kun niaj problemoj pli detale ĉar vere problemoj estas en ĉiu lando, alie estas nur en Paradizo.



Sergey Esperantof

Pri Jugoslavi(et)o mi ekaŭdis unuan fojon ĝuste de vi, se vi agnoskas bombardadon kiel tre utila leĝa maniero por moderna mondo, do vi ŝokas min!?

Ĉu estus bonega se NATO ekdezirus bombardi vian Albanion dum diktatoreco de Enver Hodĝa?

Afganien invadis NE Rusio, sed USSR, bonvolu ne intermiksi du diversajn ŝtatojn, du diversajn politikojn, ĉar alie aŭ vi speciale misinformas, aŭ malbone scias historion plejparto da landoj ekde prahistorio ĉiam plilargigis siajn teritoriojn, ankau la via, ĉu ne?

Kia demokratio estas en Nigra Monto, se la popolo estis kontraŭ NATO?

Se Andi kaj aliaj maltrankviliĝas do estas trankviligiloj. Sergio

- *Kara, dankon pro la bulteno. Mi aparte ŝatis la poemon de Nazim Hikmet. Kiu estas la tradukinto? Mi komprenas, ke via Instituto iĝas ĉiam pli strukturita. Kial ĝi ne trnasprenas la rolon de landa asocio de UEA en Albanujo?*

*Amike Renato*



Renato Corsetti

- Kara,

Koran dankon pro la bulteno. Mi legos ghin iom pli poste. Post 2 tagoj mi ekflugos al Egiptujo kaj nun mi klopodas fini miajn taskojn en la laboro kaj la domo; prepari pakajhon, dokumentojn ktp.

Mi legadis multege pri la historio - 5000 jaroj!!! Multege okazis! Kaj la albanoj multe kontribuis - Mohamad Ali; fondinto de la lasta dinastio de reghoj! Ni vizitos kun la grupo lian moskeon, sed mi restos sola ankoraŭ 3 tagoj kaj esperas sperti pli. Chi sabate en kinejoj tra la mondo okazos vive elseno de "Aida" de MET, kaj la operejo en Kairo prezentos ghin- "Aida" en la vera loko! Espereble mi trovos bileton (kaj ne estos morte laca post 40 hora veturado de mia domo al hotelo tie).

Ghis la! Amike, Daniela

PS. Nuntempe Ismail Kadare havas rivalon - Naguib Mahfouz! Mi legadas lian "Kairo trilogion" jam dua monato.

Tre bone verkita kaj kaptivebla, tamen la tempo ne sufichos. Mi daurigos survoje, ghi estas e-libro - 5000 paghoj, mi atingis 2700.

- Tiu A. Kuenzli estas fripono, provokisto, li okupiĝu pri problemoj en sia lando kaj ne ŝovu nazon **en fremdan monakejon kun siaj reguloj** Ĉu vi forgesis kiu bombardis Jugoslavion? ĈU NE NATO? ĈU NE USONO DETRUAS LANDOJN KIUJ NE OBEAS AL USONAĈA MILITISTARO? EKMEMORU: IRAKO, LIBIO, SIRIO, KROM TIUJ ESTIS MULTAJ PAGITAJ REVOLUCIOJ EN TUNZIO, EGIPTIO, UKRAINIO KAJ EN TURKIO ONI DEZIRIS

- Hahah, kiu estas tiu idioto? Mi ne konas lin. BONE, DISKUTO FINITA. Mi deziras al vi prosperan estontecon kun via amata Putino.
- ANKAŬ MI NE KONAS VIN KAJ NE DEZIRAS KONI VIAN FI-ARTIKOLAĈON SENDIS AL MI SELIMI, MI BEDAŬRAS KE LI DIS-SENDAS VIAN FI-INFORMAĈON, Sergej
- Sergej, Andy estas spertulo pri orienteŭropaj aferoj. Li posedas perfekte la rusan. Tiel li konas ankaŭ problemojn de Rusio. Se vi ne ŝatas lian rezonadon, skribu viaj argumentojn. Rilate Jugoslavieton (Serbio kaj Montenegro) NATO bombardis ĝin ĉar Miloŝeviĉ ne haltis en sia aventuro genocideca kontraŭ albanojn tie. Unu miliono da rifuĝintoj aŭ duono de loĝantaro estus egale al 80 milionoj da rusoj! Eĉ Montenegro ne apogis Serbion. Ankaŭ Rusio invadis Afganion, kaj ekde Carisma tempo sin plilargigis fariĝante plej granda lando en la mondo. Andy kaj aliaj maltrankviliĝas pro politiko aktuala de Rusio de Putin, zorgante pri demokratio. Dankon, Bardhyl
- Tre bone! Dankon, ghis! Kun tiaj homoj ajna racia diskuto estas sensenca, se oni ne samopinias kun ili.  
Nu, perfekte mi bedaurinde ne parolas la rusan.  
La agadojn de la albanoj en Kosovo dum la milito ankaŭ necesas kritike vidi. Ili ne estis sendangheraj bovidoj dum la milito. Mi same malshatas Thaci kaj Haradinaj kaj similajn tipojn kiel mi malshatas Milosevic, Karadzic, Seselj kaj Tudjman. Sendube la albanoj devas esti konsiderataj kiel cefaj viktimoj de la serba politiko, same kiel ankaŭ la muzulmanoj de Bosnio. La albanoj ja defendis sin, sed militkrimuloj kaj viktimoj ekzistis sur chiuj flankoj, chu ne. Sed pri chio tio vi ja sendube bone konscias.  
En cio tio oni devas ankaŭ kritike vidi la farojn kaj krimojn de Usono, kiujn ili faris en Koreio ghis Vietnamio, Irako ktp. ktp. Bedaurinde mi devis akre revizii mian opinion pri la usona politiko, pri kio mi totale seniluziighis, sen adopti la primitivan unuflankan kontrau-usonon sintenon de iu Corsetti au ceterah similaj idiotoj de la Eo-vomado.  
ghis, Andy



Andy Kuenzli

- Multan dankon pro tiu numero de via Bulteno! Mi petas, se eble, publikigi en via albana revuo la aldonitan informilon-varbilon de tute nova fakgrupo: Esperanto-Numismatika Asocio (ENA). Samtempe ni esperas varbi la unuan membron en via lando kaj poste tutan vicon! Specialan saluton al mia kara samideano Edmond Ludwig!

Amike kaj numismate, Mag. Bert Boon



Bert Boon

Iniciatinto de ENA Chefredaktoro de “Esperanta Numismatiko” Fakdelegito pri numismatiko

Esperanto-Numismatika Asocio



ENA

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 106 individuaj membroj kaj 21 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)!

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Inciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

- Anstataŭ publiki malseriozajn verkojn Bardhyl devas montri al ni kiel aŭ se socialisma societo povas vere ekzisti aŭ ĉu ĝi estas vere realigebla.

Makiavelo jam diris:

"Oni kritikis min pro miaj libroj instrui tiranojn establi tiranecon, sed samtempe ili instruas la popolon al ĝi sindefendi!" Bondezire, Ĵajro

- Ĉiu povas legi, ke per miaj tradukoj kaj propraj tekstoj mi kontribuis al ĝisfunda kritiko de Stalino. Mi pensas ke la albana ĉefo, kiu nomis sin komunisto, estas ne malpli kritikenda. Sed tiu teksto de "junaj aŭtoroj" uzis malseriozan polemikon, per kiu ili



kontentigis siajn abomenon, sed per kiu ili des pli sentigas la bezonon okupiĝi serioze pri la stalinista albana reĝimo.

Bardhyl, ĉu io tia ekzistas? Ĉu eble vi, kiu tiutempe en Albanujo oficiale instruadis marksismon (nu, "marksismon-leninisman") kaj do devus esti iel kompetenta por serioze analizi tiun reĝimon, ne povus fari tiun taskon? Kore, Vilhelmo Lutermano.

- Certe, mi farus analizon. Fakte tion faris multaj aliaj ĝis nun. Sed la formo inventita de tiuj junuloj, laŭ mi estas tre efika, ĉar per artisma metodo oni povas altiri pli da atento. Ne temas simple pri abomeno, sed pri tre konciza prezento de reĝimo de ŝtata terorismo aplikita de ĉefo de totalisma ŝtato de lando kun loĝantaro en 1945 iom pli ol miliono! Ĝi estis tipo de socialismo instalita en duono de Eŭropo kaj en Azio, sed kial ne ankaŭ en Kubo.

Siatempo kiam mi instruis marksismo leninisman krom matematikon en universitato, ankaŭ mi estis iom indoktrinita, tiom forta kaj efika estis propagando totalisma. Pro ekstrema izoliteco mi ne havis aliron al aliaj demokratiaj doktrinoj kaj pensus ke Partio havis pravan kaj justan politikon. Kiam mi deĵoris en fabriko aŭ kamparo mi konstatis ĝeneralan mizeron sed ne kuraĝis kritiki ĉar ĉiutage oni arestis kaj punis homojn kritikantajn.

Kial vi ne kritikus Stalinon, demandis iam Hruŝevon.

Sekvis silento.

Kiu parolis, demandis Hruŝev.

Denove silento

Jes, nun mi kredas ke vi ricevis respondon, diris Hruŝev.

Post 1991, kiam Albanio malfermiĝis, mi havis okazon konatiĝi kun multaj veroj. Interalie fortan influon havis ĉe mi la verko *La Faŝismo* de Zheliu Zhelev en esperanto traduko en 1992.

Mi dankas vin pro splendida libro Stalinismo, sed tio ne devas ŝajni al homoj ke tamen socialismo estas ebla kaj humanisma aktuale.

Ankoraŭ granda parto de eksaj komunistoj kaj ties proksimuloj nostalgias pri Enver Hoxha, kvankam hodiaŭ ili sin esprimas libere, moviĝas libere eksterlanden, elektas mem loĝlokon kaj laborejon, ktp. Antaŭe la ŝtato patro zorgis pri ĉio. Vi devus nur silenti kaj plenumi ties ordonojn. Bardhyl

- Kara!

Hodiaŭ vespere estis la prezentado!

Estis grandega sukceso, ni prezentis 175 fotojn, kaj multajn informojn pri Albanio. Mi deziras danki al vi la multajn helpojn. Mi bedaŭras, ke mi ne povas sendi al vi la tutan materialon, ĉar ĝi estas grandega. La publiko admiris, kiel bela estas via lando.

Amike Júlia

- Hieraŭ mi finlegis la reklamitan romanon de Bashkim Shehu (Traduke: La ludo, la falo de la ĉielo).

Post lego mi subite pensis pri la jeno:

post la falo de la Hoxha-reĝimo certe ne malaperis tuj la roturistoj kaj arestantoj de tiu epoko kaj certe ne mankis la emon sin venĝi, kiam la viktimoj estis liberigitaj. Ĉu venĝoj okazis? En la gazetaro mi kvasaŭ nenion legis komence de la 90-aj jaroj.

Jen afero, kiu certe ankaŭ interesus la legantojn de via bulteno. Ĉu ?

Plej esperantiste!

E.L.

PS En la romano, la ruzaj, perfidaj kaj kruelaj arestoj de la monaĥoj ege impresas.



Edmond Ludwig

- Kara Edmond, kiel vi jam vidis en la "Intervjuo kun diktatoro", la totalisma reĝimo en Albanio al kiu ege kontribuis ankaŭ la patro krimulo de Bashkim Shehu, estis aparte kruela. Sed la paca tranzicio de unupartia sistemo al pluralismo ne notis amasan venĝon kontraŭ persekutistojn kaj eksaj altrangulojn komunistajn. Post 1992 oni arestis kelkajn politburoistojn inkluzive la vidvinon de diktatoro Nexhmije kaj posteulon de Enver Hoxha, Ramiz Alia kiuj pasigis kelkajn jarojn en prizono. La akuzo estis pro "genocido kontraŭ popolon" sed tiu akuzo falis kaj anstataŭiĝis per akuzo "pro trouzado de mono publika"...

- Vin elkore salutas Gafur Mirzo el Uzbekio. Mi estas profesia aktoro kaj kantisto. Mi kun granda ĝojo volas informi vin ke antaŭnelonge (2018. 06. 28.) estis oficiale registrita nia Landa E-Asocio. De tago al tago pli kaj pli multiĝas niaj gesamideanoj en Uzbekio. Ĝojiga afero ke denove revigliĝas nia favorata movado en nia regiono. Ĝis nun jam en tri grupoj oni ĝislernis elementan E-kurson kaj baldaŭ komenciĝos la kvara. Ni UzEA-anoj plezure volas havi ĉiaman kontakton kun vi niaj karaj. Ni ĉiam estas pretaj bonvenigi kaj gastigi vin en nia ĉarma kaj belnatura Lando. Kiel esprimo de nia estimo mi sendas al vi kelkajn E-kantojn el mia E-programo.

Bondezire kaj altestime Gafur Mirzo.  
Prezidanto de UzEA



- Dankletero

Estimata s-ro! Koran dankon pro via tuja respondo kaj atento! Jes, ankau mi ghojas. Mi kredas ke ni kune havas fortan verdan kontakton por chiam. Mi esperas ke baldau ie, en iu I-E-arangho ni renkontighos. Elkorajn salutojn kaj bondezirojn al niaj karaj gesamideanoj en Albanion. Ni chiam regule ricevas vian bultenon kaj plezure legas ghin. Refojan dankon kaj sukcesojn al vi! Altestime kaj amike Gafur

- 

jam estas novembro kaj mi ankoraŭ ne trovis tempon respondi al vi. Fakte mi havus tempon, sed vespere mi ne ŝatas sidi antaŭ la komputilo kaj forŝovas ĉion al morgaŭ kaj la sama okazas denove. Ni ja havas konatan proverbon en la germana: "Morgen, morgen nur nicht heute, sagen alle faulen Leute." Fakte ĝis nun ni havas senpluvan someron/aŭtunon kaj niaj kampoj, riveroj sopiregas pluvon kiu ne venas ĉi-tien. Tamen la vetero plaĉas al mi ĉar ĉiutage mi iomete promenas aŭ migras kun la loka migrada organizo "Eifel-Verein". Ĉi-posttagmeze mi veturis al Rhöndorf (la loko kie loĝis K. Adenauer), kelkajn km sude de Bonn, por vidi la nunan staton de la rivero "Rhein". Sekvos kelkaj fotoj. Mi esperas ke vi ambaŭ bonfartas. Ĉi-semajne mi vidis anoncon por interesa ŝipveturado al i.a. Albanio. Ŝajnas, ke via lando fariĝas pli kaj pli interesa por turistoj. La vojaĝo enhavas flugon al Dubrovnik tien-reen, kaj ŝipveturadon ĝis Korfu kun

vizito de Tirana, Vlorë, Saranda, Butrint.  
Ĝis iam, kore, Trude

- Cele omaĝi la 159-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof, okaze de la Zamenhofa Tago 2018, ni planas fari filmeton, kiu prezentos niajn esperantistajn geamikojn el diversaj landoj. En tiu filmeto, ĉiuj ili deklamas la kortuŝan poemon "La Espero" verkitan de la kreinto de Esperanto.

Pro tio, ke ni tre ŝatus, ke Vi ankaŭ partoprenu en ĝi, ni invitas Vin sendi al ni **filmeton, en kiu Vi deklamas tiun poemon.**

Do ĉu Vi konsentas kuniĝi al ni por tiu omaĝa memorigo? Se vi jesas al tiu ĝojiga kunlaboro, ni afable petas **la jenon:**

**(a) nur uzi** saĝtelefonon por fari la filmeton; **(b)**dum la filmado uzi la aparaton en ĝia horizontala pozicio; **(c)** stari kontraŭ blanka muro aŭ klara fono; **(ĉ)** la spaco uzata devas esti silenta, prefere en fermata ĉambro; **(d)**kunporti la Esperantan distingilon **(e)** fojfoje rideti. **(f)** b.v. sendi la filmeton **ĝis la 20-a de Novembro.**

Aldone mi sendas la tekston de la poemo "La Espero".

**Ni ĉiuj el la teamanoj de E-fako de LBV kore deziras kaj esperas vian partoprenon. Bonvolu konfirmi tion al ni.**

Kun anticipa ega danko pro via sindonemo,

el la centra sidejo de Legio de Bona Volo en urbo San-Paŭlo, Brazilo,

Vin plej fratamike salutas, Maria Aparecida da Silva [www.bonavolo.com](http://www.bonavolo.com)

- Mi tre dankas al vi la senditan revuon. Esperantujo estas malgranda : Saliko (Raita Pyhala ) estas nia amikino, loĝis jam ĉe ni vizitis nian klubon, prelegis tie, vizitis nian ĝardenon. Daure korespondas kun du niaj klubanoj.

Ĉu vi intencas partopreni au la venontjara U.K. au la Baltiaj tagoj? Mi ankoraŭ hezitas. Baldau vizitos la "bonajn infanojn" la "Avo Frosto" au Sankta Nikolao. Ĉu en via lando oni festas tion? Bonvolu skribi al mi pri viaj tradiciaj kutimoj en via lando, kaj vian opinion.  
Amike Júlia

### **El esperanto revuoj**

- (El la revuo Europa Bulteno, sept. 2018)

Zlatko Tišljarić





Zlatko Tisljar

## STATISTIKOJ PRI LINGVOJ EN EŬROPO

Okaze de la ĉi-jara Eŭropa tago de lingvoj (la 26-a de septembro) la Konsilio de Eŭropo aperigis informojn pri statistikoj pri lingvoj en Eŭropo. Inter la datumoj estas la jenaj:

65% de eŭropanoj parolas minimume unu fremdlingvon. Unuan pozicion tiusence havas Svedio kun 97%, sekvas Latvio, Danlando kaj Litovio kun 96%, Luksemburgo (95%), Finlando kaj Malto kun 92% kaj Estonio kun 91%. Britio estas en la lasta pozicio kie 65% parolas neniun lingvon, Antaŭlasta estas Rumanio kie 64% parolas neniun fremdlingvon, en Bosnio kaj Hercegovino tiu procento estas 61%, en Albanio 60% kaj en Hungario 58%.

Kompreneble tiu statistiko estas duba ĉar ja temas pri enketo en kiu la civitanoj mem decidas kiom da fremdlingvoj ili konas kaj kutime tio estas troigitaj ciferoj, aparte konsiderante ke individuoj tre subjektive taksas sian scion. Se oni rigardas la plej altajn ciferojn, ŝajnas al mi ke nur la skandinavoj vere estas rekorduloj dank' al ilia lerneja sistemo kaj riĉeco, sed aliaj profitis de iamaj mastroj kiuj regis ilin.

Baltaj landoj havas altajn ciferojn ĉar ili bone parolas la rusan kiun ili devis lerni en la tempo de Sovetunio kaj ĉar ankoraŭ tie vivas multaj rusoj. Slovenio estas rekordulo kun homoj kiuj parolas tri aŭ pli da lingvoj dank' al tio ke ili turismas ofte al Kroatio kaj konas la kroatan, multaj konas la najbaran germanan kaj ili diligente lernas ne nur en lernejoj la anglan. Simpla konstato: Tiuj kiuj havis dum longa periodo mastrojn, tiuj profitis de tio, almenaŭ lingve.

- [Brazilo Brulas - La incendio en nacia muzeo kaj en politika konflikto al kiu Roger Waters ĵetis brulaĵon](#)



Estas kanto, kiu diras en sia poezio ion kiel: "Ni antaŭeniras du paŝojn kaj revenas unu, sed ĉiam daŭrigas". Se paroli pri la politika situacio en mia lando, Brazilo, triono de miaj samlandanoj konsentos ke ni ja retropaŝis, triono ke ni avancis, dum la alia parto tute ne pensas pri tio. Miasperte, militarismo kaj la giganta konservatismo, strebanta ĉesigi la nehaltigeblan homan progreson, estas sendube signo ke la paŝoj reen estis multaj.

Antaŭ du jaroj, Jair Bolsonaro estis apenaŭ konata nacia deputito. Li fakte nur ek(fi)famiĝis kiam, ĉe la voĉdono por la forigo de la eks-prezidantino Dilma, li parole omaĝis al eksa generalo, konata torturanto de nia ne tre fora militista diktaturo (1964-1985). Kiel homo, kiu diras tiom da absurdaĵoj, povas fariĝi prezidanto? Ne facilas respondi. Sed mi persone tion aŭguris jam ekde kiam D. Trump iĝis prezidanto de Usono.

Bolsonaro eĉ pli ruze uzis la saman retorikon kaj samajn metodojn. La incitoj kaj malrespekto al minoritatoj markis lian figuron. Dum la tuta mondo avertis pri la danĝero elekti homon kiel li, granda parto de la popolo kredis al, se ne mis-, almenaŭ certe troigitaj informoj disvastigitaj tra la reto, al la t.n. "post-veroj", kiuj kreis la ideon de nepre venkanta malamiko (la komunistoj, la maldekstruloj), kie troviĝus la kialoj de ĉiuj niaj problemoj.

Dividita kaj elreviĝinta de la politika sistemo, en kiu li mem kreiĝis, la popolo volis venĝi sin, sed ne scias ke, se entute estas malamiko, ĝi devus esti la elito — la posedantoj de la grundo kaj la financistoj — kiu regas la landon (kaj la mondon). Tiuj, kiuj interesiĝas nur pri elsuĉado de niaj riĉaĵoj kiel eble plej multe kaj rapide. Ili estas kaŝitaj malantaŭ ĉiuj politikistoj. La amaskomunikiloj – vitrino de la kapitalo – ĵetas lumon nur sur la politikan kaĉon, kie la "malamiko" havas facile rekoneblan vizaĝon.

Nia fragila demokratio riskas. La kreskantaj atakoj kaj minacoj al indiĝenoj, nigrujoj kaj la

GLAT-komununo demonstras tion, kion mia fratino al mi konfidis: Bolsonaro eble malfermis la pordojn de la infero, de kie eliras demonoj antaŭe kaŝitaj. Restas al ni rezisti kontraŭ tiom da maltoleremo kaj kune konstrui denove la ponton de respekto kune kun niaj amikoj, najbaroj kaj familianoj. Dividi kaj konkeri estas ilia moto, ni devas trovi mezan vojon.

"Pepe" Mujica, batalanto de la 1960 jaroj, eks-prizonulo, kiu poste fariĝis prezidanto de Urugvajo, nia najbara lando, diris: "La lukto por socia justeco estas solidareco kun tiuj, kiuj estas subpremataj. Sed finfine, ankaŭ por tiuj kiuj subpremas".

La elŝutado de tiu ĉi numero eblas nur por abonantoj. Se vi ankoraŭ ne estas abonanto, vi povas tuj aboni ĝin per reta abonilo. Por elŝuti retan *Kontakto* vizutu: [uea.org/revuoj/](http://uea.org/revuoj/)

Agrablan legadon Rogener Pavinski Redaktoro de Kontakto

### Esperanto en bildoj



40							41						
Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14













# FARU PAŬZON

KUN  
ESPERANTO KLUBO  
de NORDA TEKSASO!



*SED NE FORGESU  
LA AKUZATIVON!*

La latina estis  
La angla estas  
**ESPERANTO** estos

----- لاطینی تھی

----- انگریزی ہے

----- اسپرانتو ہوگی

The Latin was!

The English Is!

♥ Esperanto will be!





**SEN LI, TIO NE EKZISTUS.**



**SEN VI, TIO NE EKZISTOS.**









































































## O Corpo Humano em Esperanto

























	<b>KI-</b>	<b>TI-</b>	<b>I-</b>	<b>ĈI-</b>	<b>NENI-</b>
<b>-U</b>	<i>kiu</i> demandovorto pri identeco	<i>tiu</i> montrovorto pri identeco	<i>iu</i> nedifinita persono, aĵo aŭ afero	<i>ĉiu</i> tutampleksa vorto pri persono, aĵo aŭ afero	<i>neniu</i> nea vorto pri persono, aĵo aŭ afero
<b>-O</b>	<i>kio</i> kiu afero	<i>tio</i> tiu afero	<i>io</i> iu afero	<i>ĉio</i> ĉiu afero	<i>nenio</i> neniu afero
<b>-A</b>	<i>kia</i> de kiu speco	<i>tia</i> de tiu speco	<i>ia</i> de iu speco	<i>ĉia</i> de ĉiu speco	<i>nenia</i> de neniu speco
<b>-ES</b>	<i>kies</i> de kiu(j)	<i>ties</i> de tiu(j)	<i>ies</i> de iu	<i>ĉies</i> de ĉiu(j)	<i>nenies</i> de neniu
<b>-E</b>	<i>kie</i> en kiu loko	<i>tie</i> en tiu loko	<i>ie</i> en iu loko	<i>ĉie</i> en ĉiu loko	<i>nenie</i> en neniu loko
<b>-AM</b>	<i>kiam</i> en kiu tempo	<i>tiam</i> en tiu tempo	<i>iam</i> en iu tempo	<i>ĉiam</i> en ĉiu tempo	<i>neniam</i> en neniu tempo
<b>-AL</b>	<i>kial</i> pro kio	<i>tial</i> pro tio	<i>ial</i> pro io	<i>ĉial</i> pro ĉio	<i>nenial</i> pro nenio
<b>-EL</b>	<i>kiel</i> en kiu maniero/grado	<i>tiel</i> en tiu maniero/grado	<i>iel</i> en iu maniero/grado	<i>ĉiel</i> en ĉiu maniero	<i>neniel</i> en neniu maniero
<b>-OM</b>	<i>kiom</i> kiel multe	<i>tiom</i> tiel multe	<i>iom</i> ne tre multe sed ankaŭ ne malmulte	<i>ĉiom</i> la tuta kvanto	<i>neniom</i> nenianombre, neniakvante

 <b>pomo</b>	 <b>orango</b>	 <b>akvomelono</b>	 <b>ananaso</b>	 <b>vinbero</b>	 <b>brasiko</b>	 <b>piro</b>
 <b>persiko</b>	 <b>banano</b>	 <b>mirtelo</b>	 <b>tomato</b>	 <b>terpomo</b>	 <b>mango</b>	 <b>kukumo</b>
 <b>cepo</b>	 <b>papriko</b>	 <b>frago</b>	 <b>averoo</b>	 <b>papajo</b>	 <b>laktuko</b>	 <b>fungo</b>
 <b>citrono</b>	 <b>kivo</b>	 <b>liĉio</b>	 <b>guŝo</b>	 <b>ignamo</b>	 <b>karoto</b>	 <b>kukurbo</b>
 <b>spinaco</b>	 <b>grapfrukto</b>	 <b>fazeolo</b>	 <b>ĉerizo</b>	 <b>brokolo</b>	 <b>melono</b>	 <b>ĉajoto</b>
 <b>jakvo</b>	 <b>rafano</b>	 <b>figo</b>	 <b>gujavo</b>	 <b>olivo</b>	 <b>pasifrukto</b>	 <b>kapsiko</b>
 <b>maizo</b>	 <b>rizo</b>	 <b>pruno</b>	 <b>manioko</b>	 <b>frambo</b>	 <b>florbrasiko</b>	 <b>gvaranao</b>
 <b>apio</b>	 <b>ajlo</b>	 <b>manjoketo</b>	 <b>sukerpomo</b>	 <b>avokado</b>	 <b>melongeno</b>	 <b>petroselo</b>
 <b>napo</b>	 <b>pizo</b>	 <b>abrikoto</b>	 <b>palmomedolo</b>	 <b>mandarino</b>	 <b>kreso</b>	 <b>akajuo</b>
 <b>granato</b>	 <b>kokoso</b>	 <b>asparago</b>	 <b>persimono</b>	 <b>sukerkano</b>	 <b>beto</b>	 <b>zingibro</b>

# Unuaj verboj

<p>Mi aspektas Vi / Ci aspektas Li / Ŝi / Ĝi aspektas Ni aspektas Vi aspektas Ili aspektas</p> <p><b>Esti</b></p> 	<p>Mi havas Vi / Ci havas Li / Ŝi / Ĝi havas Ni havas Vi havas Ili havas</p> <p><b>Havi</b></p> 	<p><b>Stari</b></p> 	<p><i>Sidiĝu!</i></p> <p><b>Sidi</b></p> 	<p><b>Kuŝi</b></p> 			
<p><b>Aĉeti</b></p> 	<p><b>Doni (aŭ ricevi)</b></p> 	<p><b>Helpi</b></p> 	<p><b>Atendi</b></p> 	<p><b>Sekvi</b></p> 	<p><b>Konduki (veturi)</b></p> 	<p><b>Loĝi</b></p> 	
<p><b>Naĝi (sin bani)</b></p> 	<p><b>Danci</b></p> 	<p><b>Desegni</b></p> 	<p><b>Fari</b></p> 	<p><b>Diri aŭ kribi (paroli)</b></p> 	<p><b>Aŭskulti aŭ aŭdi</b></p> 	<p><b>Ne scii</b></p> 	
<p><b>Forgesi</b></p> 	<p><b>Voli</b></p> 	<p><b>Trovi</b></p> 	<p><b>Elekti (serĉi)</b></p> 	<p><b>Alporti (kunporti)</b></p> 	<p><b>Provi</b></p> 		
<p><b>Vekiĝi</b></p> 	<p><b>Leviĝi (stariĝi)</b></p> 	<p><b>Lavi (sin)</b></p> 	<p><b>Vestiĝi</b></p> 	<p><b>Malsupreniri</b></p> 	<p><b>Manĝi</b></p> 	<p><b>Trinki</b></p> 	<p><b>Eliri</b></p> 
<p><b>(For)iri (malproksimiĝi)</b></p> 	<p><b>Kuri (rapidi)</b></p> 	<p><b>Promeni</b></p> 	<p><b>Marŝi</b></p> 	<p><b>Ludi</b></p> 	<p><b>Kapti</b></p> 	<p><b>(Al)veni</b></p> 	<p><b>Eniri</b></p> 
<p><b>Malfermi la pordon</b></p> 	<p><b>(Re)fermi la pordon</b></p> 	<p><b>Labori</b></p> 	<p><b>Skribi</b></p> 	<p><b>Kisi</b></p> 	<p><b>Supreniri</b></p> 	<p><b>Enlitiĝi</b></p> 	<p><b>Dormi</b></p> 

# Esperantista fajfsignalo

proponita de la Svisa Societo al la tutmonda esperantistaro:



Es - per - an - to



# Diversaj vestaĵoj



ĉapelo

(frost)ĉapo

kaskedo

kufo

skarpo  
(ŝultrotuko)

koltuko

okulvitroj



bebtuko  
(bebvindo)

brustovesto  
(bebvesto)

subĉemizo

noktoĉemizeto

t-ĉemizo

ĉemizo

trikvesto  
(svetero)



veŝto

pulovro

jako

(pluv)mantelo  
(anorako)

pluvombrelo

gantoj  
(mufgantoj)

zono (fermas  
per buko)



banto kaj  
kravato

pantalono  
(ĝinzo)

ŝorto

kalson(et)o

robo

jupo

mamzono  
kaj tangao



ŝtrumpo

ŝtrumpeto

ŝuoj  
(sandaloj)

botoj

pikkalkanumoj

domŝuoj  
(pantofloj)

pijamo



brakhorloĝo

brakingo  
(pojnoĉeno)

ĉirkaŭkolo  
(koliero)

orelringoj  
(juvelo)

(fingro)ringo  
(sigelringo)

broĉo

traborajoj  
kaj tatu(aj)o





# Meteoj Vetero



**Suna**  
serena tago



**Nubo**



**Kumuluso**



**Nimbuso**



**Pluvo**



**Fulmotondro**  
kun pluvego



**Fulmo**



**Neĝo kaj**  
pluvo



**Hajlo**



**Neĝo**



**Prujno**



**Nebulo**



**Tornado**



**Glacio**



**Vento**


# UNUA FUNDAMENTA TABELO

Esperantaj strukturaj elementoj


<b>Bov</b> <sup>0</sup> Radiko aŭ kluzono																							
										<b>O</b> <sup>1</sup> Substantivo													
										<b>A</b> <sup>2</sup> Adjektivo													
										<b>J</b> <sup>3</sup> Purulo													
										<b>I</b> <sup>4</sup> Infinitivo													
<b>Bo</b> <sup>5</sup> Parancaro pri gendado	<b>Dis</b> <sup>6</sup> Aparigo, malunigo	<b>Ek</b> <sup>7</sup> Komenco de subito ago	<b>UI</b> <sup>8</sup> Persono kun la karaktero	<b>In</b> <sup>9</sup> La neakcepta sakso	<b>Aĵ</b> <sup>10</sup> Konkrete afero	<b>Ej</b> <sup>11</sup> Loko destinita por	<b>Ec</b> <sup>12</sup> Kvalito aŭ stato	<b>Em</b> <sup>13</sup> Inklino al io	<b>Ig</b> <sup>14</sup> Ebla, kiel aŭ fariga ago	<b>On</b> <sup>15</sup> Faras frakcion nombrovorton	<b>Et</b> <sup>16</sup> Drohujo	<b>As</b> <sup>17</sup> Estonteco	<b>N</b> <sup>18</sup> Akuzativo										
<b>Eks</b> <sup>19</sup> Iam esinta, ne plu ekzista	<b>Mal</b> <sup>20</sup> La rekta kontraria senco	<b>Re</b> <sup>21</sup> Rigardo, redono	<b>An</b> <sup>22</sup> Membro de kolektivo	<b>Id</b> <sup>23</sup> Naskito	<b>Il</b> <sup>24</sup> Instrumento, aparato, rimedo	<b>Ing</b> <sup>25</sup> Tereno, en kiu trankvili, trovi sin	<b>Ism</b> <sup>26</sup> Dubino, sistemo	<b>Ebl</b> <sup>27</sup> Povas esti farata	<b>Iĝ</b> <sup>28</sup> Tranŝiĝi al nova stato, laci, agi	<b>Obl</b> <sup>29</sup> Faras multiplikan nombrovorton	<b>Eg</b> <sup>30</sup> Aĝgranda	<b>Ĉj</b> <sup>31</sup> Karesa nomo de vino	<b>Is</b> <sup>32</sup> Pasinteco										
<b>Ge</b> <sup>33</sup> Amabla sekso	<b>Mis</b> <sup>34</sup> Eraraco, falaco, malĝusteco	<b>Ist</b> <sup>35</sup> Profesio aŭ adeptio		<b>Estr</b> <sup>36</sup> Kiu gvidas kaj decidas, maistro	<b>Ar</b> <sup>37</sup> Tuto aŭ kolekto de	<b>Uj</b> <sup>38</sup> io, kio enhavas en ĉirkaŭ	<b>Ind</b> <sup>39</sup> Meritas esti farata	<b>Ad</b> <sup>40</sup> Deira ago	<b>Op</b> <sup>41</sup> Faras kolektivan nombrovorton	<b>Aĉ</b> <sup>42</sup> Malbona kvalito, senutilaĵo	<b>Nj</b> <sup>43</sup> Karesa nomo de vino	<b>Os</b> <sup>44</sup> Estonteco											
<b>Pra</b> <sup>45</sup> Antaŭ tre longa tempo, primitiva	<b>Fi</b> <sup>46</sup> Malatinda, Mo- rala kondamno				<b>Er</b> <sup>47</sup> Parto de objekto			<b>End</b> <sup>48</sup> Devas esti farata			<b>Um</b> <sup>49</sup> Sen difinita senso	<b>Us</b> <sup>50</sup> Kondicionalo											
										<b>U</b> <sup>51</sup> Imperativo													
										<b>E</b> <sup>52</sup> Aŭtoritato													
										<b>Ant</b> <sup>53</sup> Estonteca aktiva participo													
										<b>Int</b> <sup>54</sup> Pasinteca aktiva participo													
										<b>Ont</b> <sup>55</sup> Estonteca aktiva participo													
										<b>At</b> <sup>56</sup> Estonteca pasiva participo													
										<b>It</b> <sup>57</sup> Pasinteca pasiva participo													
										<b>Ot</b> <sup>58</sup> Estonteca pasiva participo													

- Prefiksoj
- Numeralaj sufiksoj
- Partecipaj sufiksoj
- Substantivaj sufiksoj
- Universalaj sufiksoj
- Finajoj
- Adjektivaj sufiksoj
- Aliaj sufiksoj
- Akuzativo


**Kush është i shkathet në matematik  
Gjeni sa bëjnë? "99% Gabojn"**



$$15 + 15 + 15 = 45$$



$$6 + 6 + 15 = 27$$



$$12 + 6 + 15 = 33$$



$$16 + 12 \times 8 = \text{🤪}$$

$$16 + (12 \times 8) = 112 \text{ 👍 🙌}$$

Trovu sumon




$$\text{shoe} + \text{shoe} + \text{shoe} + \text{shoe} + \text{shoe} + \text{shoe} = 30$$

$$\text{man} + \text{man} + \text{shoe} + \text{shoe} = 20$$

$$\text{ice cream} + \text{ice cream} + \text{man} = 13$$

$$\text{shoe} + \text{man} \times \text{ice cream} = ?$$





Europa lingvofamilio

Kiu taso pleniĝos la unua?



**Cili filxhan  
do mbushet  
i pari?**





## Informaĵoj

- Aperis nova albana romano en Esperanto (Revuo Esperanto, oktobro 2018)

**Panoramo de kuba popola muziko.** Janny Quiñones Valdés. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2017. 54p. 22cm. Ilus. ISBN 9782369600909. Longa eseo pri muzikaĵoj kaj muzikiloj tipe kubaj. € 7,50

**Poemo de Utnoa.** Abel Montagut. s.l.: CreateSpace, 2018 (2-a eld). 251+7p. 23cm. ISBN 9781718814424. Reviziita eldono de unu el la ĉefverkoj de la originala Esperanta literaturo. € 11,40

**Tao de la vojaĝanto. Dek ses ĉinaj legendoj kaj infanraktonoj.** Majra Nuñez Hernández k.a. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2018. 75p. 22cm. ISBN 9782369601180. Legendoj reverkitaj en Esperanto. € 7,50

**Tempo de la kaprinoj, La.** Luan Arif Starova. En Esperanton trad. T. Chmielik, B. Selimi. Đurđevac / Świdnik / Lublin / Bjalistoko: DEC / BES / Libro-Mondo / Ars Libri, 2018. 120p. 24cm. Bind. ISBN 9788363698218. Historia kaj alegoria, fantasta kaj folklora, la romano situas tempe en la postmilita rekonstruperiodo de la jugoslavia Makedonio. € 18,00

**Zamenhof. Vida, obra e ideias d**

- Konkurso

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto.

La konkurso konsistas el du branĉoj:

poezio: maksimuma longo ne fiksitaj;

prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

La rezultoj estos anoncataj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, blogo, ktp). Ne eblas partopreni per traduko de propraj verkoj, ankaŭ se la itala originalo estas eldonita.

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it) indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia, indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuajo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Premioj: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof, por la aliaj la premio konsistas el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo "poezio" havas titolon "Gaudenzio Pisoni"; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon "Lina Gabrielli". La disdono de la premio okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, tiu estos kontaktata pri la livero. Limdato por la sendado estas la 30-a de aprilo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Carlo Minnaja, sekretario: Ivan Orsini; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Nicolino Rossi, Nicola Ruggiero; por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Nicola Minnaja, Norberto Saletti. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je

unua publikigo. Por pliaj informoj : [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it) FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

- Madragoa

Greka komercoŝipo je proksimume 2,4 mil jaroj estis eltrovita en bona stato de konserveco, proksime de la marbordo de Bulgario. Tio jam estas konsiderata la sendifekta dronintaĵo plej antikva en la mondo.

La navigilo, kiu estas 23 metrojn longa, datiĝas de 400 a.K. kaj estis uzata por traveturigi inter la grekaj kaj mediteraneaj kolonioj, tra la Nigra Maro.

La rudro, benkoj kaj eĉ partoj de la kelo estas preskaŭ sendifektaj, pro aparteco de la profundegaĵoj en kiuj la ŝipo estis trovita: pli ol 2 mil metrojn sube la oksigeno en la mara medio estas minimuma, kio ebligas, ke organaj materialoj restu konservataj dum miloj da jaroj.

Ankaŭ, pro tiu granda marprofundeco, la ŝipo neniam estis trovita de subakvistoj. Ĝi estis eltrovita nun danke al entrepreno, kiu utiligas kameraojn faritajn speciale por filmadoj en profundaj akvoj – antaŭe utiligitajn en ekspluatado de maraj kampoj de petrolo – alkroĉitajn al robotoj kiuj traidentigadas la marfundon.

*“La fakto, ke ŝipo el la klasika mondo ĝisvivis la nuntempon sendifekte, estas io, kion mi neniam kredus ebla”*, deklaris la ĉefa esploristo de la entrepreno, Jon Adams, profesoro de la Universitato de Southampton, en Anglujo. *“Tiu eltrovo ŝanĝos nian komprenon pri la konstruado de ŝipoj kaj pri la navigado en la Antikveco”*.

- Estimataj:

Mi pardonpetas se vi jam sciis pri ili, sed jen ligiloj al niaj novaj retpaĝoj ekde la pasinta junio 2018:

Duolinga renkontiĝo:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---duolingva-renkontigo>

Ordesa valo:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---ordesa-valo>

Faldfolio pri Esperanto:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---faldfolio-pri-frateco>

Eŭropa tago de lingvoj:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---europa-tago-de-lingvoj>

Ateliero pri Esperanto:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/ateliero-pri-esperanto>

Vizito el Jena:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---vizito-el-jena>

En "El Periódico de Aragón":

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---periodico-de-aragon>

Aragona renkontiĝo:



<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---aragona-renkontigo>

Kunvoko: Zamenhof-tago:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/2018---x/2018---kunvoko-zamenhof-tago>

Salutojn kaj ĝis baldaŭ! Sabina

### **Beletraĵoj**

- **Albana poetino**

Mimoza Ahmeti



### **Via pasio**

Diru min, kie do iris via pasio?

Diru min, kie do estas ties insistemo?

Tiu fera pacienco

Per kiu ĝi movas eĉ la tempoakson.

Ne trompos min en la espero,

Ne rompos la donitan parolon!

Se ni ligus lin per longaj ŝnuroj de la soleco,

Kaj en la abismojn de la malplenaj koroj forĵetus,

Centoble li resurektus,

Kvazaŭ la suno li proklamiĝus,

Viva,

Puncanima,

Via pasio!

### **Kanzono por Ljuis Ljak**

La vojo kiel la vojo,

Kun ĝiaj teruraĵoj.

Vi ne ekiru,- diras vi,- jam nun

Por mi estas ja teruro

Ne fari kion mi volas

Ĉar mian plezuron mi sekvas

Kaj neniun mi demandas

La milito kiel la milito

Kun ĝiaj tomboj

Vi ne mortigu,- diras vi, - estas ja tiom juna.

Pri la morto kiu scias

Sed eĉ se ni scius

Mian plezuron mi sekvas

Kaj neniun mi demandas.

La kanzono kiel la kanzono

Kun ĝiaj krioj.

Vi ne kantu, diras vi, - en ĉi tiu funebro.

La kanzono apenaŭ haltigas,

Sed eĉ se oni ĝin haltigus,

Mian plezuron mi sekvas,

Kaj neniun mi demandas.

## **Kiel vi povas forgesi tiujn okulojn**

Ne eblas ke la homo forgesu la homon,  
La dorsoj turniĝas, foriras kontraŭdirekten  
Sed la penso..Ne konas ĝi turniĝon.  
Ne eblas forgesi unu la alian.

Kiel vi povas forgesi miajn flueblajn okulojn,  
Kiu estas kvazaŭ du ĝojaj kaj esperigaj sojloj,  
Kiu estas kvazaŭ maro inter la buŝo kaj la frunto,  
Du sovaĝaj floroj, du fulmoj  
Eternaj!

Kiel vi povas forgesi tiujn okulojn?

Ĉu vi scias kia terura cizilo estas la vido  
Ilia?  
Per tio mi jam gravuris la vizaĝon.

## **Ne la celon**

La kapriceman ludon de la sentimento mi perdis.

La malfleksecon de la unua junulineco mi perdis.

La ekscesajn vagadojn, la malzorgecon mi perdis.

La rigardojn kiuj estis sekvintajn min mi perdis.

Kaj multon alian similan.

Sed ne la lacecon, nek la celon.

La tentojn kiuj voris mian tempon mi perdis.

La facilanimajn amikojn kiujn neniam min konis.

La ĝenon de la malplena elkoreco mi perdis.

La animskuon, la aĝan necertecon mi perdis.

Kaj multon alian similan.

Sed ne lacecon, nek la celon.



## **Kiel daŭrigo**

1

Kiel daŭrigo mi aperis en la mondo  
Ne konsciante pri la momenteto de mia naskiĝo  
Iam ajn la plenan mortotagon ne sciante  
Kiel daŭrigo mi enverŝas en la mondo  
Kiel daŭrigo mi eniris ĉe vi kun amoro.

2

- Ĉu vi amas min?- demandis mi-  
En la momenteto de la ĝojo  
- Ekde la mangestoj- vi diris-  
Ĝis tiu de la penso.

3

La mondo trans la fenestro  
Maltranse mi.  
Sed ne dividas nin la fenestrokornico.

4

La paco povas esti

Neniam PACO  
Ĝiskiam ĝi pretigas  
La militan sangon.

5

Ni jam ellernis,  
Post provoj ni ellernis:  
Neniam la rezistado alportas solecon,  
Ne estas amo ĉiu kareso.

7

Ni la amatojn igas  
Aperigi tiujn aspektojn  
Kiujn ili tiom bele posedas  
Ne sciante.

8.

Per paroloj antikvaj kiom la homaro  
Mi volas diri kozojn tute novajn  
Pensojn ne aŭditajn alifoje  
Dum kiam ni ne intervidiĝis, ili akumuligiĝis.

9

Mi estas plenigita kvazaŭ la ujo pintpinte  
Mi estas plenigita kvazaŭ maro dum alfluo  
Mi estas plenigita kaj apenaŭ enverŝiĝas,  
Pro la homa demando por agado.

10

Apenaŭ povas superakviĝi la rivero  
Kontraŭ la ties lito,  
Ekkantos do la poeto  
Kontraŭ ties sentimento

- Recenzo

## BUNTKOLORA KAJ ALLOGA ROMANO

### Recenzo

*Julian Modest: Serenaj mateno”, romano, originale verkita en Esperanto. Redaktoro: Lode Van Velde. Eld.: “Libera”, Belgio, 2018.*



Julian Modest

Julian Modest estas Esperanto-verkisto, konata ne nur en Bulgario. Per sia multnombra verkaro en bulgara lingvo kaj en Esperanto li formis klaran, tre agrablan kaj serĉatan fizionomion de aŭtoro kun propra stilkonstruo kaj vorta trezoro. Pluraj liaj artikoloj kaj rakontoj troveblas en naciaj kaj internaciaj Esperanto-revuoj kiel “Fonto”, “Monato”, “Literatura Foiro”, “Zagreba Esperantisto”, “Bulgara Esperantisto” kaj aliaj. Produktaĵo de liaj majstreco kaj talento estas ŝatataj romanoj, esearoj, novelaroj, dramoj, kiuj nutras la Esperanto-legantaron en eŭropa, amerika kaj azia partoj de la larĝega Esperantujo.

La protagonistoj, la belegaj literaturaj bildoj de ĉirkaŭa naturo, la bunteriĉa lingvo de la aŭtoro havigas abundan ĝuon, ĝojon aŭ emocian triston kaj teneran vibradon en la koroj de la legantoj. Ni rememoru la rakonton “Vulpa Restoracio” el la libro “Mara Stelo”, kie la ĉarma intrigo kaj fajna lingvomajstreco de Julian Modest provokas larmojn de la kortuŝita leganto.

Nun mi kuraĝas aŭguri, ke la Esperanto-kulturo gravediĝis per la krimromano originale verkita en Esperanto de nia estimata amiko kaj samideano Julian Modest. Bonŝanca ĝojo por mi estis konatiĝi kun la manuskripto de la naskiĝonta krimromano “Serenaj Matenoj”. Koscianta la komplikecon atendi sukceson de krimbranĉa literatura verko, kie la verkisto ne nur devas elekti temon, tempon, lokon (scenejon de la okazintaĵoj), personaron kaj kompreneble riĉan sendube flekseblan kaj samtempe precizan lingvon, tamen scii kaj kapabli enmiksi kaj akcenti la rilatojn kaj la ligojn, kaŝigi, esplori, pridemandi, kombini, utiligi ĝustaloke emociojn, vigecon kaj finfine la aŭtoro kiel teksisto-magiisto enplektis buntkoloran tapiŝon belegan ne nur por la okuloj de la produktanto, sed certe kaj sendube por la aĉetonto (legantoj).


La loko, kie okazas la kriminalaj agoj de “Serenaj Matenoj”, estas la suda Nigramara regiono de Bulgario. La aŭtoro tre bone konas la regionon, kiu estas lia naskiĝprovinco kun karaj urbetoj, vilaĝoj kaj naturfenomenoj. Ĉi situo nepre helpas al la aŭtoro. Julian Modest emas inspire priskribi la naturajn belecojn, la transpaŝon de la vintro al printempo kun aromoj kaj koloroj, la grizajn nubojn, la bluiĝantan ĉielon kaj kompreneble la serenon bonhumoron de la homoj. Kontraste al tiu ĉi revigliĝo de la ĉirkaŭa vivo, alflugas novaĵo pri malapero de la filino de la urba kuracisto – lernantino en la lasta gimnazia klaso. Ŝia beleco kaj literatura talento estas larĝe sciataj inter geamikoj kaj instruistoj. Ŝiaj gepatroj serĉas profesion helpon de la polico.

La komencaj paĝoj de la romano entute ne donas signojn pri radikaj ŝanĝoj de la intrigo. La aŭtoro Julian Modest per ĉarma maniero nerimarkeble kaj tre flue efektivas brilante sukcese la ĉiaman deziron de ĉiu aŭtoro – ĝuigi, kontentigi la leganton kaj li (ŝi) ne forĵetu la libron ĝis ĝia fortralego.

Mi garantias plezuron kaj neimageblan kontentigon al la legantoj. Facila, fluanta, ĉarma lingvo, plezuro de la buntaj esprimoj eĉ en la momentoj de enplekto de esploranalizaj elementoj, kiuj tamen plifortigas kontentojn de la ĉarmigita leganto. Agrablan legadon, kara leganto.

**inĝ. Petar Todorov**

# Serenaj matenoj




Julian Modest



- Spomenka Ŝtimec



## Geografio de miaj memoroj



Vieno 1992

- **La neokazinta vojaĝo al Albanio**

En januaro 1991 en la telefonaŭskultilo en mia oficejo eksonis la voĉo de mia konato Usni el Makedonio.

- Mi havas invitilon al Albanio por pritrakti esperantajn aferojn. Ĉu vi ŝatus akompani min?

La invitilo evidente estis iom speciala.

Usni estas oficisto en Ohrid, antikva urbo ĉe la plej malnova lago en Eŭropo. La albana estas unu el liaj gepatraj lingvoj, sed li ne emis konsideri sin albano sed- egipto. Li entreprenis komplikan procedon akiri rajton por kelkcent de siaj samnacioj por povi sin deklari egiptoj. Li fosis en arkivoj kaj serĉadis dokumentojn por pruvi sian tezon pri la egipta deveno. Gazetoj donis al li certan atenton. Sed esploroj pri la historio de la egipta gento estis nur unu el liaj ŝatokupoj. Ankaŭ al Esperanto li dediĉis grandan energion. Li estis la aŭtoro de la gramatiko "Albana ŝlosilo" - elementa lernilo por albanoj, kiun li eldonis en 1980 kaj kiu enhavas etan Esperanto-albanan vortaron.



Usni Zemowski centre kaŭranta, Luan Jaupi centre staranta, en Ohrid 1991

Ĉar mi en la periodo 1989-1992, ĉe Universala Esperanto- Asocio, gvidis la kulturan fakon, Usni invitis min por levi siajn kontaktojn en Albanio al pli oficiala nivelo.

Ŝajnis ke Usni povas pli facile akiri sian enirvizon por Albanio ol mi: Li ja loĝas en ĉelima regiono, la albana estas lia gepatra lingvo. Mi ne estas albano loĝanta en Jugoslavio. Necesis trarampi komplikan burokratan mekanismon. Sed mi kuraĝis eniri ĝin!

La unua ŝtupo estis la policejo en Zagrebo, kie mi komencis esplori pri la necesaj dokumentoj.

La unua oficistino en la ĉambro 2 ne aspektis amike, sed tuj ekuzis la karesvorton "suneto" por alparoli min. Ĉu por mildigi la cirkostancojn?

- Ĉu privata vojaĝo?

- Ĉu ofica? Vi, ĉiukaze, bezonas invitleteron el Albanio, surbaze de kiu vi ricevos elirvizon el Jugoslavio. La invitletero devas esti akompanata de nacilingva traduko. Kiam ni donos al vi elirvizon, la Albana Ambassadejo en Beogrado donos al vi enir-vizon. Unue, vi devas alporti garantileteron el Albanio, ĉio estas tre rapide preta, suneto.

Al Usni mi telefone eksplikis, ke "oni" postulas garantileteron el Albanio por mi...kaj kelkajn semajnojn poste Usni sendis ĝin al mi. Ĝi estis en la albana lingvo, subskribita de Luan Jaupi, en la stilo socirealista. Ĝi estis konfirmita de la Oficejo de notario en la urbo Durrës:

"Lundon, la 4-an de marto mian oficejon de notario Elda Mihal Puli, en la distrikto Durrës, eniris Luan Jaupi, filo de Adem, naskita la 23-an de julio 1954, loĝanto en la strato A. Goga...Lian identecon mi konstatis per identigila numero....konfirmita de la Civila Buroo de la urbo Durrës. En la atesto de miaj okuloj, la koncerno subskribis la aldonitan garantileteron."

Mi estis danko al la nekonata Luan, kiu, lundon, eniris notariejon kaj ateste de la oficistaj okuloj subskribis invitleteron je mia nomo.

Dank' al ĝi mia pasporto baldaŭ ekhavis la necesan elirvizon. Mi enpakis mian pasporton kaj iom heziteme adresis ĝin kun la ricevitaj formularoj al la Ambassadejo de Albanio en Beogrado.

Kelkajn tagojn poste, mi eksciis, ke mia pasporto bone alvenis, sed la albana oficisto ne estis kontenta pri la formularoj, per kiuj mi petis la vizon. Laŭ la makedona akcento, per kiu li parolis kun mi, eblis kompreni, ke la formularoj ne plu validas. Li precizigis: ili estas tro mallongaj, do, eksaj.

- Sed kial la polico distribuas ilin?- kuraĝis mi demandi.- Kiel aspektas la novaj formularoj? Kio estas la nomo de la formularo?

- Ili devas esti grandaj.

Je mia insisto, eblis kompreni nur, ke la formularoj dividiĝas je grandaj kaj malgrandaj kaj la diferenco estas "ke la grandan vi devas plenigadi la tutan tagon".

Estis iom da kompatato en la voĉo de la oficisto. Mi kontraŭvole ekridis, komprenante la situacion. La divido de la formularoj al "grandaj" kaj "malgrandaj" anoncis al mi tiun landon, kie la tempo fluas per alia rapido. Tie verŝajne ankoraŭ funkcias mezurunuo "duontaga marŝado", "tutaga veturo for de la ĉefurbo", kaj ankaŭ "tuttaga plenigado de la formularo".

La Zagreba polico, kiu en la lastaj tri jaroj pritraktis nur tri privatajn vizitojn al Albanio, ne posedis aliajn formularojn.

Mi petis amikon el Beogrado viziti la ambasadejon kaj mem sendi al mi la grandajn formularojn. Li, eksambasadoro laŭ profesio, mem scivole eniris la internon de la ambasadejo por peti formularojn.

La granda formularo scivolis pri miaj antaŭaj nomoj kaj miaj parencoj en Albanio kaj aparte demandis pri la grado de parenceco kun la persono, kiu sendis la inviteleteron. Kiel klarigi, ke temas pri neniu grado de parenceco: la persono, kiu sen hezitoj sendis al mi garantileteron, parolas la Internacian Lingvon kiel mi. Ĉu tiu grado de parenceco laŭ la lingvo elektita sufiĉas por la vizo? Ĉu mi ne embarasas la samlingvan Luan? Ne nur unu fojon Esperanto skribis ĉapitrojn pri "La danĝera lingvo". Ĉu ne tro frue ni kontaktas? Ĉu mi atendu, ke Albanio havu pli da internaciaj rilatoj kaj pliperfektigu en la transnaciaj interŝanĝoj kaj nur tiam aperu la esperantistoj?

Aŭ ĉu mi devas estis la pioniro?

Intertempe, el la arkivoj de la Roterdama Centra Oficejo atingis min listo kun deko da samideanoj, kiuj en Albanio rilatas al Esperanto. Ĉiujn mi informis, ke mi planas viziton al Albanio, se mi ricevos enirvizon.

Kelkaj respondis. Ĉiuj respondoj venis per rekomenditaj leteroj. Ĉu pro bezono konservi konfirmilon aŭ espero, ke tiel ĝi sekure venos.

La unua letero venis el la urbo Shkodër, de sinjoro Zef Mjeda. Pli ol sesdekjara, lia larĝa manskribo informis pri liaj tradukoj el la albana poezio al Esperanto. Ĉu li estas tiu silenta instruisto, kiu dum jaroj per pinta krajono en kajerojn notis Albanan-Esperantan vortaron de 30000 vortoj? Ĉu li, en silento de sia hejmo, instruis Esperanton al ĉiuj siaj familianoj kaj la novaj bofilinoj, kiuj allediĝis, eksekvis familian kurson?

Kun intereso mi eklegis la poemon "Gjergj Elez Alia" tradukitan de li.

"Inter agloj la aglo, Gjergj Elez Alia,

De naŭ jaroj, naŭ vundojn li havas.

Tagnokte, ĉe lia kapo flegas la fratino,

Liajn vundojn per fontakvo ŝi lavas" ..

Arkaika sonis la lingvo.

Mi sendis donace kelkajn librojn en Esperanto. Liaj respondoj baldaŭ montris, kiom profunde li trastudis ĉiun paĝon.

Alia letero venis de Klara, juna instruistino de la angla, edzino de Gëzim kaj patrino de la kvarjara Elvin.

Mi lernis la nomojn. Albanio, malantaŭ la nebulo, konsistis el panjoj kaj filoj, avoj kaj bofratinoj. Arben, Asllan, Bahri Perraj. El iliaj kovertoj elfaladis bildkartoj pri Albanio: fresko kun Sankta Teodoro el Berat kaj la domo en Korçë, kie kamarado Enver Hoĝa vivis kaj laboris. Longe mi rigardis la teksitajn kurtenojn, varmkolorajn tapiŝojn, kamenon kun grandaj lignopecoj. Latuna kruĉo ĉe la kameno. Ĉu foto de lia patrino sur la muro?

Intertempe, dum mi atendis, ke Tirana konfirmu miajn formularojn kaj permesu al mi enirvizon, sangaj eventoj portis la nomon de Albanio sur la titolpaĝojn de la mondaj ĵurnaloj. Elŝiriĝadis la lando el la fera ĉirkaŭbrako de la tordita komunismo, al kiu ĝi dum jardekoj apartenis kaj kiu donis al ĝi tiun pezan kromnomon de "lasta bastiono de komunismo en Eŭropo".

Dudeko da miloj da albanoj, sur malstabile troŝarĝitaj ŝipoj, direktiĝis al Italio, al la Okcidento. Okazis la unuaj plurpartiaj elektoj, post kiuj Ramiz Alia restis prezidento.

Pafoj kaj esperoj..

La ĵurnaloj en mia lando ne lasis min sen korŝiraj rakontoj pri la fuĝo tra la "Damnita Montaro". Dum la unuaj tri monatoj en 1991, fuĝis sur la teritorion de Jugoslavio 900 personoj.

"Oni ekiras en la montaron je la tria matene, kiam la dormo konkeras la albanajn limgardistojn. Mi vidis mian bofraton iri alidirekten, por serĉi la vojon en la montaro. Li ne plu revenis. La fratino frostiĝis antaŭ miaj okuloj. Kiam mi trovis paŝtistan kabanon por peti panon kaj varmon, jam nenia savo eblis."

Komisiono pri fuĝintoj de la Unuiĝintaj Nacioj pagadis la restadon de la fuĝintoj dum ilia halto en Jugoslavio. La pli granda parto de ili celis al Usono. Labori. Perlabori. Sendi la monon hejmen. Ne reveni. Tiel resumiĝas la deziroj.

(daŭrigota)

**Vojaĝoj**



- La Silka Vojo

(Tra fotilo kaj ideo de s-ro So Gilsu, Sudkoreio)







中国泥塑艺术博物馆  
中国泥塑艺术博物馆































